

Beletra Edeno

neregula beletra bit-revuo

n-ro 7 (aŭgusto 2024)



Ĉiuj kontribuoj estas bonvenaj.

Redaktis Vejdo (vejdo@163.com)

Kontribuis Hong Jia, Luiza Carol, Yin Jiaxin, Laimundas Abromas, Yang Fang, Wang Chongfang, Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser, Pipi, Yang Fang, Bardhyl Selimi, Vejdo, Minosun, Mikaelo Bronŝtejn, Rita Mkrtĉjan, Maria Nazaré Laroca, Ardo, Rovere Emanuele, Eto, Wei Lai, Mei Jie, Guozhu, Rafael Henrique Zerbetto

AI-ilustris John Huang, karikatur-esperantigis Paula Ad úriz

Enhavo

Originala prozo

Hong Jia: La hantata domo.....	003
Luiza Carol: Stelkaroto.....	008
Yin Jiaxin: Ŝtelado.....	013
Laimundas Abromas: La nesolvita demando.....	015

Tradukita prozo

Mo Yan: Sekiĝinta rivero (trad. Yang Fang).....	017
Mitch Albom: Mardoj kun Morrie (trad. Wang Chongfang).....	028
Fratoj Grimm: Dek du fratoj, Kanajlaro (trad. Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser).....	041
Zhang Yuting: Donaco (trad. Pipi).....	047
Iljet Alička: Ŝtonaj sloganoj (trad. Bardhyl Selimi).....	048
Chiung Yao: En profunda korto (7) (trad. Vejdo).....	062
Shi Fengqin: Puto (trad. Minosun).....	070

Originala poezio

Mikaelo Broštejn: Kelkaj poemoj el la poemaro <i>Kajto</i>	072
Rita Mkrťan: Poemo k.a.....	078
Lily: Spektado al ruĝaj folioj k.a.....	082
Ángel Arquillos: Plendo al la juneco.....	086
Maria Nazaré Laroca: Bondeziroj k.a.....	087
Luiza Carol: Aŭtuna sunsubiro.....	091
Ardo: Respekton kaj admiron al la Granda Kanalo.....	092
Vejdo: Lunbrilo kaj akvobrililo.....	093
Rovere Emanuele: Kvin kanttekstoj.....	100

Tradukita poezio

Yu Guangzhong: Araneaĵo k.a. (trad. Eto).....	104
Ju Jian: Luo Jiasheng (trad. Minosun).....	108
Ding Li: Granatujoj floris (trad. Minosun).....	110

Bai Juyi: Longa bedaŭro (trad. Wei Lai)..... 111

Teatro

Anonimulo: Honesteco estas oro (reverkis Mei Jie)..... 116

Artikolo kaj Eseo

Guozhu: Senfina honoro, senfina adoro..... 121

Rafael Henrique Zerbetto: Ĉinaj hoteloj ne plu povos rifuzi
eksterlandajn gastojn..... 137

Recenzo

Rafael Henrique Zerbetto: Dezerto: nova bitalbumeto de Armel Amiot.. 141



John Huang, prezidanto de internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF) nordamerika, ĉefredaktoro de la revuo "La Merkato", estas ĉina-kanada esperantisto kaj komercisto. Li estas la oficiala fotisto por du sinsekvaj Universalaj Kongresoj en 2022 kaj 2023. Li esperantistiĝis jam en la 1980-aj jaroj kaj aktive partoprenis multajn Esperanto-agadojn en la sekvaj jardekoj. Li faris la AI-bildojn de ĉi tiu numero de Beletra Edeno.

Foto sur la kovrilo: *Pudong-distrikto de la urbo Ŝanhajo, Ĉinio*



Karikaturoj esperantigitaj de **Paula Adúriz** (Hispanio)

Hong Jia (Ĉinio)

La hantata domo

En Urbo G troviĝas pitoreska lago, kie oni ĝoje remas kaj naĝas, precipe en dimanĉoj kaj ferioj, sed oni neniel proksimiĝas al la izolita domo sur la bordo. Laŭdire du junaj studentinoj estis tragike murditaj en la domo kaj de tiam oni ofte aŭdas babiladon kaj kantadon de la mortintoj. Informiĝinte pri tiuj strangaj fenomenoj, policianoj tie faris enketon, sed la murdo ankoraŭ pendas en aero kaj rilataj fenomenoj sin kaŝas en densa mallumo.

Lu Dong, profesia verkisto, ofte verkas ĝis la profunda nokto, kelktempe eĉ tra la nokto. Li loĝas en la centro de la urbo. Li sentas sin obsedata de tia bruoj, kiaj hupado de aŭtomobiloj, kriado el nokta drinkado en liberĉiela manĝejo kaj kantvoĉo el balejo. Kelktempe li preskaŭ freneziĝas pro la urba bruo. Sidante super la skribtablo, li ne havas trankvilan koron por organizi siajn ideojn kaj verki laŭ planita pensfadeno. Li ne povas eskapi el la aĉa situacio, ĉar li havas nenian alian loĝejon ol ĉi tiun domon. Pro tio li decidas solvi tiun problemon. Ĉie li petas informojn pri kvietaj medioj por sia verkado. Lia konato L, kiu loĝas en la sama urbo kun li kaj laboras kiel elektronika teknikisto en kompanio, rekomendis al li domon en antaŭurbo kvietan kaj paca, malproksima de urba bruo.

Laŭ difinita tempo ili veturis al la domo por fari esploron. La izolita domo situas ĉe la lago, kie krom dumtaga bruo de turistoj, regas kvieteco en nokto. Kvankam la domo aspektas iom kaduka, la medio plaĉas al Lu Dong, des pli la malaltan prezon li povas akcepti. Du cent mil juanoj ne estas tre granda sumo por li vivanta de salajro kaj honorario. Se oni volas aĉeti domon en la urbo, la plej malgranda apartamento el unu ĉambro kaj kuirejo almenaŭ kostas tricent mil juanojn. Ĉe la loko li tuj senhezite pagis mendkoston al la peranto de bienagentejo kaj reiris al la urbo.

Antaŭ ol transloĝiĝi al la apudlaga domo, li telefone kontaktis kompanion de renovigo. La sekvan tagon la direktoro B de la kompanio venis al la apudlaga domo. Unue ili ĉirkaŭiris la domon kaj poste iris en la internon por decidi, kiel renovigi la domon.

Antaŭ diskutado pri detaloj de renovigo, la direktoro B elmetis al li kelkajn demandojn:

“Kial vi aĉetis izolitan domon malproksime de la urbo?”

“Mi estas verkisto. Ĉiutage, precipe ĉiunokte mi devas verki.. en kvietaj medioj. En la urbo la bruo premas min al la rando de frenezeco,” respondis la verkisto.

“Ĉu viaj edzino kaj infano transloĝiĝos ĉi tien?”

“Ne, ili ankoraŭ loĝas en la urbo, kaj miaflanke, se mi ekhavos bezonon verki, mi sola loĝos ĉi tie,” li diris.

“Sed ĉu vi scias, ke en ĉi tiu domo okazis murdo kaj du junulinoj mortis. Laŭdire ĉiunokte aŭdiĝas plorsonoj kaj kantvoĉo el la domo. Oni diras, ke la fantomoj de la mortintoj venas eligi plendojn. Ĉu vi timas?”

La verkisto brave respondis, “Ne, mi scias nenion pri tio. Mi ne timas fantomojn. Fakte ne ekzistas fantomoj en la mondo.”

Kaj poste ili diskutis pri la detaloj de renovigo. Antaŭ ol foriri la direktoro diris, “Ni komencos labori morgaŭ kaj post finiĝo de la laboro, mi telefone informos vin.”

Post duonmonato la renoviga laboro finiĝis. Kun eksciteco Lu Dong preparis necesajojn por la vivo kaj verkado, kaj transloĝiĝis al la domo. Samtempe li jam forgesis la averton de la direktoro B pri la hantata domo.

Samnokte li daŭre verkis novelon, kies intrigojn li jam anticipe aranĝis en la urbo. Tute absorbite de verkado li ne donis atenton al ĉirkaŭaĵoj. Subite li sentis skuigon de la planko, kvazaŭ iu pikus la plafonon de la teretaĝo. Li tuj rektigis sian talion kaj streĉe ekaŭskultis. Ŝajnis, ke vento frapis kontraŭ la pordo kaj ĝia forto skuis la plankon. Sed tuj post tio aŭdiĝis paŝoj. Li kolektis sian kuraĝon kaj aŭdace demandis, “Kiu estas tie?” Neniu respondo venis. Li iom kvietiĝis. Li pensis, ke li nervoziĝis pro la rakonto de la direktoro B. Li revenis al la antaŭa stato de verkado kaj rapide klakis la klavaron de la komputilo. Post ĉirkaŭ duonhoro eksonis plorvoĉo ŝvebanta el la subtegmento. En tiu momento li ne plu povis sidi kviete. Li stariĝis kaj faris kelkajn paŝojn al la ŝtuparo por vidi, ĉu vere io anormala okazis. Li ne vidis signojn de homoj kaj la plorvoĉo daŭris miksita kun plendemaj vortoj. Ĉu mi forlasu verkadon kaj supreniru por esploro? li pensis. Tamen io retiris lin malantaŭen. La rakonto pri la hantata domo okupis lian tutan cerbon. Jes, li ne timas fantomojn, sed tiuj omenoj lin kaptis en paniko. Kion fari? Se vere enstrudiĝus homoj kun malbona intenco, ĉu mi povus kontraŭstari ilin per malfortaj pugnoj? Li movis sian cerbon rapide. Feliĉe mia aŭto parkis ĉe la pordo kaj mi povas eviti ilin per forveturo. Li reiris al la tablo kaj hasteme preninte la komputilon, malsupreniris laŭ la ŝtuparo kaj impetis ekster la pordon. Kun forte batanta koro li enaŭtiĝis kaj startigis la aŭton.

Kiam li atingis la hejmon, jam batis la unua horo nokte. Vidinte, ke li anhele malŝlosis la pordon, lia edzino tuj ellitiĝis kaj demandis, “Kio okazis? Kial vi hejmeniras en tial malfrua horo?”

“Nenio okazis. Mi nur forgesis ion gravan hejme. Morgaŭ mi kunportos ĝin al la apudlaga domo,” dirinte tion, li eniris la banejon.

La postan tagon Lu Dong pensis, ke li povas labori dumtage en la apudlaga domo kaj dormi en sia hejmo nokte. Decidinte, li veturis al la domo matene. Enirinte la ĉambron, li ne trovis ion stranga aŭ anormala. Sidige ĉe la tablo, li malfermis la

komputilon kaj komencis verki. Sen ajna inspiro li cerbumadis longan tempon. Estas bone dumnokte, li pensis, por verki en senbrujaj horoj, sed kion fari. Ĉi tie la nokto estas multe terura pli ol en la urbo. Se ne ekzistas fantomoj en la mondo, kial aperas tiaj terurigaj fenomenoj? Li ne povis trovi la respondon. Li komencis verki lante kiel heliko. Senkonscie li trenis la verkadon ĝis vesperiĝo, kiam pluvegis. Grasaj pluvgutoj forte frapis la tegmenton. La pluvakvo fluis de la tegmentrando kiel akvoŝafojetoj. Li ĉesis klaki la klavaron kaj iris al la fenestro por rigardi. Ah, la lago ŝajne ŝvelas pli alten je colo kaj videblas neniuj homaj signoj. Riverete fluis pluvakvo laŭ la vojo. Tie kaj tie troviĝas flakegoj kaj la koto jam kaŝiĝas. En tia vetero aŭtoveturado estas danĝera. Reveninte al la tablo li denove ekis verki kun preskaŭ stagnanta cerbo.

Je la deka akurate tondro eksplodis kaj la pluvo sitele verŝis. Sub la tondra muĝo la tuta domo iom skuĝis. Li portempe ĉesis verki kaj dronigis sin en pensemon pri la intrigoj. Tuj poste aŭdiĝis obtuza babilado inter du virinoj miksitaj kun ridsonoj. Tio abrupte eltiris lin el la pensoj. Konsciante, ke hieraŭaj strangaj fenomenoj okazas denove, li retiriĝis al la ŝtuparo preta eskapi el la terurego. Iom poste la babilado turniĝis al plorego kvazaŭ funebranta pri mortintoj. Li ne plu sin regis. Li grandpaŝe, preskaŭ saltante, malsupreniris la ŝtuparon. Anhelante li sin ĵetis al sia aŭtomobilo kaj ekigis sian aŭtoveturon spite al la danĝero, kiu ajnan momenton okazos sur la glitiga kotvojo. Feliĉe post longa vivriska ŝoforado li sekure revenis al la urbo. Kiam li eniris sian hejmon, sciante, ke ĉifoje li ne povas kovri la okazintaĵon, li senrezerve rakontis al sia edzino ĉion, kio okazis en la apudlaga domo. Post tio li silentis kaj lia koro furioze batis. Kiam li iom kvietiĝis, li ŝanĝis la malsekajn vestojn por piĵamo. Sen fermi siajn okulojn li kuŝis apud sia edzino ĝis tagiĝo. Liaj pensoj konfuziĝis kaj la korpo rigidiĝis.

Lu Dong malsaniĝis. En hospitalo li kuŝis en letargia dormo jam du tagojn. La trian tagon li duone malfermis siajn okulojn, demandante, “Kie mi...mi ... troviĝas?”

“En hospitalo,” respondis lia edzino.

“Kial? Ĉu mi havas gravan... malsanon?”

“La kuracisto diris, ke vin trafas komato pro intensa paniko. Kaj post kelkaj tagoj vi resaniĝos,” lia edzino diris.

“Do, mi ne...ne...ne...plu povos reiri... al la domo por verki.”

“Kompreneble jes. Vi devas ripozi en trankvileco,” ŝi admonis.

Ĝuste tiam eksonis lia poŝtelefono. Li ŝaltis ĝin kaj malfacile premis ĝin al sia orelo.

“Ĉu sinjoro Lu Dong? Parolas la direktoro B. Ĉu vi sentas vin komforte en via nove renovigita domo?”

“Nun mi...mi...en hospitalo. Mi...malsaniĝas. La sperto en la renovigita domo

estas... terura. Vi... pravas. Ĝi estas...hantata domo,” li pene respondis al la direktoro.

“Bedaŭrinde! Mi ne povus doni al vi telefonvokon ĉi-momente,” diris la direktoro.

“Ne gravas. Mi...mi...elhospitaliĝos posttagemeze. Mi... mi diskutos ... kun vi... pri la domo. Morgaŭ venu al mi...en mia hejmo...ĉu bone?”

“Bone. Ripozu bone. Morgaŭ mi vizitos vin,” la direktoro promesis.

Sin turninte al sia edzino apude sidanta, li diris, “Pro tia terura okazaĵo mi... mi pensas, ke...ke ni plibone elvendu ...la domon. Kio...estas via opinio?”

“Mi pensas ke jes. Vi povas same verki en la urbo. Kaj aliflanke vi maltrankviliĝas pri vi en la fora domo. Do kontaktu la bienagentejon por ĝin vendi,” ŝi diris.

La duan tagon Lu Dong ricevis la viziton de la direktoro B en la hejmo.

La direktoro rekte komencis, “Mi diris al vi, ke ĝi estas hantata domo, sed vi ne kredis. Jes, tiu loko estas kvieti kaj taŭga por verkado, sed sekureco estas problemo. Eĉ se ne frekventus fantomoj, ulaĉoj enrudigus por prirabo kaj kaŭzus ĝenojn. Do kion vi volas fari pri la domo?”

“Mi volas ĝin elvendi. Ĉu vi havas konatojn aŭ amikojn, kiuj volas aĉeti la domon?” Lu demandis.

“Jes, mi havas amikon, kiu eble volantas aĉeti tiun domon. Mi kontaktu lin dum ĉi tiuj tagoj,” dirinte, la direktoro foriris.

Post du tagoj la direktoro telefone diris al Lu Dong, “Mi jam trovis aĉetanton por vi, sed li postulas, ke vi donu dudekprocentan rabaton de la origina prezo. Se vi konsentas, la negoco estos plenumita.”

“Bone, konsentite,” Lu Dong hasteme promesis, ĉar li volis liberiĝi de la hantata domo kiel eble plej baldaŭ.

La negoco finfine estis farita.

Tamen neatendite post kelkaj tagoj Lu ricevis la telefonvokon de sia konato L, kiu diris, “Gratulon al vi, Lu. La domo, kiun vi aĉetis je la prezo de ducent mil juanoj, nun povas valori je kvincent mil juanoj.”

“Kiel statas la afero?” Lu scivole demandis.

“Ĉar la registaro volas ekspluati tiun regionon ĉirkaŭ la lago, kie via domo situas. Kompreneble vian domon oni malkonstruos. La anonco de la registaro diras, ke la posedantoj de la konstruaĵoj en tiu regiono povas ricevi kompenso laŭ la grandeco de konstruaĵoj. Mi kalkulas, ke via domo valoras iom pli ol kvincent mil juanojn,” L klarigis.

“Ĉu vere? Sed antaŭ kelkaj tagoj mi jam elvendis ĝin pere de la helpo de la direktoro B,” Lu Dong diris kun bedaŭro.

“Li certe trompas vin. La registara anonco pri malkonstruado publikigis antaŭ du monatoj, sed mi ne sciis ĝis antaŭhieraŭ. Mi konsideris, ke vi certe profitos el la

plivaloriĝo de la domo. Ve, kial vi elvendis la domon?” lia konato demandis.

Lu Dong detale rakontis al li ĉion, kio okazis dum tiuj tagoj.

“Mi vere kredas, ke li trompas vin! Eble la aĉetanto estas li mem. Per ĉi tiu negoco li akiris grandan profiton. Tamen mi dubas, ke estas veraj fantomoj, kiuj entruĝis en vian domon. Mi suspektas, ke li ludas artifikon por trompi vin. Mi volas kunporti kelkajn aparatojn por ekzameni la tutan domon, ĉu bone?”

“Bonege! Ni iros tien morgaŭ!”

La sekvan tagon Lu Dong kaj L, kunportante kelkajn test-aparatojn, veturis al la apudlaga domo. Ili puŝmalfermis la pordon kaj komencis testi la murojn de la teretaĝo. Tamen ili trovis nenion dubindan. Kaj poste ili supreniris al la dua etaĝo, kie Lu Dong verkis, sed nenio malkaŝiĝis en la muroj. Ili sentis, ke la plej suspektinda loko estas la subtegmento, ĉar la fantomaj babiladoj kaj ploroj alŝvebis el la subtegmento. La teknikisto L zorgeme ekzamenis ĉiujn angulojn tie. Subite elektronika aparato ruĝe blinkis kaj eligis didi-sonojn. Li pene rompis la muron kaj elprenis nigran kesteton. La teknikisto tuj rekonis en ĝi sonproduktilon, kiu entenis kelkajn sonregistraĵojn. Nun ĉio dronis en hela lumo, ke vere la direktoro B, por akiri la pli grandan profiton, instalis la sonproduktilon en la muro kaj kreis la scenon de babilado kaj plorado de fantomoj.

Ĉe tio Lu Dong abrupte eligis laŭtan krion, “Mi volas lin akuzi pri la fraŭdo!”



esperantigita de **Paula Adúriz** (Hispanio)

Luiza Carol (Israelo)



La stelkaroto

Jen ĝi! Jen la stelkaroto, sur la blua breto de mia kuirejo!
Kion mi faru? Kion mi decidu? Kion vi farus se vi estus mi?

Pluvis tiun tagon en la komenco de julio, la lastan fojon
kiam mi vidis Ĉielarkon. Li estis gastinta ĉe mi dum du

aŭtorino, Luiza Carol

semajnoj kaj tiutage jam preparis sin por reveni hejmen. Sian trajnbileton li jam aĉetis, sed ankoraŭ ne decidis per kiu trajno foriri. La trajnhoraron li metis sur la tablon, sub la florumetitan, el kiu freŝa leontodo ŝajnis rigardi nin. Kiam li enmetis la floron tien? Li verŝajne vekiĝis multe pli frue ol mi kaj gimnastikis en la ĝardeno. Ekde kiam li venis ĉe mi, ĉiutage aperis nova floro en la vazeto, sed neniam mi rimarkis, kiam li alportis ĝin...

Ĉielarko kaj mi ekamikiĝis unu jaron antaŭe, pere de Dua Vivo, kie ni ambaŭ ĉeestis prelegojn, kunvenojn kaj spektaklojn en Esperanto. Iom post iom ni malkovris, ke ni havas multegajn komunajn interesojn kaj renkontiĝis pli kaj pli ofte tie, en la artefarita mondo. Ĉielarko estis la nomo de lia "avataro" tie, sed ni ambaŭ kutimiĝis uzi la nomojn de niaj "avataroj" ankaŭ tie ĉi, en la reala vivo. Do li nomis min Abio, kaj mi ŝatis tion.

Mi estas ĉirkaŭ 36 jara kaj loĝas en malgranda domo, ne malproksime de la vilaĝa lernejo, kie mi instruas historion kaj Esperanton. Mi estis sola en julio, tuj post la eksedziĝo, kaj ĝojis havi dum la ferio agrablan gaston, kiu forigu mian solecon. Ni ankaŭ planis, ke mi vizitu lin je la mezo de aŭgusto. Nun estas la mezo de aŭgusto. Hodiaŭ mi devas decidi, ĉu mi vizitu lin.

Ĉielarko estas biologo, preskaŭ 10 jarojn pli juna ol mi, vegetarano samkiel mi, emas naĝi kaj bicikli, amas la naturon, interesiĝas pri historiaj kaj sciencfikciaj romanoj... Ni pasigis bonan tempon kune.

Nun, kiam mi rememoras tiujn du semajnojn, dum kiuj ni babilis ĉiutage, kune piediris kaj biciklis, kune vizitis muzeojn en la granda apuda urbo... nun, mi opinias, ke li ja estis iom stranga... Tamen, pasintmonate, mi apenaŭ rimarkis tion. Mi ne volas diri, ke lia aspekto estis stranga. Ne, ne. Li aspektis tiom ordinara kiel sia avataro, kvazaŭ li estus ties kopio: averaĝa alteco, averaĝa dikeco, averaĝa vestaĵo...

Eĉ averaĝajn inteligentecon kaj klerecon li ŝajnis posedi, kiam oni babilis kun li pri bagatelaĵoj. Sed kiam temis pri seriozaj aspektoj de la vivo, li ŝajnis multe pli matura ol mi, malgraŭ sia aĝo. Li ĉiam evitis paroli pri sia propra vivo, sed li instigis min paroli pri la mia. Ĉielarko ŝajnis havi tre seriozajn konojn pri historio, kaj kiam li faris nur hazardajn komentojn pri la nuna monda politiko, mi tuj sentis min kiel infano fronte al lia profunda pensmaniero. Kelkfoje li ŝajnis aŭdi miajn pensojn, sed tio ne ĝenis min. Male, tio donis al mi bonan senton de amikeco kaj fido, tial mi faris al li longajn konfesojn pri io ajn, kio pasis tra mia cerbo...

Mi faris al li kelkajn demandojn pri lia lando, liaj familianoj, liaj geamikoj... Li ĉiam respondis: “Ne gravas, pri tio ni havos amason da tempo paroli kiam vi estos mia gasto, venontmonate. Nun la ‘turisto’ estas mi, do ni parolu pri via lando, via vivo, viaj planoj pri la estonteco...” Dunja, lia koramikino, ne povis akompani lin ĉi tien, sed ili alvokis unu la alian ĉiujn kelkajn horojn kaj parolis longtempe. Li insistis paroli “nur duope” kun ŝi, tial li ĉiufoje iris en kiel eble pli izolitan lokon por babili trankvile per poŝtelefono, malproksime de ies oreloj. Por ne ĝeni ilin, mi ne faris tro multajn demandojn pri tio. Mi neniam vidis la foton de tiu junulino, kun kiu li babiladis. Foje mi demandis lin, ĉu li havas ŝian foton en sia poŝtelefono. “Foto?!” li miris, kvazaŭ mi faris strangegan demandon. Poste, kvazaŭ li rememorintus ion, li diris: “Ha, foto! Mi komprenas... Ne, mi ne havas ŝian foton.”

Kaj venis la lasta tago de lia vizito. Lia valizeto atendis tute preta apud li. La trajnhoraron li metis sur la tablon, sub la florvazeton.

“Kara Abio” – li diris – “mi volas fari al vi gravan konfeson.”

Mi ne estis tro surprizita. Mi iel estis diveninta, ke li kaŝas ion. Mi montris al li tiom da fido kaj varmo, ke ŝajnis al mi tute natura lia deziro rompi sian sekretemon. Mi tuj supozis, ke li volas ekloĝi ĉe sia koramikino, kaj estos al li malfacile reciproki mian gastigemon venontmonate, laŭ la promeso. Tio ne estintus por mi grava afero. Mi povintus atendi alian okazon por viziti lin. Ni jam estis tre bonaj amikoj, do mi ne ofendiĝintus pro bagatelo.

“Mi estas... aliplanedano...” – li deklaris hezite, embarase, kvazaŭ li mem pridubus siajn vortojn.

Mi ekridis. Li embarasiĝis eĉ pli.

“Pli ekzakte, mi estas... avataro de aliplanedano. Mia avataro estas ĉi tie, dum mi mem estas hejme, en fora galaksio, fronte de sfera ekrano por tridimensiaj imagoj. Por mi, tie ĉi estas iusence mia ‘Tria Vivo’. Jen ĉio.”

Li estis tre serioza. Mi subite ektimis.

“Ne timu, Abio...” – li diris milde.

Mi maltrankviligis, demandis min, ĉu li aŭdas miajn pensojn.

“Mi ne aŭdas viajn pensojn, sed sentas viajn emociojn... mi ne kapablas klarigi kiel... Nun mi sentas ĉe vi timon, koleron, malfidon... Ne indas timi, Abio. Mi ja estas via amiko. ”

Mi jam kredis lin. Sed mi sentis min ofendita, perfidita. Mi fidis lin tutkore, akceptis lin kiel fraton... dum li mensogis pri sia deveno, sia identeco... mensogis pri ĉio.

“Mi ne povintus klarigi al vi tion ekde komence” – li diris, por senkulpiĝi.

Mi ne konsentis. Kial li ne povintus diri la veron? Li devintus demandi, ĉu entute mi volas akcepti tian strangan estaĵon en mian domon, ĉu ne?

“Mi estas homo, samkiel vi, el biologia vidpunkto. Mi volas diri ke tie, kie mi estas nun, ĉe mia sferkomputilo, mi estas homo kiel vi, el biologia vidpunkto. Sed kion vi vidas nun, estas mia avataro. Tiu estas farita el la sama materialo, kiu konsistigas songojn. Jen... jen...”

Antaŭ miaj okuloj, Ĉielarko aliformis sian vizaĝon, sian korpon... Poste li reprenis la antaŭan formon.

“Ne timu, mi ne estas monstro en la realo. Fakte, tiun ĉi avataron mi konstruis ĝuste laŭ mia reala formo. Vi ne havos surprizon, kiam vi konos min sur mia planedo. Mi aspektas ĝuste tia ĉi.”

Do, li ja supozas, ke mi vizitos lin. Kial mi risku fari tian strangan vojaĝon?

“Ne timu. Vi nenion riskos. Vi restos trankvila apud via komputilekrano, samkiel okazas dum viaj vojaĝoj en Dua Vivo. Vi vizitos min pere de avataro, samkiel mi faris ĉi tie. Se vi laciĝos aŭ ne ŝatos ion, vi simple ĉesigos la ludon.”

“La ludon!” – mi kriis. “Vi parolas pri ludo!! Honesta ludo postulas interkonsenton, ĉu ne? Kiam ni interkonsentis ludi? Mi fidis vin, dum vi ludis kun mi. Mensogulo vi estas!”

Ni kverelis longtempe tiun matenon. Mi ekkoleris kontraŭ li, kaj ne povis pardoni lin.

Antaŭ ol foriri, li diris:

“Mia invito validas, Abio. Se vi volos viziti min... mi akceptos vin tutkore, kiel avataran gaston, je la jam fiksita dato.”

“Kial mi plu fidu vin, mensogulo?” – mi respondis kolere.

“Mi neniam mensogis” – li diris.

Tiam mi furioziĝis: “Fulmotondro! Ĉu vi ne diris tute klare, ke vi loĝas sur la tero?!!”

“Jes” – li diris. “Sed tio ja veras. Mi ja posedas loĝejon sur la tero, tian kiel mi priskribis al vi. Veran loĝejon. Mi ofte gastigas konatulojn tie. Ankaŭ vin mi povintus inviti tien sen konfesi ion ajn, kaj tiukaze vi verŝajne estintus kontenta. Provu kompreni, Abio... Ĝis nun, mi neniam fidis ajnan teranon sufiĉe, por konfesi

la tutan veron. Fakte, vi estas mia unua vera amiko sur tiu ĉi mondo. Mi ege bedaŭrus, se mi perdus vian amikecon..."

"Kaj via koramikino? Kion pri ŝi? Ĉu ankaŭ kun ŝi vi ludas la saman filudon?"

"Dunja estas mia samplanedano. Mi jam diris al vi, ke ŝi ne havis tempon akompani min ĉi-somere, ĉar ŝi preparas sin por trapasi gravan ekzamenon. Ŝi studas genetikon. Kiam vi vizitos min, vi ekkonos ankaŭ ŝin."

Kelktempe ni silentis. Mi pensis, ke eble li estas freneza.

"Mi diris nenian mensogon" – li insistis. "Mi nur prisilentis parton de la vero. Tio akcepteblas eĉ inter plej bonaj amikoj. Fakte neniu diras ĉion al aliulo. Homo kiu ambicius rakonti ĉion pri si... devus esti ege teda, ĉu ne?"

El racia vidpunkto, li pravis. Ankaŭ mi prisilentis diversajn aferojn... Sed tiuj ne estis tiom gravaj!

"Mi pardonpetas..." – li diris malgaje. "Mi ne volis ofendi vin. Mi esperas, ke vi akceptos min tian, kia mi estas... kaj tre ĝojus, se vi decidus viziti min. Abio, antaŭ kelkaj tagoj, mi plantis karoton en via ĝardeno. Ĝi troviĝas ie, apud la tilio. Tio estas mia donaco. Ne temas pri ordinara karoto. Ĝi kreskos stelforme, iom malsimile al normala karoto. Ĝi kreskos dum ĉirkaŭ 3 semajnoj, poste vi povas elterigi ĝin. Musoj aŭ leporoj ne tuŝos ĝin, ĉar ili ne rekonos ĝin kiel karoton. Se vi montrus ĝin al teranaj biologoj, ili dirus, ke ĝi estas tute ordinara legomo, nur ĝia formo estas iomete malkutima. Tio kion mi enmetis en ĝin estas farita el la sama materialo kiel la homaj songoj. Nur por vi mi kreis ĝin. Nur por via korpo kaj menso ĝi efikas. Mi elpensis tiun donacon pro granda amikeco, esperante ke vi akceptos ĝin. Kiam vi estos preta viziti min sur mia planedo, sufiĉos boligi kaj manĝi la stelkaroton. Via cerbo ekkapablos formi avataron, kiu aperos ĉe la pordo de mia domo. Vi gvidos tiun avataron pere de via komputilo, laŭ maniero kiun mi klarigos al vi tiutempe. Ne hezitu. Ne rifuzu al vi la plezuron pliriĉigi vian vivon per tiu travivaĵo. Fidu min, Abio. Mi neniam trompis vin."

Li etendis la manon por adiaŭi, sed mi rifuzis etendi la mian. Li malaperis.

Jen ĝi! Jen la stelkaroto, sur la blua breto de mia kuirejo! Ĝi similas oranĝkoloran polpon... Sed polpojn mi timas kaj malŝatas. Kial mi kuraĝus meti en la buŝon tiom strangan aĵon? Supozu ke Ĉielarko estas malica perfidulo, kiu donis al mi danĝeran legomon? Supozu ke, se mi mergus ĝin en bolantan akvon, la aĵo aliformiĝus en monstron? Supozu ke, la aĵo multiplikiĝus subite per la sama rapideco, per kiu mikroboj multiplikiĝas... Tiam la tuta tero estus rapide invadita de avidaj detruemaj karotpolpoj...



Sed, se li estis sincera? Fakte, li povintus manĝigi min danĝeran legomon sen mia scio, ĉu ne? Kaj estintus al li pli facile agi tiel, ol igi min sopiri pri lia ĉeesto. Ĉar jes, li mankas al mi. Mi tro reagis. Li pravas, amikoj ne diras unu al alia ĉion, kion ili faras aŭ pensas. Aliflanke... se oni kaŝas antaŭ amiko ĝuste la esencon de sia vivo... ĉu tio signifas vera amikeco? Hmmm... Kion signifas la esenco de onia vivo? Ĉu aparteno al specifa loko aŭ specifa raso estas la plej grava eco, per kiu oni identigas homon? Ĉielarko estis gaja, sentema, ŝercema, sportema... Li babilis kun mi pri la terana historio, terana muziko... Ĉu ĉio, kion li ja kundividis kun mi, estas malpli grava por difini lian personecon, ol tio, kion li sekretigis? Fakte, li eĉ ne sekretigis sian devenon tro longe... Kial, fakte, aliplanedano fidu ekdekomence kaj senkondiĉe tute nekonatan teranon? Kial ni, teranoj, meritis tian fidon? Eble se mi decidus travivi similan sperton en lia planedo, mi estos eĉ pli malfidema kaj sekretema ol li, fronte al nekonataj aliplanedanoj... Kial? Oni ne povos mortigi min. Oni eĉ ne povos kapti min. Sed, kial mi fidu aliplanedanojn? Eble ili ja povas kapti min kaj utiligi por sciencaj esploroj... Kaj kiu povas certigi al mi, ke la stelkaroto ne malutilos al mia sano? Ĉu mi anoncu la policon? Ba, oni kredus, ke mi freneziĝis. Mi havas nenian pruvon pri lia vizito.

Kion mi faru? Kion mi decidu? Kion vi farus, se vi estus mi?

Yin Jiaxin (Ĉinio)



aŭtoro, Yin Jiaxin

Ŝtelado

La rakonto okazis en iu frusomero.

Ĉe vesperiĝo, li ricevis telefonvokon de la edzino, kiu diris ke ĉi-vespere ŝi ne manĝos hejme kaj revenos iom malfrue. Do post vespermanĝo li iris al ludejo de maĝango.

Tiuvespere li estis terure malbonŝanca ĉe la maĝango-ludo. Baldaŭ li jam perdis la tutan monon en sia poŝo. Ĉe lia forlaso de la ludejo, oni

proponis, ke li donu kiel garantiaĵon sian fingroringon por daŭrigi ludadon. Li ne konsentis. En lia koro, la orringo estis trezoro pli grava ol ajna aĵo. Ĉe la geedziĝo la edzino donacis al li la ringon kun sia nomo gravurita sur ĝi. Dume li al la edzino donacis oran kolieron kun granda koroforma pendaĵo, sur kiu lia nomo gravuriĝis. Li esperis, ke la amo daŭros eterne inter li kaj la edzino.

Kun malplena poŝo kaj malĝoja humoro, li ekiris al sia domo. Survoje li ĉiam pripensis kiel gajni la monon perditan en la ludejo. Sed por daŭrigi maĝangoludon bezoniĝas kapitalo. Kie kaj kiel tuj akiri ĝin?

Kiam li preterpasis la domegon de la urbetestro, li vidis, ke la tuta domo estas malluma. Li mallaŭte iris al la fenestro por spioni kaj aŭdis neniun bruon ene. Kiel ĉiu scias, ekde sia enposteniĝo, la urbetestro akceptis ŝmirmonon kaj alproprigis la publikan monon tiel multe, ke li estiĝis unu el la plej riĉaj uloj en la urbeto kaj liaj du filoj, akompanataj de sia patrino, jam iris studi en Usono. Li kredis, ke en la domo certe troviĝas multaj valoraĵoj.

Pere de la subteno de la fenestra kadro, li grimpis sur la balkonon de la dua etaĝo. Je lia ĝojo, la vitrita pordo ne estis riglita. Enŝoviĝinte en la salonon li streĉe malfermis siajn okulojn sed povis nenion vidi en malhelo. Lia koro batis rapide. Li restis senmova kun la okuloj fermitaj por sin trankviligi. Post iomete da tempo, li malfermis la okulojn kaj ĉikaŭrigardis. Subite li trovis, ke lumo elfiltrigis el sub la pordo de unu ĉambro. Lia koro preskaŭ elsaltus el la gorĝo kaj la kapo pligrandiĝus. Li intencis eskapi sed sentis rigidigon en siaj kruroj. Tre baldaŭ, lia kapo klariĝis. Li senbrue proksimiĝis al la pordo por subaŭskulti kaj aŭdis bruon de plaŭdanta akvo, kiu montris ke iu banas sin. Li aŭdace puŝmalfermis la pordon iomete. Tra la fendo li vidis, ke surplanke troviĝas multaj buloj el tualetpapero kaj du uzitaj kondomoj,

enlite vizaĝe al la muro kuŝis nuda viro ronkanta kiel mil diabloj, kaj tra la opaka vitro videblis la silueto de virino bananta sin. La plej okulfrapaj estis brilaj dika kolĉeno, ora koliero kaj ringego sur la litŝranko. Li riskeme paŝis sur la pintoj de la piedoj al ĝi. Kun la valoraĵoj en sia mano, li elglitis el la dormoĉambro, descendis laŭ la ŝtuparo kaj haste forlasis la domegon.

Kun eksciteco kaj streĉiteco, li flugrapide revenis hejmen. Post kelka tempo li finfine trankviliĝis. Do li komencis ekzameni la ŝtelitaĵojn. Ho ve, Ĉielo! Kion li jam trovis sur la koroforma pendaĵo de la ora koliero? Sur ĝi gravurita estas lia propra nomo!



esperantigita de **Paula Adúriz** (Hispanio)

Laimundas Abromas (Litovio)



La nesolvita demando

Por ke ĝuste kompreni tiun ĉi rakonton, oni devas komenci ekde la komenco. Kondiĉe, kompreneble, neniu scias, kio estas tiu komenco kaj kiam ĝi komenciĝis. Des pli, ke ĉiun historion oni povas reverki kiel oni volas.

aŭtoro, Laimundas Abromas

Ĉiu nova fenomeno, afero, novaĵo, neatendite aperanta en la vivo, nin timigas, mirigas kaj konfuzigas. Scivolemaj kiel etaj infanoj ni rapidas serĉi la kondiĉojn kaj kaŭzojn de tiu fenomeno, ĝian necesecon kaj ĝiajn eblecojn. Kaj ni forgesas tute senkaŭze, ke ĉiu afero, ĉiu fenomeno posedas la rajton libere funkcii, spite al la eksteraj incitoj kaj opinio de ĉirkaŭantoj.

Jen UEA. Tiuj debatoj, tiuj diskutoj, tiuj disputoj, tiuj ŝaŭmantaj kvereloj, tiuj unuflankaj malsanaj justeco, vero, deliroj... Tiuj provincaj profetoj, filozofoj – amatoj, politikistoj – aŭtodidaktoj, per la bastono svingantaj sanktuloj de UEA! Kiomlonge tio daŭros? En UEA-oficejo oni parolas la saman lingvon, Esperanton, tamen oni ne komprenas unu la alian. Oni parolas longe kaj ne memoras en la fino, pri kio oni parolis komence. La parolado devas simili la virinan robon, ĝi devas esti sufiĉe longa, por ke ŝirmu kaj sufiĉe kurta, por ke atenton kaptu.

Estis tempo, kiam en nia Esperanto-klubo aktivis du esperantistoj, veteranoj: Mikaelo, kiu poreterne forlasis tiun ĉi mondon pasintjare kaj Salamono. Li ankoraŭ nun estas forta kiel kverka branĉo. Salamono aĝas pli ol naŭdek jarojn, kaj tion indas atenti, ĉar mi provos kompari.

Mikaelo kaj Salamono estis miaj najbaroj kaj mi preskaŭ ĉiutage ilin vidis sur la benko sidantajn, sub la kverko. Ĝi staris antaŭ la fenestro de mia loĝejo.

Kiomgrade pli bonas la najbaro ol televidilo? Tiom, ke kun la najbaro oni povas interŝanĝi opiniojn, sperton. Kun televidilo – ne. Krome, televidilon vi povas elŝalti, sed najbaro povas „elŝalti“ vin. Tiucele la televidilo estas pli bona... Do, tamen mi deflankiĝis, pardonon.

Miaj najbaroj Mikaelo kaj Salamono estis kvietaj, trankvilaj homoj, ili metodikon de la forto neniam praktikis. Salamono estis fininta universitaton kaj iam instruis

aliajn, kaj Mikaelo nenion estis komencinta, sed multon fininta. Tamen ili estis memstaraj. Kaj ne parolu pri ili tiuj, kiuj ne konas ilin. Foje mi observis ilin. Mikaelo kaj Salamono interparolis sub la kverko, sidante sur la benko. Ili ofte tiel pasigis la tempon, sidante vidalvide la sunon kaj soife sorbante vivigajn radiojn. Ili rememoris la junecajn tagojn, solvis nuntempajn problemojn, interŝanĝis opiniojn, impresojn. Ĉirkaŭis ilin la mondo, urbo, familioj, zorgoj, vivo. Ĉio, kiel oni diras...

Post duonlitro, kompreneble ne da akvo, Salamono diras „...skes..., ...fiskes...“ Tio estas ĉio, kion oni povas kompreni. Ĉio alia – nur gestoj kaj ne klaraj sonoj. La senzorga svingo permane – ĉio klaras, ĉio bagatelas „...skes..., ...fiskes...“. Kion parolas Mikaelo, ĝenerale ne klaras. El lia buŝo penetras siblantaj, ĉirpantaj sonoj kaj salivo, la okuloj liaj ĝoje radias, vizaĝo lia ruĝiĝas. Li ion klarigas, ion rakontas, juĝas, argumentas kaj finfine pruvus: disetendas la manojn kaj ridas. Salamono klinadas la kapon, „...skes..., ...fiskes...“, svingas permane, li ĉion komprenis, pri ĉio konsentas, ĉu ne „...skes..., ...fiskes...“, ankaŭ ridas. Ĉio tute klaras, tieldire... Mikaelo komencas klarigi ankoraŭfoje. Por ke estu pli klare. Definitive. La miksaĵo de iaj primitivaj sonoj kaj rido. La pralingvo. Li gestadas, frapas per fingro, ŝprucas salivon, siblas, liaj okuloj radias, lia vizaĝo ruĝiĝas. Por ambaŭ ĉio absolute klaras, „...skes..., ...fiskes...“, ambaŭ balancas la kapojn, svingas per manoj, ridadas. Ĉirkaŭe tiun ilian paroladon neniuj komprenas. Nek sobraj, nek ebriaj. Ekzemple preterpaŝantoj. Por preterpaŝanto malpli facilas, ĉar li konas nek Salamonon, nek Mikaelon. Tamen samideanoj inter si perfekte interkompreniĝas...

Kiam mi ekvidas Salamonon, la rideto tiklas mian animon, kaj tuj mi rememoras Mikaelon. Mi vidas du virtajn, justajn homojn. La diferenco inter Salamono kaj Mikaelo kaj tiuj disputoj kaj kvereloj ene de UEA estraro estas en tio, ke tiuj du virtaj viroj, interparolante en la nekonata lingvo, perfekte interkompreniĝas kaj neniam interkoleras. Sed tiuj en UEA estraro, parolante inter si la komunan lingvon, por ĉiu kompreneblan, unu la alian neniel komprenas.

La demando, ĉu estas bezonata la komuna lingvo, restas ne solvita. Tamen ne pri tio mi demandas. Mia moralo estas alia – ne en la vortoj esenco kernas. Ne pro tio mi verkis tiun ĉi rakonton, por ke kalumniu, malrespektu UEA estraron. Mi volas diri jen kion. Observante iujn ajn aferojn, ekrigardu, karulo, la fenomenon kaj objektojn de alia vidpunkto, el alia angulo kaj vi ekvidos, kiel statas la afero ververe. Kiel oni diras, necesas observi la aferon per aliulaj okuloj. Povas esti, ke tiam vi sukcesos ekvidi veron.

Ĝis mi estis etulo, mi neniam riproĉis, kontraŭstaris. Tiam mi nur dormis, manĝinte denove dormis. Tiam por mi ĉio taŭgis. Do jen, kiam mi plenkreskis, komencis ĉirkaŭrigardi kaj ne plu esti indiferenta, mi komencis kompreni ĉion kaj por mi ne plu ĉio plaĉis. Tiam mi estis konsterniĝinta pro miaj satanaj intencoj, kaj sincere abomenis pro la senfina, kaj verŝajne ne plu riparebla, la difektiĝo de mia karaktero. Tiam definitive mi perdis esperon. Tamen ankaŭ mi estas bona, rekta kiel tanka tubo.

※

Mo Yan (1955-)



aŭtoro, Mo Yan

Sekiĝinta rivero

ĉina moderna verkisto, Nobel-premiito

pri literaturo en 2012

Kiam el la vasta sovaĝejo en krepuska nebulo leviĝas kolosa ruĝa luno gutanta je akveroj en la orienta flanko de la vilaĝo, la fumo ŝvebanta en la vilaĝo des pli densiĝis, kaj ŝajne ĉio estis farbita per freŝe kaj triste ruĝa koloro de la luno. Tiumomente la suno ĵus sinkis kaj longa rubando da purpuraj nuboj ankoraŭ restis ĉe la horizonto. Kelkaj malgrasaj kaj etaj steloj provizore ĵetis triste palan lumon inter la suno kaj la luno. Mistera etoso regis en la vilaĝo: hundoj ne bojas, katoj nek miaŭas, anseroj kaj anasoj ĉiuj mutas. Dum tiu momento, kiam la luno leviĝis, suno sinkis kaj steloj perdis la lumon. Infano elŝoviĝis el la duone fermita pordo el plektitaj branĉoj kaj apenaŭ forlasinte la pordon, tuj turnis sin fantomeca griza ombro, kiu leĝere flose leviĝis. Laŭ la digo malantaŭ la vilaĝo li facile ŝvebis. Sub la digo anhele sonis la velkinta herbo kaj nigre flavaj falfolioj de salikoj kaj poploj. Li iris malrapide, kaj en la delikataj sonoj de kreviĝintaj velkaj herbo kaj folioj, saltete suriris la digon, kie li kaŭriĝis en la vualanta ombro pli granda ol lia korpo. Ĝis la sekvanta mateno li kuntiriĝinte dormis ĉe la riverfundo kiel rano inter la batataj sarmantoj kaj ronde ĉirkaŭ li rigardis lin la vilaĝanoj, plejmulto el kiuj ne sciis lian aĝon kaj malmultaj el kiuj sciis lian nomon. Tiutempe liaj gepatroj kun rigidaj okuloj kiel tiuj de fiŝoj ne povis respondi precize la demandojn elmetitajn de la vilaĝanoj pri la infano. Tiu estis nigre malgrasa, larĝbuŝa, mallongnaza, kaj lia rigardo tiel elasta kaj riĉa, ke li ne konis malsanon. Li tre lertis grimpi la arbon. La sekvan matenon li turnis sian pugon kontraŭ la komence leviĝanta suno, kun la vizaĝo kaŝiĝanta profunde en la batataj plantaĵoj. La vilaĝanoj, kun vizaĝo triste dezerteca, rigardis lin, kies pugo estis iom pli hela ol liaj aliaj korppartoj. Tiu pugo plenis je vundaj cikatroj kaj ankaŭ je sunlumo. Vidante ĝin, la vilaĝanoj ŝajne rigardis serenon vizaĝon, ŝajne rigardis min mem.

Kaŭrante sur la digo, li metis siajn manojn en kurbojn de kruroj kun la mentono apogita sur la pintiĝintaj genuoj. Li sentis, ke lia koro ŝajnas kvazaŭ akvorato sible kuras jen en la gorĝo jen en la ventro jen al la kvar membroj. Ŝajnis, ke en lia korpo troviĝis facile traireblaj truoj por ratoj kaj lia koro, kiel rato povis laŭvole gliti tien kaj ĉi tien. La luno daŭre leviĝis, ankoraŭ gutanta per akveroj. En la vilaĝo la aero nek el fumo nek el nebulo ekspansiis eksteren kaj, leviĝante senĉese, vualis sub ĝi ĉiujn domojn. La alte granda poplo etendis ŝian pinton en la nebulan aeron, kaj ĝia rekta trunko similis al la tenilo de ombrelo kaj la aero similis al ombrelo aŭ ĉapelo aŭ baldakeno aŭ venena fungo. Ĉiuj arboj en la vilaĝo tenis sin malsuperaĵoj, ne kuraĝante superatingi la altecon de la poplo, kiu fiere enŝovis sin en la ĉielon. Inter ĝiaj branĉoj altaj dudek metrojn super la tero sidis maso da splitoj en malordo, kie mikse loĝis pigoj kaj korvoj, kiuj kvereladis ĉiutage, aŭ kvake kriis sub la brila luno.

Probable kaŭrante sur la digo volvita de maso da ombro, li eligis plorsingultajn sonojn el sia soifa gorĝo, ŝajne rememorante pri la afero, kiu ĵus forpasis. Tiam kun loza veŝto sur la korpo li nudpiede staris sub la poplo. Antaŭ la arbo vicis kvin domoj kun tegoloj, ununuraj en la vilaĝo, kie loĝis tre bela knabino kun paro da okuloj gagate nigraj okuloj, kiel du nigraj ŝakpecoj.

La knabino demandis al li, “Tigrido, ĉu vi povas surgrimpi ĉi poplon?”

Li stupore rigardis ŝin. Lia buŝo iom tordiĝis, tiel ke lia mallonga nazo pleniĝis je sulketoj.

“Vi ne povas surgrimpi ĝin, mi certas, ke vi ne povas!”

Li mordis la diketajn lipojn per dentoj.

“Ĉu vi povas deŝiri branĉon por mi? Mi volas tiun branĉon. Ĉu vi vidas ĝin? Tiun rektan. Mi volas fari per tranĉilo pistolon el ĝi, kaj poste ni ludos kune. Vi ludos rolon de spiono, kaj mi de soldato.”

Li forte ekskuis la kapon.

“Mi ja certas, ke vi ne povas. Vi ne estas Tigrido, vi estas maljuna porkido!” la knabino diris indigne, “kaj poste mi ne ludos kun vi.”

Li rigardis ŝin per brilaj kaj nigraj okuloj, kun la buŝo tordita, ŝajne volante esplori. Fine, frotante la teron per piedo li seke diris, “Mi povas iri supren.”

“Ĉu vere?” ŝi demandis surprizite kun ĝojo.

Li forte ekbalancis la kapon. Demetinte la lozan veŝton, li nudigis sian helverdan ventron. Li diris, “Gvatu la venanton, ĉar miaj familianoj ne permesas al mi surgrimpi arbon.”

Transpreninte la veŝton, ŝi lojale ekbalancis la kapon.

Li ekis grimpi, ĉirkaŭprenante la arbon per piedoj, kiuj kun dika kalo firme alkoĉiĝis al la trunko, ne permesante ioman glitadon. Kiel kato li grimpis facilmove kun denaska lerteco. La knabino, prenante lian vestaĵon en la sino, rigardis kun levita

kapo la poplon malrapide kliniĝi, malrapide fali al ŝi mem. En tranco ŝi viziis, ke la nudtorsa kaj nudpieda knabo per sia pezo fleksas kiel pafarkon la arbon, kiu ĉiunomente povus lin katapulti. Sub la arbo la knabino jen kaj jen tremis. Poste ŝi vidis, ke la arbo abrupte rektiĝas. En la iompostiome oblikviĝinta sunlumo de la profunda aŭtuno blankaj branĉoj de la poplo vibre kuniĝas supren kaj plektras la bluetan aeron. En la glaciece pura ĉielo flirtas are la mincaj kaj densaj poplaj branĉoj, kaj la sporadaj restantaj poplaj folioj, ŝajne velkintaj, sed ankoraŭ ne perdas la malhelan bluan, susurante en la svingado de branĉoj kaj folioj. Tiuj mirindaj movoj de la poplo konfuzis ŝiajn okulojn. Ŝi vidis, ke glimas la brileto de korvaj flugiloj sur la nigreta spino de la knabo, kiu grimpas pli kaj pli alten.

“Tuj malsupreniru, Tigrido. La arbo baldaŭ falos!” kriis la knabino al la knabo, kiu jam engrimpis en la poplan kronon kun maldensaj frondoj. Inter la branĉoj navede flugis pigoj kaj korvoj, kiel enorma grupo da abeloj, kiel aro da mornaj papilioj.

“La arbo tuj disrompiĝos!” La knabina krio similis al fajreroj, kiuj bruligis lian pugon, tiel ke li pli rapide grimpis supren. La malbonodora ventblovo estigita pro flugilsvingado de pigoj kaj korvoj penetris en lian kolon kaj li sentis atakojn da malvarmo en la spino. Ŝiaj krioj atentigis lin kaj ankaŭ li sentis, ke la arba trunko, maldika kaj malforte supla, ekstreme fleksiĝas kaj la glacisimila ĉielo turniĝas oblikve. Sur lia suro muskolo saltetis, kaj malleviste la kapon li klare vidis tiun saltetantan muskolon. Ĝuste tiunomente li aŭdis ŝian krimon, “Tigrido, malsupren! La arbo sin klinas. Se ĝi kliniĝos al nia tegoltegmenta domo kaj dispecigos la tegolojn, mia panjo donos batojn al vi!”

Ĉe tio li stuporiĝis. Li premis sian korpon al la trunkon kaj direktis sian rigardon malsupren. Kun subita vertiĝo li mire trovis, ke li grimpis eĉ tiom alte. La poplo plej altis super ĉiuj arboj en la vilaĝo, kvazaŭ gruo staranta inter kokoj. Sur la arbo li sentis svarmon de feliĉa sento: ĉiuj domoj troviĝas sub lia pugo, ankaŭ la suno, kiu sinkas tre rapide, sed ne rondas, kiel granda anasovo. Li vidis, ke sur la pajltegmentaj kabanoj proksimaj kaj malproksimaj putrinta pajlo aspektas glate pro pluva vipbatado kaj restas musko kreskinta en la somero plene punktataj per birdaj fekaĵoj, ke verda aŭto kuras sur la strato kun dika tavolo da polvo kaj kirle levas ĝisĉielan nubon da polvo, kiu malaperas post longa tempo, kaj ke post malapero de polvo flava hundeto, kies inteston elpremiĝis de la aŭta rado, ŝancele iras sur la strato, kaj ĝi trenas sian inteston kiel ŝnuron en la polvo, sen ajna bojo, irante aplombe, kaj kun la varmo el ĝiaj haroj iom post iom vanuanta, ĝi turniĝas kiel flava leporo, kiel flava rato kaj fine malaperas el la vido. Li ŝajne aŭdis siblon el malplena botelo alŝvebanta el proksime aŭ malproksime. La varmo kaj malvarmo de la mondo ŝmiriĝis sur la objektojn pecon post peco. Sur la arbo li sentis duonan varmon kaj duonan malvarmon. Kiel aŭtuna cikado li tremadis, vidante grajnon da birda fekaĵo fali rekte

al la tegoltegmento. La knabino kriis al li de malsupre kaj li ne obeis al ŝi. Tremante, li rigardis la korton antaŭ la pajltegmenta domo, la korton, kiun li neniam vidus, se li ne grimpus sur la poplon. Kvankam la gagatokula knabino ofte volas ludi kun li, liaj gepatroj ripetade admonis al li, ke li ne ludu en la hejmo de Xiao Zhen. Ĉu tiu knabino nomiĝas Xiao Zhen? Li demandis al si perplekse. Li ĉiam tenas sin konfuzita en menso kaj la vilaĝanoj diris, ke li estas simplanima. En la korto troviĝas larĝa masonita pavimo, staras ekranmuro, ĉe kiu velkis la folioj de dorna pruno kaj restas nur pupurruĝaj lianoj, kaj troviĝas du bicikloj, kies nikelitaj radringoj blinkas, blindige al liaj okuloj. Alta dikulo eliris el la domo kaj laŭvole pisis ĉe la piedo de la muro. Kiam la knabo vidis lian purpourruĝan vizaĝon, li firme premis sin al la trunko pro teruro, retenante sian spiron. Tiu dikulo iam demandis al li, pinĉante lian orelon, “Tigrido, kiom da kruroj unu hundo havas?” Li forte tordis sian buŝon, dirante, “Tri!” Ĉiuj apudstarantoj eksplodis per ridego. Li ankoraŭ memoras, ke tiam en la homamaso lia pliaĝa frato ruĝiĝis ĝis la orelo kaj lia patro embarase ridis kune kun aliaj ridantoj. Pro tio la frato volis lin bati, sed la patro retenis lin, dirante, “La vilaĝa sekretario voluntas inciteti lin. Tio signifas, ke li akordas kun ni kaj havas nin en siaj okuloj.”

La pliaĝa frato malstreĉis sian kaptantan manon je li kaj ŝovis en lian buŝon brile brunan batatkukon, demandante al li kolere, “Kio ĝi estas?”

Tigrido respondis el inter siaj dentoj, “Hunda fekaĵo!”

La knabino kriis sub la arbo, “Rapidu, Tigrido!”

Li tamen malrapide grimpis supren. Tiam liaj kruroj forte tremis. Subite densa blanka fumo vomiĝis el la kamentubo de la domo sub la arbo. Strioj da densa fumo soris inter la fendoj de la branĉoj kaj en neston de pigoj kaj korvoj. En la nesto malpuraj plumoj turniĝadis kaj la nigraj birdoj farbita per ruĝa sunlumo flugis ĉirkaŭ li, gake kriante. Prenante diketan branĉon per la mano, li forte fleksis ĝin, tiel ke la tuta arbo skuiĝis, sed ĝi ne derompiĝis.

“Forte tiru ĝin,” kriis la knabino, “la arbo ne falos. Ĝi klinas sin de flanko al flanko, donante nur timigan impreson.”

Li forte tiris la branĉon kaj la branĉforko fleksiĝis plu kaj plu, ĝuste kiel pafarko. Liaj brakoj ekhavis senton de formikado kaj la fingropintoj sentis sin ŝvelante. La arbo rifuzis derompiĝi kaj abrupte risortiĝis. Liaj kruroj des pli tremis kaj lia kapo peze malleviĝis. Kun kapo levita ŝi rigardis lin. La fumo ondis supren el sub la arbo. Li sentis sin malvarme tra la korpo kaj du kapharoj sible hirtiĝis. Li refoje sentis, ke li grimpas supren tiel alten. Tiu rekta kaj glita branĉo ankoraŭ fiere sin etendis, ŝajne defiante lin. Krucante siajn krurojn, li etendis siajn manojn, tenis la branĉforkon kaj tiris ĝin malsupren. La branĉforko kriis sible kaj maldikaj branĉoj sur la arbpinto klake kunfrapiĝis kun aliaj branĉoj. Li premis la pezon de la korpo kaj la tutan fortan

sur la branĉforkon, kaj jam tute forgesis la ekziston de du kruroj, kvankam ili ankoraŭ kroĉiĝis al la trunko. Ju pli la branĉforko fleksiĝis, des pli da malamo li kovis en la koro. Kun mallaŭta krio li transsaltis kaj la branĉforko derompiĝis. La sonora sono de derompiĝo de la branĉforko eksaltigis plezure tendenon en lia kranio kaj lia tuta korpo mergiĝis en la sento de ĝojo. Lia korpo leĝere ekflugis kune kun tiu longa branĉforko. Friska aero, blanka kuirfumo kaj oranĝkolora sunlumo kirliĝis kaj turniĝadis ĉirkaŭ lia korpo. En hastemo li subite trovis, ke virino kun kolora vatita vesto elkuras el la tegoltegmenta domo, kiu jam fariĝis plata en liaj okuloj, kaj ŝi kriis ĉevale.

La knabino estis rigardanta al la arbo kaj ŝi subite trovis, ke la knabo pendas sur tiu branĉforko, kiel grasa frukto. Ŝi imagis, ke li certe sin sentas tre komforta, kaj ŝi enviis lin ekstreme, volante esti pendigita ankaŭ sur la branĉforko. Tuj okazis ŝanĝiĝo. La knabo lante falis kune kun la branĉo. Ŝi vidis, ke lia korpo plilongiĝas, kvazaŭ malfaldita rubando de bruna sateno rekte pendigita el la arba pinto. La branĉforko, kiun ŝi elektis, vipadis brue la satenrubandon. Kun lia vestaĵo en la sino ŝi faris paŝon antaŭen kaj abrupte ŝi sentis, ke mola branĉo ekvipas ŝian vangon, kaj tiu bruna satenrubando falas sur ŝian korpon. En ŝia konscio la satenrubando malmolas kiel ŝtono, kiu eligas bruon de ekfrapo sur lado.

Ne sciante, kio okazis, li stariĝis el la tero, sentante sin bona, krom kun iom da doloro en aparta parto de la korpo. Tamen li tuj vidis, ke la knabino kuŝas sub branĉoj, kun duone fermitaj nigraj okuloj, kaj strio da blua sango malrapide fluas el ŝia buŝangulo. Li genuiĝis, ŝovis sian manon inter branĉojn kaj malpeze ektuŝis ŝian vizaĝon malmolan kiel aerplenigitan pilkon.

La virino surportante koloran vatitan veston fluge kuris al la malantaŭo de la domo kaj sakris, “Malbonuleto, ĉu vi povus flugi al la ĉielo? Kian idaĉon via gepatroj produktis? Vi derompis unu branĉon de mia hejmo kaj mi derompos unu ripon de vi!”

Kun kolero ŝi minace sin ĵetis antaŭ la genuantan knabon, kaj apenaŭ sia piedo atingis lian spinon, ĝi falis senforta. Kun okuloj rigidigintaj kaj buŝo oblikve tordita ŝi sin ĵetis sur la korpon de la knabino, kriante, “Zhennjo, Zhennjo, mia infano, kio okazis al vi...”

...Kato kun tigrega striita felo suriris la digsupron, tretante velkintan herbon per siaj karnoriĉaj piedetoj preskaŭ sensone. Ĝi surprizite staris antaŭ la knabo, ronronante feroce kun verda lumo pafata el la okuloj kaj la vosto stariĝanta rekte kiel masto. Li timeme ĝin rigardis. Ĝi ne foriris, flarante la odoron de sango eliĝantan el lia korpo. Ne eltenante la premantan rigardon de ĝiaj fosforeskantaj okuloj, li malfacile stariĝis.

La luno leviĝis jam tre alte, sed ne tre klare ankoraŭ kun aspekto akvogutanta, kaj en la okcidenta flanko de la ĉielo la steloj disverŝis diamantecan brilon. La tuta vilaĝo vualigis per fumeska kaj nebuleska aero. Sen turni sian kapon, li sciis, ke nur la poplo inter la arboj de la vilaĝo povas etendi pecon de sia pinto super la nebulo, kvazaŭ arbo en inundo. Ekspensante pri la poplo, li sentis acidecon en la nazo. Li zorgeme ĉirkaŭiris la imponan sovaĝan katon kaj ŝancelpaŝe iris en la sekiĝintan riveron. En ĝi regis malklara arĝentgriza koloro, kiu ne estis akvo, sed sterniĝantaj sablo kaj koto. Jam okazis sekegeco tri sinsekvajn jarojn. En la rivero staris stakoj de sekaj pajlamasoj. La kato malantaŭ lia dorso krisis kontraŭ li, sed li ne havis humoron doni atenton al ĝi. Tretante sur la varman sablon, li restigis paŝospurojn. La varmo de la sablo rampis colon post colo supren, komence dike kaj forte, kaj fine nur kiel unu fadeno de araneaĵo, kiu ŝajne laŭ la medolo rekte ŝoviĝis en la cerbon. Li jam ne certiĝis, kie lia korpo troviĝas, kaj lia tuta homo fariĝis svaga maso kiel netuŝebla malhela ombro en la medio varmega kaj pika.

Kiam li stumble falis en sablan foston, la luno senĉese tremadis kaj disverŝis sangsimilan brileton sur lian nudan dorson. Li kuŝis surventre sen forto moviĝi, sentante, ke la lunlumo, kiel ardanta brulstampilo, brogas lian dorson kaj odoro de bruligita porkfelo atakas lian nazon.

La virino en flordeseignita vatita vesto ne batis lin, sed ŝi nur plore zorgis pri sia trezora filino. Aŭskultante la panikigan ploron de la virino, li konsterniĝis pro teruro, konsciante, ke li jam faris kulpon. Li vidis altan dikulon kun ruĝa vizaĝo impeti al li, kaj eksonis zumo en liaj oreloj, kaj poste ĉio sin trovis en ordo, kiel trankviligitaj ondoj. Ŝajnis, ke li estis kovrita sub vintra volbsimila kloŝo kaj ekster ĝi aro kaj aro da homoj svarme kuris hasteme kaj pelmele, kvazaŭ por estingi fajregon aŭ sturmi, kriante sen voĉo aŭdita de li. Li vidis du fortikajn krurojn moviĝi kaj du ledŝuoj sin direktis al lia brusto. Poste li aŭdis, ke rano en lia ventro donas kvakon, kaj lia korpo refoje flugis leĝere. Odoro de sango svarmis al lia gorĝo. Li eligis nur unu sonon de ploro, kiam li ekpensis pri la flava hundeto, kiu marŝis trenante sian inteston en la polvo sur strato. Kial la hundeto eligas nenium bojon? Li cerbumis ripetfoje. La ledŝuoj senĉese kapturnigis lin. Li malklare sentis, ke lia intesto elfalas kiel la hundeto kaj la intesto gluiĝis per orkolora koto. La branĉforko, kiun li derompis kun granda peno, ankaŭ ekflugis, kaj la molaj kaj elastaj branĉoj kiel ledaj rubandetoj vente muĝis kaj ŝprucis pecon post peco. Freŝa suko de poplo disvastiĝis sur liaj lipoj. Komence li turniĝadis sur la sabla tero kaj poste li mordis la grundon senmove.

La sabla grundo iom post iom malvarmiĝis kaj ankaŭ la temperaturo de lia korpo malpliigis. Li kuŝis kun la vizaĝo al la tero kaj subtilaj sableroj senĉese ensorbis en liajn naztruojn. Li tre volus ekmoviĝi, sed li ne sciis, kie troviĝas lia korpo, kaj li pene serĉis kie liaj kvar membroj kuŝas. Kaj fine li unue ekpensis pri siaj brakoj. Li

penis levi la brakojn, kaj lia kolo ŝajne derompiĝis kaj liaj kol-ostoj klakadis. Li peze kuŝis surventre denove, kun sabla koto en la tuta buŝo kaj rigidiĝinta lango. Englutinte sablan koton trifoje, li fine sukcesis turni sian korpon. Tiam li amare rigardis al la stelplena ĉielo. La luno jam situis en la sudo, kaj perdinte la sangan koloron, fariĝis brile luma. La malhela ĉielo iĝis bele arĝentgriza. En la sablo de la sekiĝinta rivero glimis oreca lumo, kiu estis malvarma kaj ĉirkaŭis lin de ĉiuj flankoj, pikante lin ŝajne per tranĉiletoj. Li help-pete rigardis la solean lunon, kiu prilumis lin. La vizaĝo de la luno tre palis, sed la ombraj makuloj en ĝi sin montris tre klaraj. Li ankoraŭ ne rigardis la lunon tiom zorgeme, en kiu tiu ombro tre mirigis lin. Li sentis ĝin tre fremda, kaj ferminte siajn okuloj, li tuj forgesis ĝin. Li penis ekpensi pri la luno, sed la vizaĝo de lia patro riveligis en la pala luno.

Ĝis hodiaŭ li ekkonis, kiel aspektas lia patro, kiu havis du ŝvelintajn okuloj, kies globetoj ŝajnis piroj maceritaj en sala akvo. Eble tiuj ledŝuoj lin piedbatis, eble ne. Genuante, la patro petegis, “Sekretario, ne zorgu pri tiu hundido. Mi certe batos lin perforte. Liaj dek vivoj ne egalas al unu vivo de Zhenŝjo. Se nur nenio okazos al ŝi, mi volontus fortranĉi karnon el mia korpo...” La sekretario rikanis al la patro kaj el liaj okuloj sin ĵetis ringoj da blua fumo.

La pliaĝa frato trenis la knabon al la direkto de la hejmo kaj ties kalkanoj gratis la malmolan teron. Post longa irado, ili ankoraŭ ne eliris el la ombro de la poplo. La ombro de flugantaj pigoj kaj korvoj lanuge balais lian vizaĝon.

La pliaĝa frato ĵetis lin en la korton kaj donis piedbaton al lia pugo, kriante, “Stariĝu! Vi ĉiam kaŭzas ĝenaĵojn por nia familio!”

Kuŝante sur la tero, li ne volis moviĝi. La frato forte piedbatadis lian pugon, dirante, “Stariĝu! Vi kaŭzis ĝenaĵon, sed vi konsideras, ke vi faris meriton, ĉu ne?”

Li stariĝis mirakle kaj retroiris paŝon post paŝo al la murangulo. Kiam li staris firme, li panike rigardis lian altan kaj malgrasan pliaĝan fraton.

Tiu kolere diris al sia patrino, “Lasu lin morti pro falo. Se li vivus, li servus kiel plago! Ĉi-jare mi espereble rekrutiĝos en armeo, sed nun ĉio ruiniĝis.”

La knabo triste rigardis sian patrino, kiu neniam batis lin. Kun larmoj la patrino aliris. Kun sento esti maljuste traktata, li vokis “panjo!” kaj falis liaj larmo kaj nazmuko.

Tamen la patrino feroce sakris, “Testudido! Ĉu vi ankoraŭ ploras? Ĉu vi estas maljuste traktata? Eĉ se mi batmortigus vin, mi ne povus forpeli mian rankoron al vi!”

Al lia orelo la patrino donis frapon per sia mano kun kupra fingroringo. Li eligis sekan ekkriion. Lia krio malsimila al la homa stuporigis lian patrino. Klininte sian talion, ŝi eliris sekan kotontigon el la pajlstako kaj spite me vipadis lin per ĝi, kiu sonis klake, eĉ timigante la paserojn sur la muro sin ĵeti kugle en vesperkrepuskon.

Penante apogi sin al la subono de la muro, li rigardis antaŭ siaj okuloj la ruĝajn arklinojn forlasitajn per la svingado de la kotontigo...

Malforta kokkrio alblovita el la vilaĝo vekis lin el menskonfuziteco. Lia ventro ŝajne aglomeriĝis kiel glacia maso, kiu fridigis lian tutan korpon. La luno kliniĝis al la okcidento kaj tegolsimilaj nubondoj pleniĝis en galaksio. Li volis turni sian korpon kaj eĉ sukcesis facile turni ĝin, kiu ruliĝis kiel lignoŝtipo. Kompreneble li ne sciis, ke li ruliĝas sur dekliveto, kie troviĝis povre malgranda amaso da batataj sarmentoj. La purpuraj batataj sarmentoj odoris iom je amareco kaj sur ili grupo da jujukern-grandaj lampiroj rampis kaj flugis en liaj okuloj kaj oreloj.

La patro ŝancelpaŝe aliris, kaj la patrino, kun la kontontigo kalvigita pro batado en la mano, malrapide retiriĝis flanken.

“Damne, stariĝu!” ekkriis kolere la patro.

La knabo pene retiris sian korpon malantaŭen, klakigante la batatajn sarmentojn. Lunlumo kovris la teron. En la sekiĝinta rivero kuŝis tavolo da glacia prujno, kaj pajlstakoj en ĝi ŝajnis bastionoj dismetitaj malorde. Dolĉa kaj sangodora likvaĵo ree svarmis al lia gorgo. Li kontraŭvole larĝe malfermis sian buŝon kaj vomis pecon kaj pecon da kazeiĝintaj pastecaj buloj, kiuj ĉe lia buŝo tre ŝajnis grajnoj da kata fekaĵo, kiun li iam vidis. Li multe konsterniĝis, kaj malklare videblis antaŭsigno.

Okazis, ke juna edzino kun maldikaj kaj longaj brovoj kuŝis sur fragmita mato kaj ŝia vizaĝo purpuris kiel viola petalo. Apud ŝi kelkaj homoj kantis plore. La juna edzino estis tre bela. Kiam ŝi vivis, ŝi belis kiel floro, kaj kiam ŝi mortis, ŝi des pli belis kiel floro. Li kune kun amaso da homoj enpuŝis sin por spekti la bruplenan scenon. Tie estis vaka domo, sur kies trabo ankoraŭ pendis ruĝa tali-zono. La vizaĝo de la mortintino aspektis trankvile kaj kviete, kaj ŝiaj okuloj rifuzis al ĉiuj vivantoj eniri. Kiam la ruĝvizaĝa sekretario de la produktbrigado larmante venis pririgardi la mortintinon, ĉiuj rapide cedis vojon al li. Kiam la sekretario, kun okuloj plenaj je larmoj, staris antaŭ la kadavro de la juna edzino, subite disfloris serena rideto sur ŝia vizaĝo kaj ŝiaj brovoj moviĝis kiel la hirunda vosto. La sekretario tuj kolapsis kaj falis sur la teron kaj travidebla likvaĵo elfluis tra lia korpo. Oni diris, ke la juna edzino mortis tre bedaŭrinde. Kiam ŝi vivis, ŝi ne vekis atenton de la aliaj, sed kiam ŝi mortis, eĉ la sekretario alvenis. Videble la morto ne estis malbona afero. La knabo tiam konsideris, ke la morto estas tre atentokapta afero. Post kiam li eliris, kune kun la malordaj homoj, el la malplena domo, li baldaŭ forgesis la junan edzinon kaj morton. Nun la juna edzino, morto kaj tiu flava hundeto malklare alvenis senplendeme laŭ la riverfundo kovrita de arĝenta brilo. Li jam aŭdis iliajn malordajn paŝojn kaj vidis iliajn nigrajn grandajn flugilojn.

Vidinte tiujn flugilojn, li tuj venis al la kompreno, kio okazis al li. Li vidis, ke tretante sur la glacian prujnon, li mem ir-reiras en la riverakvo, kie aroj da angiloj,

kiel vermiĉeloj, glitas tien kaj reen. Li forte dispuŝas la angilojn kaj falas en glazure nigran kaj lumplenan domon. Nordaj ventblovoj trudeme penetras tra mus-truoj, kamentubo kaj murfendetoj. Kun kolero li rigardas tiun orkoloran mondon. Sunlumo de la frosta vintro filtriĝas tra fenestropaperoj kaj prilumas mason de subtilaj sableroj sur la terlito. Li falas sur la malsekan sablan koton kaj gluiĝas per sableroj. Li pene ploras por la frosto de la homa mondo. La patro diris, “Damna plora krio, damna plora krio. De la naskiĝo vi povas plore krei!” Aŭdinte tiujn vortojn li des pli sentis sin ĝisoste malvarma. Lia korpo, kiel silkraŭpo, kiu elvomas silkon, ŝrumpis pli kaj pli malgranda kaj plenis je sulketoj.

Dum tiu tempo de hieraŭa posttagemezo, kiam li tremanta apogis sin al la kota muro de sia hejmo, li vidis la patron aliri paŝon post paŝo. La subiranta suno prilumis la altan korpon de la patro kaj lian tristan mienon. Li vidis, ke la patro, kun unu piedo en ŝuo kaj la alia nuda, malfirme aliras. Kun unu ŝuo en la maldekstra mano, la patro senpene levprenis lian kolon per la dekstra kaj forte lin ĵetis. Li sentis, ke li flugas en la aero la trian fojon. Li kapturniĝeme stariĝis, kaj trovis, ke lia patro havas pli altan kaj grandan korpon kaj lia longa ombro kovras la tutan korton. Liaj patro kaj pliaĝa frato ŝajnis homoj eltonditaj el kartono, tremantaj en sangruĝa lumo de la vespera suno. La unua bato de la dika plandumo de la toĥsuo de la patrino falis sur lian verton kaj preskaŭ enbatis lian kolon en la bruston. Pli da batoj per la malnova toĥsuo falis sur lian dorson, jen rapide jen malrapide. Ĝia plandumo fariĝis pli kaj pli maldika kaj kotpecoj disen flugis.

“Ke mi batus vin ĝis morto, tio ne povus forigi mian rankoron! Bastardo, veras, ke ĉiam restas malamo inter patro kaj filo,” la patro diris trist-tone. Dirante, li ne ĉesis bati. La maldikiĝinta plandumo batanta sur lia gluecan spinon eligis pli kaj pli sonorajn sonojn. Li indignis, ke li ne plu povis elteni kaj lia koro rigidiĝis kiel fera bulo. Li naskis deziron ekparoli kaj ĝi fariĝis pli kaj pli intensa pro batado de la patro. Li aŭdis sin krei histerie, “Hunda fekaĵo!”

La patro ŝtoniĝis kaj la ŝuo sensone falis sur la teron. Li vidis verdajn larmojn plene en liaj okuloj kaj liajn angiojn sur lia kolo moviĝi kiel verdaj vermoj. Tra inter la dentoj li ejakulis kontraŭ sia patro, “Fetora hundfekaĵo!” Grumblinte mallaŭte, la patro deprenis rigidan jutŝnuron el de la tegmentrando, trempis ĝin en la salan peklaĵon dum kelka momento, zorgeme eltiris ĝin kaj per brakoj streĉis ĝin, laŭ kiu malpuraj akveroj gutis. “Deŝiru lian pantalonon!” la patro diris al la pliaĝa frato, kiu timtremante alnaĝis en la larĝa brunflava sunlumo. Antaŭ li la pliaĝa frato sin starigis, ne kuraĝante rigardi liajn okulojn, sed tiujn de la patro, kaj murmure diris, “Paĉjo, ne deŝiru ĝin...”

Decideme svinginte sian manon, la patro diris, “Deŝiru, alie ni batpecigos la pantalonon.” La rigardo de la frato rapide balais liajn koaguliĝinta vizaĝon kaj

fiŝostan bruston kaj fiksiĝis sur lian pantalonon. Li sin klinis. La knabo sentis glacian malvarmon inter siaj femuroj, kaj la pantalono defalis kiel nubo ĝis sub liajn piedojn. La pliaĝa frato, tenante lian maldekstran maleolon, eltiris la duonon de la pantalono, kaj tenante lian dekstran maleolon, deŝiris la tutan pantalonon. La knabo sentis, ke unu tavolo de lia haŭto estis forigita. Rigardante la figuron de lia frato malkuraĝe retiriĝi, li denove kriis laŭte, “Fetora hundfekajo!”

La patro svingis la ŝnuron, kiu dancis zigzage en la aero, kaj kiam ĝi alproksimiĝis al lia pugo, ĝi streĉiĝis firme kaj samtempe eligis sonoran klakon. Li hm-is tra la nazo kaj tiu kutima sakraĵo elŝoviĝis el inter liaj dentoj. La patro vipadis lin per ŝnuro kvardek fojojn kaj la knabo kriis kvardek fojojn. Por la lasta fojo kiam la ŝnuro falis sur lian pugon, ĝi ne streĉiĝis firme, sed zigzage kaj senforte, dum lia krio spiralis senforte, ŝajne ĝemado en la sufero. La patro ĵetis sur la teron jam senkoloriĝintan ŝnuron kaj anhele eniris la ĉambron. Ankaŭ la patrino kaj pliaĝa frato eniris. La patrino kolerplene diris al la patro, “Nu batmortigu min. Ankaŭ mi ne volas vivi. Batmortigu nin ĉiujn patrinon kaj filojn ĝismorte. Estas pli komforte por ni morti ol vivi. Estas tiu menskonfuzita patro de vi, kiu tute sciis, ke la Kompartio venos, kaj aĉetis dudek muojn da arida tero sur facile inundebla malaltaĵo, kie eĉ leporoj ne volus feki. Ĝuste pro tio nia familio estis aljuĝita al la klaso de superaj mezriĉaj kamparanoj*, tiel ke niaj tri generacioj vivas humile nek home nek fantome.” La pliaĝa frato diris, “Kial vi tiam edziniĝis al supera mezriĉa kamparano? Kial vi ne edziniĝis al homo de la klaso de malsuperaj mezriĉaj kaj malriĉaj kamparanoj?” La patrino eksplodis per trista plorego, ankaŭ la patro brue ploris. En la sonoj de plorado tiu ŝnuro tordiĝis kiel lumbriko, jen interplektite jen spirale. La knabo subite ekstreĉis sin kun ĉiu muskolo refortiĝinta. Pere de tiu revigliĝo li stariĝis kaj enpenŝiĝinte kelkajn sekundojn en la korto sub la vespera krepusko, saltete sin ĵetis al la pordo el plektitaj branĉoj kaj elŝoviĝis tra la fendo de la pordo...

Antaŭ tagiĝo li vekiĝis refoje. Li ne havis forton levi la kapon por rigardi al la palaj luno kaj riverlito. Sur la digo aŭdiĝis la trista krioj, “Tig...ri...do..., mia mal...bon...sorta in...fa...no.” Ŝiaj krioj pikis liajn ankoraŭ sentohavajn korppartojn kaj li sentis doloron kaj jukon. Sed lia koro pleniĝis je la ĝojo post venĝo. Li plenforte eligis krion. Lian bruston trafis brulvarmo kaj eksonis kreviĝo de seka paperpeco en lia sento, kaj tuj poste lin atakis neeltenebla frosto. Li eĉ aŭdis la bruon, ke li falas en la glacian truegon kaj ŝprucas sep-ok duonsolidigitajn glacipecojn, kiuj lin firme fiksas.

En la momento, kiam la skarlata suno estis leviĝonta, li vekiĝis de peza kaj sovaĝa kantvoĉo, kiu, kiel hurlanta vento en la praprimitiva arbaro, rulis sin tra la sekiĝinta riverlito, portante velkintajn branĉojn kaj putrintajn foliojn. Post la vento regis bizara kaj streĉita silento, en kiu la suno malrapide leviĝis el malantaŭ la monto

kaj abrupte ludis varma muziko. La muziko karesis lian vundoplenan pugon kaj bruligis fajrerojn en lia cerbo. Tiuj fajreroj aspektis flavaj, ruĝaj, finfine fariĝis verdaj kaj etetaj kaj saltetis blinke kelkfoje ĝis ili estingiĝis.

Kiam oni trovis lin, li jam mortis... La okuloj de liaj gepatroj stagnis kiel tiuj de fiŝoj...La vizaĝo de la vilaĝanoj tristis kiel senhoma dezerto. Ili rigardis lian sunplenan pugon...kvazaŭ serenon vizaĝon, kvazaŭ min mem...

marte de 1985

*Siatempo en la ĉina socio, influita de maldekstraj pensoj, kamparanoj estis dividitaj per bienuloj, riĉaj kamparanoj, superaj mezriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mezriĉaj kamparanoj, kaj malriĉaj kamparanoj. Inter ili nur malsuperaj mezriĉaj kaj malriĉaj kamparanoj estis bone traktitaj de la registaro kaj la aliaj klasoj de la kamparanoj estis malestimaj politike.

elĉinigis Yang Fang (Ĉinio)



ilustrita pere de AI

Mitch Albom (1959-)



Mardoj kun Morrie

*Unu maljunulo, unu junulo,
kaj plej granda leciono pri vivo*

aŭtoro, Mitch Albom

Vortoj de la tradukinto

Mi legis multegon da libroj dum mia vivo, sed sen troigo mi volas diri, ke preskaŭ neniun libro tiel kortuŝis min, kiel tiu ĉi, ke mi, ĝin legante, estas animskuata de ĝiaj vortoj, kiuj torturas mian konsciencon kaj devigas min ekzameni mian vivon, mian vivmanieron. Ekde la tago, kiam mi ĝin trovis, ĝi estas ĉiam metita ĉe mia kapkuseno kaj legata de mi ĉiunokte je kelkaj paĝoj, denove kaj refoje, kun larmoj, antaŭ ol mi endormiĝas.

Ĝi ne traktas filozofian teorion malfacile kompreneblan. Anstataŭe ĝi instruas nin kiel ami, kiel vivi, per simplaj vortoj, sen pompaj esprimoj, sen teda prediko, kaj ĝia enhavo tamen estas tiel profunda kaj emocia, ke neniun el ĝiaj legantoj povas rezisti ĝian edifan povon kaj stilan ĉarmon.

Retrorigardante sian bedaŭrindan pasintecon, oni ofte diras al si: se mi povus denove komenci mian vivon, mi... Kaj tamen, la vivo vivita ja ne povas esti revivota! Kio pasis, pasis nur! Ekde nun ni prenu tiun ĉi libron kaj legu ĝin kun pieco, per nia koro.

Tiu ĉi verko estas skribita ne speciale por maljunuloj. Fakte, kiel diras ĝia subtitolo “Unu maljunulo, unu junulo, kaj plej granda leciono pri la vivo”, ĝi estas verkita por homoj en ĉia aĝo, inkluzive de gejunuloj. Ĝi rakontas pri amo, familio, edziĝo, laboro, mono, maljuniĝo, pardono, morto kaj aliaj gravaj temoj rilate la homan vivon. Ĝi estas granda kurso pri la vivo, kiu per sia instrua influo jam vastiĝas al preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo. Ĝis nun ĝi jam estas tradukita en pli ol tridek lingvojn, kaj mi estas konvinkita, ke per mia Esperanta traduko tiu ĉi kurso certe vastiĝos ankaŭ en nian Esperantujon.

La tradukinto Wang Chongfang

La kvara mardo

Ni parolas pri morto

“Ni do komencu per tiu ĉi ideo,” Morrie diris. “Ĉiu scias, ke li nepre mortos, sed neniuj kredas tion.”

Li estis en serioza humoro ĉi-marde. La temo estis la morto, la unua vorto, kiun mi skribis sur mia listo. Antaŭ ol mi alvenis, Morrie jam skribis kelkajn notojn sur malgrandaj blankaj paperpecoj, por nenion forgesi. Lia tremeca manskribo estas nun nedecifrebla por ĉiu alia krom li mem. Estis preskaŭ Laborfestoj (la 1-a lundo de septembro — noto de tradukanto), kaj tra la kabineta fenestro mi povis vidi la spinace verdajn heĝojn de la korto post lia domo kaj aŭdi la kriojn de la infanoj, kiuj ludis sur la strato, profitante de sia lasta semajno da libereco antaŭ la reveno al la lernejo.

En Detrojto, la gazetaraj strikantoj sin preparis por grandega feria manifestacio. Ili volis montri la solidarecon de la sindikatoj kontraŭ la dungantaro. En la aviadilo mi legis, ke unu virino pafmortigis sian edzon kaj siajn du filinojn dum ilia dormado, deklarante, ke tio estas protekti ilin kontraŭ la “malbonuloj”. En Kalifornio, la advokatoj de la proceso de O. J. Simpson estis fariĝantaj steloj sur la gazetoj.

Sed ĉi tie, en la kabineto de Morrie, la valora vivo daŭris tagon post tago. Nun ni sidis kune, kelkajn futojn for de la plej nova aldonaĵo al la domo: oksigen-aparato. Ĝi estis malgranda kaj portebla, proksimume ĝisgenue alta. En la nokto, kiam al li mankis aero, Morrie enigis en sian nazon la longan platan tubon, kiu alĉirigis al liaj du naztruoj kiel hirudo. Mi abomenis la ideon kunligi Morrie kun ia ajn maŝino, kaj mi penis ne rigardi ĝin dum Morrie parolis.

“Ĉiu scias, ke li mortos” li ripetis, “sed neniuj kredas tion. Se oni tion kredus, oni prenus la aferojn alimaniere.”

Tial ni nin mistifikas pri la morto, mi diris.

“Jes. Sed ekzistas pli bona agmaniero: scii, ke vi mortos, kaj esti preparita por tio en ĉiu tempo. Tio estas pli bona. Tiu maniero, en efektiveco, permesos al vi pli bone uzi la vivon dum vi vivas.”

Kiel do oni povas esti ĉiam preparita por morti?

“Faru, kiel la budhistoj faras. En ĉiu tago, havu birdeton sur via ŝultro, kiu demandas: ĉu hodiaŭ estas la tago? Ĉu mi estas preta? Ĉu mi faras ĉion, kion mi bezonas fari, por fariĝi la persono, kiu mi volas esti?”

Li turnis sian kapon al sia ŝultro, kvazaŭ la birdo troviĝus tie tiumomente.

“Ĉu hodiaŭ estas la tago de mia morto?” li diris.

Morrie libere depruntis el ĉiuj religioj. Li naskiĝis judo, sed li fariĝis agnostikulo dum sia adoleskeco, parte pro ĉio, kio okazis al li dum lia infaneco. Kelkaj aspektoj de la filozofio de budhismo kaj de la kristanismo al li plaĉis, sed kulture li sentis sin ĉiam ĉe si en la judismo. Li estis religia bastardo, kio faris lin ankoraŭ pli facile akceptebla por la studentoj, kiujn li instruis dum la longaj jaroj. Kaj tio, kion li diris en siaj lastaj monatoj sur la tero ŝajnis transcendi la diferencojn inter la religioj. La morto estas kapabla tion fari.

“La vero estas, Mitch,” li diris, “ke lernante kiel morti, vi lernas kiel vivi.”

Mi kapjesis.

“Mi volas diri ankoraŭfoje,” li diris, “ke lernante kiel morti, vi lernas kiel vivi.” Li ekridetis, kaj mi ekkomprenis, kion li estas faranta. Li penis certigi sin, ĉu mi jam sorbis tiun ĉi punkton, sen min embarasi per demando. Tio estis parto de tio, kio faris lin bona instruisto.

Ĉu vi pensis multe pri la morto antaŭ ol vi malsaniĝis? mi demandis.

“Ne.” Morrie diris kun rideto. “Mi estis kiel ĉiuj aliaj. Foje mi diris al unu el miaj amikoj en momento de gajeco: mi estos la plej sana maljunulo, kiun vi iam renkontis!”

Kian aĝon vi tiam havis?

“En miaj sesdekaj jaroj.”

Vi do estis optimisto.

“Kial ne? Kiel mi jam diris, neniuj vere kredas, ke li mortos.”

Sed ĉiu ja konas iun, kiu mortis, mi diris. Kial do estas tiel malfacile pripensi la morton?

“Ĉar,” Morrie daŭrigis, “multaj el ni vagadas kvazaŭ somnambuloj. Ni efektive ne plene spertas la mondon, ĉar ni estas en stato duondorma, farante aferojn, kiujn ni aŭtomate pensas, ke ni devas fari.”

Kaj, ĉu do rigardi al la morto en la vizaĝon ŝanĝas ĉion ĉi tion?

“Ho, jes! Forigu la tutan fatrason kaj vi vidos la esencon. Kiam vi ekkonscias, ke vi mortos, vi vidos ĉion en maniero tute malsama.”

Li suspiris.

“Lernu kiel morti, kaj vi ellernos kiel vivi.”

Mi rimarkis, ke li tremas nun kiam li movas siajn manojn. Liaj okulvitroj pendas de lia kolo, kaj kiam li levis ilin al siaj okuloj, ili glitis ĉirkaŭ la tempiojn, kvazaŭ li penis meti ilin sur iun alian en la mallumo. Mi etendis la manon por helpi al li suroreligi la branĉojn.

“Dankon,” diris mallaŭte Morrie. Li ekridetis kiam mia mano tuŝetis lian kapon. La plej eta homa kontakto havigis al li tujan ĝojon.

“Mitch, ĉu mi povas diri al vi ion?”

Kompreneble, mi diris.

“Eble ĝi ne plaĉos al vi.”

Kial?

“Nu, la vero estas ke, se vi vere aŭskultas tiun birdon sur via ŝultro, *se vi akceptas la ideon, ke vi povas morti en ĉiu momento*, tiam vi eble ne estos tiel ambicia, kiel vi estas.”

Mi trudis al mi rideton.

“La aferoj, al kiuj vi dediĉas tiom da tempo — ĉiuj ĉi laboroj, kiujn vi faras — ŝajnos al vi malpli gravaj. Eble vi bezonos fari lokon por iuj aferoj pli spiritaĵaj.”

Spiritaĵaj aferoj?

“Vi malŝatas tiun vorton, ĉu ne? ‘Spirita’. Vi pensas, ke ĝi estas ia umor sentimentaliga.”

Nu, mi diris.

Li penis eviti vidi mian embarason, sed ne sukcesis, kaj mi eksplodis per rido.

“Mitch,” ankaŭ li ekridis kaj diris, “eĉ mi ne scias, kion la ‘spirita disvolviĝo’ efektive signifas. Sed mi scias, ke en ia maniero al ni mankas kelkaj ioj. Ni tro interesiĝas pri la materialaj aferoj kaj ili ne kontentigas nin. La amajn rilatojn, kiujn ni havas, la universon ĉirkaŭ ni, ĉion ĉi tion ni prenas kiel naturan, neglekteblan.”

Li faris kapsignon en la direkto al la fenestro, kie la sunlumo enfluis kiel akvo.

“Ĉu vi vidas tion? Vi povas eliri tien, eksteren, kiam ajn vi volas. Vi povas kuri ĉirkaŭ la dombloko ĝis perdo de la spiro. Mi ne povas fari tion. Mi ne povas iri eksteren. Mi ne povas kuri. Mi ne povas esti ekstere sen timi malsaniĝi. Sed, ĉu vi scias kio? Mi aprezas tiun fenestron multe pli ol vi.”

Aprezi ĝin?

“Jes, mi rigardas tra ĝi eksteren ĉiun tagon. Mi rimarkas la ŝanĝiĝojn en la arboj, la forton de la vento, kiu blovas. Tio estas kiel se mi povas vidi la tempon efektive pasi tra tiu fenestrovitro. Ĉar mi scias, ke mia tempo estas preskaŭ ĉe la fino, mi estas tiel altirita al la naturo, kiel mi ĝin ekvidis je la unua fojo.”

Li haltis, kaj dum momento ni ambaŭ ĵetis rigardojn tra la fenestro eksteren. Mi penis vidi, kion li vidis. Mi penis vidi la tempon kaj la sezonojn, mian vivon pasantan en malrapida moviĝo. Morrie iom klinis sian kapon kaj turnis ĝin al sia ŝultro.

“Ĉu estas hodiaŭ, eta birdo?” li demandis. “Ĉu estas hodiaŭ?”

Morrie plu ricevis leterojn el la tuta mondo dank’ al liaj aperoj sur la “Nokta Lineo”. Kiam li sentis sin sufiĉe forta, li sidis kaj diktis la respondojn al amikoj kaj familianoj, kiuj kolektiĝis por la leter-skribaj kunsidoj.

Iun dimanĉon, kiam liaj filoj, Rob kaj Jon, estis hejme, ili kolektiĝis en la salono. Morrie sidis en sia rulseĝo, kun siaj skeletaj gamboj sub lankovrilo. Kiam li sentis

malvarmon, unu el liaj helpantoj metis al li nilonan jakon sur la ŝultrojn.

“Kion diras la unua letero?” demandis Morrie.

Kolego legis leteron venintan de virino nomata Nancy, kies patrino mortis de la malsano muskol-atrofia latera sklerozo. Ŝi skribis por diri, ĝis kia grado ŝi suferas de tiu perdo kaj ke, kiom ŝi scias, ankaŭ Morrie devas esti sufereganta.

“Bone,” diris Morrie kiam la legado finiĝis. Li fermis siajn okulojn. “Ni komencu per ‘Kara Nancy, vi min multe kortuŝis rakontante al mi la historion de via patrino. Kaj mi komprenas, kion vi spertis. Kia malĝojo, kia suferado ĉe ambaŭ partoj. Persone, la larmoj faras al mi bonon, kaj mi esperas, ke ili faros ankaŭ al vi la samon.”

“Ĉu vi ne volas ŝanĝi tiun lastan frazon?” diris Rob.

Morrie pensis sekundon kaj diris:

“Vi pravas. Do skribu jene: ‘Mi esperas, ke vi povos trovi la resanigan povon en la larmoj’. Ĉu tio estas pli bona?”

Rob kapjesis.

“Aldonu ‘Dankon’, kaj subskribu ‘Morrie’,” diris Morrie.

Poste oni legis alian leteron skribitan de virino, Jane, kiu dankis lin pro lia inspiro al ŝi dum la elsendo de la programo de “Nokta Lineo”. Ŝi nomis lin profeto.

“Kia alta komplimento,” diris kolego. “Profeto!”

Morrie faris grimacon. Evidente li ne konsentis kun la takso. “Ni danku ŝin pro ŝia alta laŭdo. Kaj diru al ŝi, ke mi ĝojas, ke miaj vortoj signifis ion por ŝi.

“Kaj ne forgesu subskribi: ‘Dankon, Morrie’.”

Estis letero de viro el Anglio, kiu perdis sian patrinon kaj petis Morrie helpi al li kontaktiĝi kun ŝi tra la nevidebla mondo. Poste sekvis letero de geedza paro, kiu volis veni al Bostono por lin renkonti. En la fino, estis longa letero de unu el liaj antaŭaj studentinoj, kiu skribis pri sia vivo post kiam ŝi finis la universitaton. Ĝi rakontis pri murdo-kaj-sinmortigo kaj tri mortnaskitaj infanoj. Ĝi rakontis pri patrino, kiu mortis de la malsano muskol-atrofia latera sklerozo. Ĝi esprimis la timon, ke ankaŭ ŝi, la filino, estos trafita de la malsano. Kaj ĝia rakontado daŭris plu kaj plu. Du paĝoj. Tri paĝoj. Kvar paĝoj.

Morrie sidis aŭskultante la longan, teruran rakontadon. Kiam finfine la legado finiĝis, li diris mallaŭte:

“Nu, kion do ni respondos?”

La grupo silentis. Fine, Rob diris:

“Kion vi pensas pri ‘Dankon pro via longa letero’?”

Ĉiuj ekridis. Morrie rigardis sian filon, kaj lia vizaĝo ekradiis.

La kvina mardo

Ni parolas pri familio

Estis la unua semajno en septembro, la semajno de la reveno al la lernejo, kaj je la unua fojo de post tridek kvin sinsekvaj aŭtunoj, mia maljuna profesoro ne havis klason, kiu lin atendis, en la universitato Brandeis. En Bostono svarmis studentoj, kiuj parkis siajn aŭtomobilojn en duobla vico sur flankaj stratoj, elŝarĝante siajn pakaĵojn el la aŭtomobilaj kofrujoj. Sed Morrie estis ĉe si, en sia kabineto. Tio ŝajnis iom kontraŭkutima, kiel tiuj futbalistoj, kiuj finfine emeritiĝis kaj devis alfronti sian unuan dimanĉon hejme, antaŭ la televidilo, pensante en si: mi ankoraŭ povus tion fari. Mi jam ellernis el la traktado kun tiuj ludistoj, ke estas preferinde lasi ilin solaj en la tempo, kiam revenas iliaj malnovaj konkurs-sezonoj. Nenion diru. Sed ĉi-foje, mi ne bezonis memorigi Morrie pri tio, ke lia tempo jam estas kalkulebla.

Por la sonregistrado de nia konversacio, ni jam pasis de la mikrofono mantenata al la kravat-mikrofono populara ĉe la televidistoj, ĉar nun fariĝis tro malfacile por Morrie teni ian objekton longatempe. Oni povas alfiksi ĝin al la kolumo aŭ al la roverso de jaketo. Kompreneble, ĉar Morrie portis nur molajn kotonajn ĉemizojn, kiuj loze pendis sur lia ĉiam ŝrumpanta korpo, la mikrofono ne teniĝis, kaj mi devis de tempo al tempo etendi mian manon por remeti ĝin en ĝian lokon. Ŝajnis, ke Morrie ĝuas tion, ĉar tiu gesto pliproksimigis min al li. Mi tiam estis en lia intima spaco, kaj lia bezono de fizika kontaktiĝo estis pli forta ol iam ajn. Kiam mi min klinis antaŭen, mi aŭdis lian siblan spiradon kaj lian malfortan tusadon, kaj ke li mallaŭte ŝmacas per la lipoj, antaŭ ol engluti la salivon.

“Nu, mia amiko,” li diris, “pri kio do ni parolu hodiaŭ?”

“Pri la familio, ĉu bone?”

“La familio.” Li meditis momenton. “Nu, bone, vi povas vidi la mian, tute ĉirkaŭ mi.”

Li montris al mi per la kapo la fotojn sur liaj librobretoj: Morrie kiel infano kun sia avino; Morrie kiel junulo kun sia frato, David; Morrie kun sia edzino, Charlotte; Morrie kun siaj du filoj, Rob, ĵurnalisto en Tokio, kaj Jon, komputikisto en Bostono.

“Laŭ mi, ĉe la lumo de ĉio, pri kio ni jam parolis en tiuj ĉi semajnoj, estas eĉ pli grave, ke ni alpaŝu al la demando pri la familio.” li komencis.

“Fakte, sur kia fundamento, sur kia sekura fundamento, oni povas sin apogi hodiaŭ, se ne sur la familio? Tio montriĝas al mi tute klara dum mia malsano. Se vi ne havas la apogon, nek la amon, nek la prizorgemon, nek la priatenton, kiujn vi ricevas de familio, vi havas preskaŭ neniom da valoro. La amo estas ekstreme grava! Kiel diris nia granda poeto Auden, ‘Amu unuj la aliajn, aŭ vi pereos’.”

“Amu unuj la aliajn, aŭ vi pereos.” Mi notis la frazon. Ĉu Auden diris tion?

“Amu unuj la aliajn, aŭ vi pereos,” ripetis Morrie. “Tio estas bona, ĉu ne? Kaj tio estas tiel vera. Sen la amo, ni estas birdoj kun flugiloj rompitaĵoj.

“Ni supozu, ke mi eksedziĝus, aŭ mi estus fraŭlo, kaj sen infano. Tiam tiu ĉi malsano, kaj ĉio, kion ĝi devigas min sperti, estus multe pli malfacila. Mi ne estas certa, ĉu mi povus ĝin elteni. Certe, oni venus viziti, amikoj, kamaradoj, kolegoj, sed neniu el ili povus anstataŭi iun, kiu neniam forlasos vin. Neniu el ili povus anstataŭi iun, kiu ĉiam havas okulon sur vin, rigardas vin dum la tuta tempo.

“Tio estas parto de tio, kion la familio signifas. Ne nur por ami, sed ankaŭ por lasi aliajn scii, ke iu ĉiam gardas kaj prizorgas ilin. Tio estas, kio tiel multe mankis al mi, kiam mia patrino mortis — kion mi nomas ‘spirita sekureco’ — nome: scii, ke via familio estos tie por gardi kaj prizorgi vin. Nenio alia povos doni al vi tiun sekurecon. Nek la mono, nek la famo.”

Li ĵetis al mi rigardon.

“Nek la laboro,” li aldonis.

Generi infanojn estas unu el la demandoj sur mia listeto de la aferoj, kiujn mi volas finarangi kiel eble plej frue. Mi parolis al Morrie pri la dilemo de mia generacio rilate la demandon. Ni havis timon perdi pro ili nian liberecon, timon, ke ili transformus nin en “gepatrojn-objektojn”, kiuj ni ne volis esti. Mi konfesis, ke mi mem sentas iujn el tiuj timoj.

Kaj tamen, kiam mi rigardis Morrie, mi min demandis: se mi, sen familio, sen infanoj, estus sur lia loko, sur la sojlo de la morto, ĉu mi povus elteni tian malplenecon? Morrie edukis siajn du filojn en virojn amemajn kaj prizorgemajn, kaj kiel Morrie, ili ne sin ĝenis montri siajn sentojn. Se li havis tian deziron, ili ĉesigus siajn laborojn por ĉiam esti ĉe lia flanko dum liaj lastaj monatoj. Sed tio ne estis, kion li volis.

“Neniel ŝanĝu viajn vivojn,” li diris al ili. “Alie, tiu ĉi malsano ruinigus tri vivojn anstataŭ unu.”

Tiamaniere, kvankam li estis baldaŭ mortonta, li montris sin respektama al la mondoj de siaj infanoj. Ne mirinde estas ke, kiam ili venis sidi kun li, estiĝis akvofalo da sentoj: senfinaj kisoj kaj ŝercoj kaj brakumoj ĉe la litrando, kun la manoj reciproke premataj.

“Kiam ajn iuj demandas min, ĉu necesas havi aŭ ne havi infanojn, mi neniam diras al ili kion fari,” diris Morrie, rigardante foton de sia pliĝa filo. “Mi diras nur: ‘Rilate la demandon havi aŭ ne havi infanojn estas nenia sperto sekvida.’ Tio estas ĉio. Estas nenia anstataŭo por tio. Vi ne povas fari tion kun amiko, nek kun amatino. Se vi volas la spertadon havi kompletan respondecon por iu alia persono, kaj se vi volas lerni kiel ami kaj krei ligilon plej profundan, tiam vi devas havi infanojn.”

Do, ĉu vi tion ree farus? mi demandis.

Mi ĵetis rigardon al la foto. Rob estis kisanta Morrie sur la frunto, kaj Morrie ridanta, kun siaj okuloj fermitaj.

“Ĉu mi tion ree farus?” li rigardis min kun mieno surprizita. “Mitch, mi neniel preterlasus tiun spertadon. Eĉ se...”

Li faris gluton kaj metis la foton sur siajn genuojn.

“Eĉ se la pagenda kosto estas doloriga,” li diris.

Ĉar vi forlasos ilin.

“Ĉar mi baldaŭ forlasos ilin.”

Li kunpremis la lipojn, fermis la okulojn, kaj mi vidis la unuajn larmojn flui sur liajn vangojn.

“Kaj nun,” li diris mallaŭte, “vi parolu.”

Mi?

“Pri via familio. Mi scias pri viaj gepatroj. Antaŭ pluraj jaroj mi renkontiĝis kun ili, ĉe la disdono de la diplomoj. Vi havas ankaŭ fratinon, ĉu ne?”

Jes, mi diris.

“Pli aĝa ol vi?”

Pli aĝa.

“Kaj unu fraton, ĉu?”

Mi konfirmis per kaptigno.

“Pli juna?”

Pli juna.

“Kiel mi,” diris Morrie, “mi havas pli junan fraton.”

Kiel vi, mi diris.

“Ankaŭ li venis al via ceremonio, ĉu ne?”

Mi palpebrumis, kaj mi revidis nin ĉiujn en mia memoro: dek ses jarojn antaŭe, la varmega suno, la bluaj roboj, kaj ni, strabantaj kaj nin tenantaj reciproke per la brakoj je la talio por la fotado dum ies krio “unu, du, trii...”

“Kio estas al vi?” diris Morrie, kiu rimarkis mian subitan silenton. “Pri kio vi pensas?”

Pri nenio, mi diris kaj ŝanĝis la temon.

La vero estas, ke mi ja havas fraton, du jarojn pli junan, kun blondaj haroj kaj avelkoloraj okuloj. Li aspektas tiel malsame de mi kaj ankaŭ de mia fratino, kiu havas brunajn harojn, ke ni ofte incitetis lin deklarante, ke fremduloj demetis lin kiel infaneton forlasitan sur la peronon de nia domo. “Kaj unu tagon,” ni diris, “ili revenos vin serĉi.” Li ploris kiam ni diris tion, sed malgraŭe ni ne ĉesis tion diri.

Li elkreskis kiel la plej junaj infanoj de multaj familioj, dorlotata, amegata, kaj interne turmentata. Li revis fariĝi aktoro aŭ kantisto, kaj ofte reludis al ni programojn de televido ĉe la manĝotablo, imitante ĉiun rolon, kun la vizaĝo fendita de larĝa rideto. Mi estis la bona lernanto de la familio, li estis la malbona; mi estis obeema, li rompis la regulojn; mi evitis drogojn kaj alkoholaĵojn, li gustumis ĉion, kio povis esti enstomakigita. Li foriris en Eŭropon nelonge post kiam li finis la lernadon de la supera mezlernejo, preferante la vivmanieron senbridan, kiun li tie trovis. Kaj tamen li restis la favorato de la familio. Kiam li revenis viziti la hejmon kun siaj manieroj, tro liberaj kaj strangaj, mi ofte sentis min rigida kaj konservativa.

Pro la diferencoj inter ni mi imagis, ke niaj sortoj iros en direktoj kontraŭaj tuj post kiam ni plenaĝiĝos. Mi estis prava krom pri unu punkto. Ekde la tago, kiam mia onklo mortis, mi kredis, ke mi povos suferi similan morton, iun neatenditan malsanon, kiu min forprenos. Jen kial mi febre laboris, kaj mi min preparis por kancero. Mi sentis ĝian spiron. Mi sciis, ke ĝi venas. Mi ĝin atendis, kiel kondamniton atendas sian ekzekutiston.

Kaj mi estas prava. Ĝi venis.

Sed ĝi maltrafis min.

Ĝi trafis mian fraton.

La sama tipo de kancero kiel tiu, kiun mia onklo suferis. La pankreata. Malofta formo. Kaj tial la plej juna el mia familio, kun la blondaj haroj kaj la avelkoloraj okuloj, havis sian kemiterapion kaj radiadon. Liaj haroj falis, lia vizaĝo malgrasiĝis ĝis skeleteco. Tio devus esti mi, mi pensis. Sed mia frato ne estis mi, kaj li ne estis mia onklo. Li estis batalanto. Kaj li estis ĉiam tia ekde sia plej juna aĝo. Kiam ni luktis en la keletaĝo, li eĉ mordis min tra mia ŝuo ĝis mi kriis pro doloro kaj lasis lin. Kaj tial li faris rebaton. Li batalis kontraŭ la malsano en Hispanio, kie li vivis, kun la helpo de eksperimenta medikamento, kiu ne estis — kaj ankoraŭ ne estas — en vendo en Usono. Li flugis ĉien en Eŭropo por ricevi kuracadon. Post kvin jaroj da kuracado, la medikamento ŝajne jam pelis la kanceron en remiton.

Tio estis la bona novaĵo. La malbona novaĵo estis: mia frato ne volis, ke mi lin vidu — nek mi, nek iu ajn el la familio. Ju pli ni penis telefoni al li kaj esprimi al li nian deziron lin vidi, des pli li tenis nin en distanco, insistante, ke tiu ĉi batalo estas io, kion li bezonas mem fari sola. Monatoj pasis sen unu vorto de li. Mesaĝoj, kiujn ni lasis sur lia respondilo, restis sen respondo. Mi estis turmentata de kulpeco, ĉar mi havis la senton, ke mi devus fari ion por li, kaj mi estis plena de kolero kontraŭ lia rifuzo al ni pri la rajto tion fari.

Mi do denove plonĝis en mian laboron. Mi laboris, ĉar dank' al tio mi povis regi min. Mi laboris, ĉar mi trovis en tio prudenton kaj reagon. Ĉiufoje, kiam mi telefonis al la apartamento de mia frato en Hispanio kaj kiam mi aŭdis lian respondilon — li

registris sian mesaĝon en la hispana lingvo, ankoraŭ alia signo de la granda distanco, kiu apartigis nin — mi remetis la aŭdilon kaj rekomencis labori pli longan tempon. Eble tio estas unu el la kaŭzoj, kial mi estis altirita al Morrie. Li lasis al mi esti tie, kien mia frato malpermesis al mi aliri.

Kiam mi ririgardas la pasintecon, al mi ŝajnas, ke Morrie sciis ĉion ĉi tion jam de longe.

La sesa mardo

Ni parolas pri emocioj

Mi pasis preter la montaj laŭroj kaj la japana acero kaj paŝis supren sur la bluŝtonajn ŝtupojn de la domo de Morrie. La blanka tegmenta defluilo pendis kiel kovrilo super la antaŭpordo. Mi premis la pordosonorilon. Min akceptis ne Connie, sed la edzino de Morrie, Charlotte, bela grizhara virino, kiu parolis per melodia voĉo. Ŝi malofte estis hejme kiam mi alvenadis — ŝi daŭrigis labori ĉe Masaĉuseca Instituto de Teknologio, kiel Morrie deziris — kaj mi estis surprizita ŝin vidante ĉi-matene.

“Hodiaŭ Morrie sentas sin iom malbone,” ŝi diris, rigardante supren de mia ŝultro dum momento. Poste ŝi direktiĝis al la kuirejo.

Mi bedaŭras, mi diris.

“Ne, ne, li ĝojos vin vidi,” ŝi rapide diris. “Mi estas certa...”

Ŝi haltis meze de la frazo, iomete turnante sian kapon kaj aŭskultante ion. Poste ŝi daŭrigis:

“Mi estas certa... ke li sin sentos pli bone kiam li scios, ke vi estas ĉi tie.”

Mi levis la sakojn, kiujn mi alportis el la superbazaro — miaj kutimaj nutraĵ-provizoj, mi ŝerce diris — Ŝi ŝajne ekridetis kaj, malgraŭ tio, mi tamen sentis, ke ŝi estas en si maltrankvila.

“Jam estas tro da nutraĵoj. Li manĝis nenion ekde la lasta fojo.”

Tio surprizis min.

Li manĝis nenion? mi demandis.

Ŝi malfermis la fridujon kaj mi vidis la konatajn skatolojn de kokaĵ-salato, vermiĉeloj, legomoj, farĉita melopepo, ĉion, kion mi aĉetis por Morrie. Ŝi malfermis la kongelujon kaj tie estis eĉ pli multe da nutraĵoj.

“Morrie ne povas plu manĝi la plej multajn el tiuj ĉi nutraĵoj. Ili estas tro malmolaj por engluti. Nun li devas manĝi molaĵojn kaj likvajn trinkaĵojn.”

Sed li diris nenion pri tio, mi diris.

Charlotte ekridetis.

“Li ne volas vundi viajn sentojn.”

Tio ne vundus miajn sentojn. Mi volis nur iel helpi. Mi volis nur alporti al li ion...

“Sed vi alportas al li multon. Li atendas viajn vizitojn kun senpacienco. Li parolas pri tiu ĉi projekto, kiun li devas plenumi kune kun vi, kaj pri la neceseco, ke li koncentru sin kaj ŝparu la tempon. Mi pensas, ke tio jam donas al li la celosenton...” Ŝi denove direktis siajn okulojn malproksimen, lasante la rigardon vagi ie. Mi sciis, ke la punktoj de Morrie fariĝas tiel malfacilaj, ke li preskaŭ ne povas endormiĝi dum ili, kaj tio signifas, ke ankaŭ Charlotte ofte ne dormas tutnokte. Ifoje Morrie restis sendorma dum horoj tusante por peni eligi mukaĵojn el la gorĝo. Ĉe li nun estis flegistoj, kiuj restis dum la tuta nokto, kaj dum la tago ĉiuj tiuj vizitantoj, antaŭaj studentoj, kolegoj, meditado-majstroj, iradis en kaj el la domo. En iuj tagoj, Morrie havis kvin aŭ ses vizitantojn, kaj ili estis ofte tie kiam Charlotte revenis de sia laboro. Ŝi akceptis ilin kun pacienco, eĉ se ili ĉiuj forprenis la valorajn minutojn, kiuj restis al ŝi kun Morrie.

“... la celosento,” ŝi daŭrigis. “Jes. Tio estas bona, vi scias.”

Mi tion esperas, mi diris.

Mi helpis al ŝi meti la novajn nutraĵojn en la fridujon. Sur la tablo de la kuirejo troviĝis diversaj notpaperetoj, mesaĝoj, informiloj, medicinaj instrukcioj. Plimultiĝis la pilolaj boteletoj ol iam ajn antaŭe — Selestono por lia astmo, Ativano por dormigo, Naprokseno por la infektoj — krome, tie estis ankaŭ pulvorigita lakto kaj laksetiga drogo. Malsupre, ĉe la enirejo de la salono, aŭdiĝis sono de pordomalfermo.

“Eble li nun povas vin akcepti... Mi do iru vidi.”

Charlotte denove ĵetis rigardon sur miajn nutraĵojn kaj mi eksentis honton. Mi nun bone komprenis, ke Morrie neniam plu gustumos ĉiujn ĉi tiujn nutraĵojn.

La malsano de Morrie, kun siaj akompanantaj etaj hororoj, daŭre evoluis. Kiam mi finfine sidiĝis apud Morrie, li pli forte tusadis ol kutime, tusoj sekaj kaj spasmaj, kiuj skuis lian bruston kaj igis lin ĵeti la kapon antaŭen. Post krizo fortega, li haltis, fermis siajn okulojn, kaj reakiris sian spiron. Mi restis silenta, ĉar mi pensis, ke li penas retrovi sian forton.

“Ĉu la magnetofono estas ŝaltita?” li diris subite, kun la okuloj ankoraŭ fermitaj.

Jes, jes, mi rapide diris, premante la ludan kaj registran butonojn.

“Tio, kion mi nun faras,” li daŭrigis, kun la okuloj ankoraŭ fermitaj, “estas apartigi min disde mia spertado.”

“Apartigi vin?”

“Jes. Apartigi min. Kaj tio estas grava — ne nur por iu persono kiel mi, kiu baldaŭ mortos sed ankaŭ por iu kiel vi, kiu estas perfekte sana. Lernu vin apartigi.”

Li malfermis la okulojn. Li faris elspiron. “Ĉu vi scias tion, kion la budhistoj diras? Vin aliroĉu al nenio, ĉar ĉio estas nepermanenta.”

Sed, atendu, mi diris. Ĉu vi ne ĉiam parolas pri la neceseco sperti la vivon? Ĉiujn emociojn bonajn kaj malbonajn?

“Jes.”

Nu, kiel do vi povas tion fari, se vi estas apartigita?

“Ho. Vi nun pripensas, Mitch. Sed apartigo ne signifas, ke vi ne lasas la spertadon penetri vin. Kontraŭe, vi devas lasi ĝin plene penetri vin. Jen kiel vi povas vin apartigi disde ĝi.”

Mi fariĝis konfuzita.

“Prenu ian ajn emocion — la amon al virino, aŭ la afliktiĝon pro iu amata, aŭ tion, kion mi travivas: timon kaj doloron, kiujn estigas mortiga malsano. Se vi vin detenas de tiuj emocioj — se vi ne permesas al vi travivi ilin de la komenco ĝis la fino — vi neniel povas fari vin apartigita, vi estas tro okupata de la timo. Vi timas la doloron, vi timas la aflikton. Vi timas la vundeblecon, kiun sekvigas la amo.

“Sed, vin jetante en tiujn emociojn, permesante al vi plonĝi en ilin, ĝis la fundo, eĉ transen, vi spertas ilin plene, komplete. Tiam vi scias, kio estas la doloro. Vi scias, kio estas la amo. Vi scias, kio estas la aflikto. Kaj nur tiam vi povas diri: ‘Nu, bone. Mi jam spertis tiun emocion. Mi rekonas ĝin. Nun mi bezonas min apartigi de ĝi dum momento.’”

Morrie haltis kaj min observis, eble por certigi sin, ĉu mi tion jam bone komprenas. “Mi scias, ke vi pensas, ke tio ĉi preskaŭ temas pri la morto,” li diris, “sed, kiel mi senĉese diras al vi, tio ja estas: lernante kiel morti, vi lernas kiel vivi.”

Morrie parolis pri siaj plej teruraj momentoj, kiam li sentis sian bruston forte skuata de movoj profundaj kaj pezaj, aŭ kiam li ne estis certa, ĉu li povos repreni sian spiron. Tiuj ĉi estis momentoj plej malfacile elteneblaj, li diris, kaj liaj unuaj emocioj estis hororo, timo, maltrankvilo. Sed tuj post kiam li rekonis tiujn emociojn — ilian teksturon, ilian humidecon, la frostotremon, kiu trakuras la dorson, la rapidan ondon da varmo, kiu trapasas la cerbon — tiam li povis diri: “Bone. Tio estas la timo. Foriru de tiu ĉi timo. Foriru do.”

Mi pensis, kiel ofte tio estas bezonata en la ĉiutaga vivo. Ni ofte sentas nin solecaj, iafoje ĝis la grado de larmoverŝo, sed ni ne lasas veni la larmojn, ĉar ni pensas, ke ni ne devas plori. Aŭ iafoje ni sentas impulson de amo por iu amata, sed ni diras nenion, ĉar ni estis glaciigitaj de la timo pri la efiko de tiuj vortoj sur la rilato.

La vidpunkto de Morrie estis ĝuste la malo. Malfermu la kranon. Lavu vin per viaj emocioj. Tio neniel vundos vin. Kontraŭe, tio nur helpos. Se vi enlasas la timon internen, se vi surhavas ĝin kiel kutiman ĉemizon, tiam vi povas diri al vi: “Bone, ĝi estas nur timo, mi ne devas lasi al ĝi min regi. Mi vidas ĝin tia, kia ĝi estas.”

Same pri la soleco. Spertu ĝin, lasu la larmojn flui, sentu ĝin komplete — sed fine estu kapabla diri: “Bone, tio estis la momento, kiun mi pasigis kun mia soleco. Mi

ne timas senti min soleca, sed nun mi estas preta meti tiun solecon flanken kaj scias, ke ekzistas ankaŭ aliaj emocioj en la mondo, kiuj atendas mian spertadon.

“Apartigu vin,” Morrie ripetis.

Li fermis siajn okulojn, kaj tusadis.

Poste li denove tusadis.

Poste li ankoraŭfoje tusadis, pli laŭte.

Subite, li duonsufokiĝis. Liaj bronkoj estis tiel obstrukcitaj, ke li ne retrovis sian spiron. La akumuliĝaĵo jen saltis supren duonvoje, jen refalis malsupren, lin turmentante. Li sentis sufokiĝon, poste li tusadis ankoraŭ pli forte, skuante siajn manojn antaŭ si, kun la okuloj fermitaj, kio donis al li aspekton kvazaŭ esti posedata de demonoj. Mi sentis, ke la ŝvito perlas sur mia frunto. Instinkte mi ektiris lin, ke li kliniĝu antaŭen, kaj frapis la malantaŭon de liaj ŝultroj, kaj li alproksimigis papertukon al sia buŝo kaj sputis grandan kvanton da mukaĵo.

La tusado ĉesis, kaj Morrie refalis en siajn kapkusenojn el spongokaŭĉuko kaj plenpulme enspiregis aeron.

“Kiel vi vin sentas? Ĉu jam sufiĉe bone?” mi diris, penante kaŝi mian timon.

“Jam sufiĉe bone,” Morrie diris mallaŭte, levante tremetantan fingron. “Atendu... momenton.”

Ni sidis senparole ĝis li reprenis sian normalan spiradon. Mi sentis ŝvitadon sur mia krania haŭto. Li petis min fermi la fenestron, ĉar la venteto donis al li malvarmon. Mi ne menciis al li, ke ekstere estas dudek sep celsiaj gradoj.

Finfine, kvazaŭ flustrante, li diris:

“Mi scias, en kia maniero mi volas morti.”

Mi atendis en silento.

“Mi volas morti serene. Pace. Ne kiel tio, kio ĵus okazis.

“Kaj tiuokaze necesas, ke la apartigo intervenu. Se mi mortas meze de atako de tia tusado, kian mi ĵus havis, mi bezonas esti kapabla min apartigi de la hororo kaj diri: ‘Tio estas mia momento.’”



“Mi ne volas forlasi la mondon en stato de teruro. Mi volas scii, kio okazas, kaj, tion akceptinte, trovi en mi pacon kaj lasi min foriri. Ĉu vi komprenas?”

Mi faris jesan kaptisignon.


“Ne lasu vin foriri almenaŭ nun,” mi rapide aldonis.

Morrie tridis al si rideton.

“Ne. Nun ankoraŭ ne. Ni ankoraŭ havas laboron por fari.”

elangligis **Wang Chongfang** (Ĉinio)

Fratoj Grimm



Fratoj Grimm

Dek du fratoj

Estis iam reĝo kaj reĝino, ili vivis pace kune kaj havis dek du infanojn. Sed ili ĉiuj estis knaboj. Jen parolis la reĝo al la edzino: „Se la dektria infano, kiun vi naskos, estos knabino, devos morti la dek du buboj, por ke ŝia riĉo fariĝu granda kaj la reĝolando apartenu nur al ŝi.“

Li ankaŭ ordonis fari dek du ĉerkojn, kiuj estis jam plenigitaj per rabotaĵoj, kaj en ĉiu kuŝis mortkuseno, kaj li ordonis porti ilin en fermitan ĉambron, poste li donis

la reĝino la ŝlosilon kaj malpermesis al ŝi iam ajn diri ion pri tio.

Sed la patrino sidadis dum la tuta tago kaj malĝojis, tiel, ke la plej eta filo, kiu ĉiam estis ĉe ŝi, kaj kiun ŝi nomis laŭ la Biblio Benjamin, diris al ŝi:

„Kara patrino, kial vi estas tiel malĝoja?“

„Plej kara infano, mi ne rajtas diri tion al vi“, ŝi respondis.

Sed li ne lasis ŝin en paco, ĝis kiam ŝi iris kun li al la ĉambro kaj malfermis ĝin kaj montris al li la dek du ĉerkojn plenigitajn jam per rabotaĵoj.

Poste ŝi parolis: „Mia plej kara Benjamin, tiujn ĉerkojn via patro ordonis fari por vi kaj viajn dek unu fratojn, ĉar tiukaze, se mi naskos knabinon, vi ĉiuj estu mortigitaj kaj entombigitaj en ili.“

Kaj kiam ŝi larmis, kiam ŝi diris tion, konsolis ŝin la filo kaj diris: „Ne ploru, panjo mia, ni ja reciproke helpas al ni kaj foriros.“

Sed ŝi parolis: „Iru kun viaj dek unu fratoj eksteren en la arbaron, kaj unu el vi sidigu ĉiam sur la plej altan arbon, kiu troveblas, kaj tie gardu rigardante al la turo en la kastelo. Se mi naskos filon, mi hisos blankan flagon, kaj tiukaze vi rajtos reveni; sed, se mi naskos filinon, mi hisos ruĝan flagon kaj tiukaze fuĝu tiel rapide, kiel vi povos, kaj la kara Dio protektu vin. Ĉiunokte mi ellitiĝos kaj preĝos por vi, en vintro, ke vi povu varmigi vin ĉe bivakfajro, kaj somere, ke vi ne estu elmetitaj al la varmeĝo.“

Post kiam ŝi benis ĉiujn siajn filojn, ili eliris en la arbaron. Ĉiuj laŭvice gardis, sidis sur la plej alta kverko kaj rigardis al la turo. Kiam pasis dek unu tagoj kaj la vico estis je Benjamin, li vidis, kiel oni hisis flagon. Sed ne estis la blanka, sed la ruĝa sangoflago, kiu anoncis, ke ili ĉiuj mortu. Kiam la fratoj aŭdis tion, ili ekkoleris kaj diris: „Ĉu ni pro knabino trasuferu nian mortigon? Ni ĵuras, ke ni venĝos nin.

Tie, kie ni trovos knabinon, ŝia ruĝa sango fluu.“

Poste ili iris pli profunde en la arbaron, kaj meze de ĝi, kie plej malhelis, ili trovis ensorĉitan dometon, kiu estis malplena. Jen ili parolis: „Ĉi tie ni loĝu, kaj vi, Benjamin, estas la plej juna kaj plej malforta. Vi restadu hejme kaj dommastrumu, ni, la aliaj, foriros kaj havigos la manĝon.“

Poste ili iris en la arbaron kaj pafmortigis leporojn, sovaĝajn kapreolojn, birdojn kaj kolombetojn kaj plukis manĝeblajn aĵojn. Tion ili portis al Benjamin, tiu devis pretigi ĉion, por ke ili povu satmanĝi. En la dometo ili vivis kune dek jarojn kaj la tempo ne fariĝis enua.

La filino, kiun naskis ŝia patrino, la reĝino, nun jam plenkreskiĝis, ŝi estis elkore bona kaj bela laŭ aspekto kaj havis oran stelon sur la frunto. Foje, kiam oni lavis multajn tolaĵojn, ŝi vidis inter ili dek du ĉemizojn por viroj kaj ŝi demandis sian patrinon: „Al kiu apartenas tiuj dek du ĉemizoj? Por la patro ili estas ja tro malgrandaj.“

Jen ŝi respondis kun afliktita koro: „Kara infano, ili apartenas al viaj dek du fratoj.“

Jen parolis la knabino: „Kie estas miaj dek du fratoj? Mi ja ankoraŭ neniam aŭdis ion pri ili.“

La patrino respondis: „Tion scias nur Dio, kie ili estas. Ili vagadas en la mondo.“



Ŝi kondukis la knabinon permane al ĉambro kaj malfermis ĝin, kaj ŝi montris al ŝi la dek du ĉerkojn kun la rabotaĵoj kaj la mortokusenoj. „Tiuj ĉerkoj“, ŝi parolis, „estis faritaj por viaj fratoj, sed ili sekrete foriris antaŭ ol vi estis naskita.“ Kaj poste ŝi rakontis al la filino, kiel ĉio ĉi okazis.

Jen diris la knabino: „Kara patrino, ne larmu, mi foriros kaj serĉos miajn fratojn.“

Poste ŝi prenis la dek du ĉemizojn kaj foriris rekte en la grandan arbaron. Ŝi iris dum tuta tago, kaj vespere ŝi atingis la ensorĉitan dometon. Ŝi enpaŝis kaj trovis junan knabon, kiu demandis: „De kie vi venas, kaj kien vi intencas iri?“ Kaj li tre miris, ke ŝi estas tiel bela, ke ŝi surhavas reĝecajn vestojn kaj stelon sur la frunto.

Jen ŝi respondis: „Mi estas reĝofilino kaj serĉas miajn dek du fratojn kaj mi iros tiom longe, kiom la ĉielo estos blua, ĝis kiam mi trovos ilin.“

Ŝi montris al li ankaŭ la dek du ĉemizojn, kiuj apartenas al ili. Jen Benjamin

ekkonis, ke ŝi estas lia fratino kaj parolis: „Mi estas Benjamin, via plej juna frato.“

Kaj ŝi komencis plori pro ĝojo, kaj ankaŭ Benjamin, kaj ili kisis kaj karesis sin reciproke pro granda amo. Poste li parolis: „Kara fratino, estas nur unu obstaklo, ni interkonsentiĝis, ke ĉiu ajn knabino, kiun ni renkontos, devos morti, ĉar ni devis forlasi pro knabino nian reĝan regnon.“

Jen ŝi diris: „Mi volonte mortos, se mi per tio povos elaĉeti miajn dek du fratojn.“

„Ne“, li respondis, „vi ne mortu, sidiĝu sub tiun kuvon, ĝis kiam venos la dek unu fratoj. Tiam mi ja interkonsentiĝos kun ili.“

Tion ŝi do faris kaj kiam estis nokto, venis la aliaj de la ĉasado, kaj la manĝo estis preta. Kaj sidante ĉe la tablo, ili demandis: „Ĉu okazis io nova?“

Jen diris Benjamin: „Ĉu vi ne scias tion?“

„Ne“, ili respondis.

Li daŭrigis paroli: „Vi estis en la arbaro, kaj mi restis hejme, kaj tamen mi scias pli ol vi.“

„Do rakontu“, ili vokis.

Li respondis: „Ĉu vi promesos al mi tiukaze, ke la unua knabino, kiun vi renkontos, ne estos mortigita?“

„Jes“, ili ĉiuj vokis, „ŝi estu grace favorita! Rakontu do.“

Jen li diris: „Nia fratino estas ĉi tie“, kaj li levis la kuvon, kaj la reĝofilino aperis en siaj reĝecaj vestoj kun la ora stelo sur la frunto, kaj ŝi estis tiel bela, gracila kaj delikata. Jen ili ĉiuj ĝojis, brakumis kaj kisis ŝin kaj amis ŝin elkore.

Nun ŝi restis hejme ĉe Benjamin kaj helpis je la mastrumado de la domo. La dek unu fratoj iradis en la arbaron, ĉasis sovaĝajn bestojn, interalie kapreolojn, birdojn kaj kolombetojn, por ke ili havu manĝon. Kaj la fratino kaj Benjamin pretigis ĝin. Ŝi serĉis la lignon por la kuirado, la herbojn por la legomo. Ŝi metis la potojn al la fajro, por ke la manĝoj ĉiam estu pretaj, kiam la fratoj venos hejmen. Ŝi krome ankaŭ tenis ordigita la domon kaj kovris la litojn, kiuj estis belaj, blankaj kaj puraj. Kaj la fratoj estis ĉiam kontentaj kaj vivis en granda konkordo kun ŝi.

Post certa tempo ili hejme ambaŭ preparis bongustan manĝon, kaj kiam ili do ĉiuj kunestis, ili sidiĝis, manĝis kaj trinkis kaj estis plenaj de ĝojo. Ĉe la ensorĉita dometo estis ĝardeneto, kaj en ĝi staris dek du lilioj ankaŭ nomataj studentofloroj. Ŝi volis plezurigi siajn fratojn, tial ŝi derompis la dek du florojn kaj pensis, ke ŝi donacos al ĉiu frato floron dum la manĝo. Sed kiam ŝi derompis la florojn, la dek du knaboj en la sama momento estis transformitaj en dek du korvojn kaj forflugis super la arbaron. Kaj ankaŭ la domo kun la ĝardeno malaperis. Poste la kompatinda knabino estis sola en la sovaĝa arbaro, kaj kiam ŝi turniĝis, staris apud ŝi maljunulino kaj diris: „Infano kara, kion vi faris? Kial vi ne lasis stari la dek du blankajn florojn? Ili estis viaj fratoj, ili estas nun por ĉiam transformitaj en korvojn.“

La knabino diris larmante: „Ĉu ne estas rimedo elaĉeti ilin?“

„Ne“, diris la maljunulino, „estas en la tuta mondo nenio krom unu afero, sed ĝi estas tiel malfacila, ke vi ne liberigos ilin per tio, ĉar vi devus esti silenta dum sep jaroj, vi ne rajtus paroli nek ridi. Kaj se vi dirus nur ununuran vorton, kaj se mankus nur unu horo je la sep jaroj, ĉio estus vana, kaj viajn fratojn mortigus tiu unu vorto.“

Jen diris la knabino elkore: „Mi scias certe, ke mi elaĉetos miajn fratojn“, kaj ŝi foriris kaj serĉis altan arbon, grimpis supren je ĝi kaj ŝpinis, kaj ne parolis nek ridis. Jen okazis, ke reĝo troviĝis en ĉasado. Li havis grandan leporhundon. Tiu kuris al la arbo, kie supre sidis la knabino, ĝi saltadis, jelpis kaj bojis supren. La reĝo proksimiĝis kaj vidis la belan reĝan filinon kun la ora stelo sur la frunto, kaj li estis tiel ravita de ŝia beleco, ke li vokis al ŝi, ĉu ŝi pretas fariĝi lia edzino. Ŝi ne respondis, sed iom kapjesis. Tial li suprengrimpis mem en la arbon, portis ŝin malsupren, sidigis ŝin sur la ĉevalon kaj kondukis ŝin hejmen. La nupton oni festis kun granda pompo kaj ĝojo. Sed la fianĉino ne diris ion nek ridis. Kiam ili vivis plezure kune kelkajn jarojn, la patrino de la reĝo, kiu estis maliculino, komencis kalumnii la junan reĝinon kaj parolis al la reĝo: „Ŝi estas nur simpla almozpetulino, kiun vi alportis por vi. Kiu sciu, kiujn blasfemajn mistifikojn ŝi kutime faras. Se ŝi estus muta kaj ne povus paroli, ŝi ja povus ridi iam, sed tiu, kiu ne ridas, havas malbonan konsciencon.“

La reĝo unue ne volis konsenti tion, sed la maljunulino tiom multe kalumniis ŝin kaj kulpigis ŝin pri tiom da fiaj faroj, ke la reĝo fine lasis konvinki sin kaj ŝin mortkondamnis.

Poste oni ekbruligis en la korto grandan fajron, en kiu oni volis forbruligi ŝin. Kaj la reĝo staris supre ĉe la fenestro kaj observis ĉion kun larmantaj okuloj, ĉar li ankoraŭ tiom amis ŝin. Kaj kiam ŝi jam estis ligita al la fosto kaj la fajro lekis siajn vestojn per ruĝaj langoj, jen ĝuste forpasis la lasta momento de la sep jaroj. Jen en la aero ekaŭdeblis la batado de flugiloj kaj dek du korvoj alflugis kaj malleviĝis. Kaj kiam ili tuŝis la teron, ili estis ŝiaj dek du fratoj, kiujn ŝi ĵus elaĉetis. Ili distretis la fajron, estingis la flamojn, liberigis sian karan fratinon kaj kisis kaj brakumis ŝin elkore. Sed tiumomente, kiam ŝi rajtis malfermi la buŝon kaj paroli, ŝi rakontis al la reĝo, kial ŝi estis muta kaj neniam ridis. La reĝo ĝojis, kiam li aŭskultis, ke ŝi estas senkulpa, kaj ili vivis poste ĉiuj en konkordo ĝis ilia morto. Sed la malican duonpatrinon oni kondamnis per tribunalo, metis ŝin en barelon, kiu estis plenigita per bolanta oleo kaj venenaj serpentoj. Kaj ŝi mortis terure.

Originalo: Die zwölf Brüder

Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj,

Eldono lastmana, eldonejo Reclam, „Die zwölf Brüder“

Kanajlaro

Koketo parolis al Kokineto: „La nuksoj maturiĝis, ni iru do foje kune sur la monton kaj satmanĝu foje antaŭ ol forprenos ĉiujn la sciuro.“

„Jes“, respondis Kokineto, „venu, ni foje frandu kune.“

Ili foriris sur la monton, kaj ĉar la tago estis hela, ili restadis tie ĝis la vespero; sed mi ne scias, ĉu ili tiom dikmanĝis sin aŭ ĉu ili fariĝis petolaj, mallonge dirite, ili ne volis iri perpiede hejmen, kaj Koketo devis konstrui ĉareton el nuksoŝeloj. Kiam ĝi pretis, Kokineto sidiĝis en ĝin kaj diris al Koketo: „Vi jam povas enjungi vin.“

„Ne“, diris Koketo „Tio povus plaĉi al vi! Prefere mi iros perpiede hejmen ol lasi enjungi min. Ne, tiel ni ne vetis; mi ja volus esti koĉero kaj sidi sur la koĉera benko, sed mem tiri, tion mi ne faros.“

Kiam ili tiel kverelis, proksimiĝis blekanta anaso: „Ŝtelistobando, kiu ordonis al vi, iri al mia noksomonto? Atendu, tio suferigu vin!“

Ĝi do atakis per malfermita beko la Koketon. Sed ankaŭ Koketo ne estis maldiligenta kaj impete ĵetiĝis sur la anason. Fine ĝi hakadis ĝin tiel forte per la plej granda ungo, ke la anaso petis pri pardono kaj volonte kvazaŭ punverdikтите lasis enjungi sin antaŭ la ĉaron. Koketo sidiĝis sur la benkon kaj fariĝis koĉero kaj poste ili galope formoviĝis.

„Anaso, kuru tiel rapide, kiel vi povas!“

Jam veturinte iom sur la vojo, ili renkontis du piedirantojn, pinglon kaj kudrilon. Tiuj vokis: „Haltu, haltu!“ kaj ili diris, ke baldaŭ fariĝos tute malhele, ke ili tiukaze ne povus moviĝi eĉ paŝon plu, ke cetera la vojo estas tre kota. Ili demandis: „Ĉu ni rajtos sidi iom en la ĉaro?“

Kaj ili rakontis, ke ili estis en la tajlorista taverno antaŭ la pordego kaj malfriiĝis pro biertrinkado.

Koketo ilin ambaŭ lasis enĉariĝi, ĉar la pinglo kaj la kudrilo estis magraj kaj ne bezonis multe da spaco. Sed ili devis promesi ne treti sur la piedetojn de Koketo kaj Kokineto.

Malfrue vespere ili atingis taverson. Kaj, ĉar ili ne volis veturi plu dum la nokto; kaj ĉar la anaso ne estis bona piediranto kaj ŝanceliĝis de unu flanko al la alia, ili iris en la taverson. La tavernestro komence multvorte rifuzis ilin, ankaŭ tial laŭdire, ĉar lia domo jam estas plenigita. Li certe pensis, ke ili ne estas nobluloj; sed fine, ĉar ili parolis dolĉe, ke li ricevos la ovon, kiun eligis Kokineto survoje, kaj ke li ankaŭ ricevos la anason, kiu ĉiutage eligas ovon, li fine konsentis, ke ili restadu dum nokto. Nun oni abunde regalis ilin kaj ili manĝis ĉion kun ĝuo kaj



bruo. Frue matene, kiam krepuskiĝis kaj ĉiuj dormis ankoraŭ, vekis Koketo Kokineton, alportis la ovon, pikmalfermis ĝin kaj ili kune manĝis la ovon. La ŝelojn ili ĵetis sur la fajron de la forno. Poste ili iris al la kudrilo, kiu ankoraŭ dormis, kunpinĉis ĝin je la kapo kaj pikŝovis ĝin en la fotelan kusenon de la tavernestro, sed la pinglon en lian mantukon. Fine ili flugis kiel la vento trans la erikejon for. La anaso, kiu dormis sub libera ĉielo kaj restis en la korto, aŭdis, kiel ili brue foriĝis, ĝi tute vekigis kaj trovis rojon, sur kiu ĝi fordrivis, kaj ŝi pli rapidis ol antaŭ la ĉaro. Kelkajn horojn poste la tavernestro ellitiĝis, lavis sin kaj volis sekigi sin per la mantuko, jen la pinglo gratis lian vizaĝon kaj skrapis al li ruĝan streketon de unu orelo ĝis la alia, poste li iris en la kuirejon kaj volis ekbruligi pipon. Sed kiam li venis al la forno, saltis la ovoŝeloj en liajn okulojn.

„Hodiaŭ ĉio trafas mian kapon“, li diris kaj sidiĝis grumble sur sian avofotelon; sed rapide li saltis alten kaj ekkriis: „Ho ve!“ La kudrilo eĉ pli vundis lin, kaj ne je la kapo. Jen li fariĝis tute kolera kaj suspektis la gastojn, kiuj envenis tiom malfrue hieraŭ vespere, kaj kiam li serĉis ilin, ili jam estis for. Jen li ĵuris, ke li neniam en sia domo denove akceptos tian kanajlaron, kiu multon manĝas kaj trinkas, sed ne pagas kaj kvazaŭ dankante, eĉ mistifikas onin.

Originalo: Das Lumpengesindel

Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj, Eldono lastmana, eldonejo Reclam, „Das Lumpengesindel“



elgermanigis Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser (Germanio)

lingve kontrolis Vladimir Türk

Zhang Yuting

Donaco

Dum mia tutviva kariero de instruisto, mi ricevis ne pokajn donacojn.

Tamen la plej neforgesebla donaco por mi estis ne rideto, nek freŝa floro, sed fosaĵo.

Tio okazis antaŭ 20 jaroj.

En la movado de tiel nomata "kritikado kontraŭ la digneco de instruista profesio", la instruistoj kvazaŭ fariĝus spionoj alsenditaj el la eksterlando.

Tamen la simplaj kamparanoj ne zorgis pri tio. Kiel antaŭe ili severtone avertis al siaj infanoj: "La instruistoj ja estas instruistoj. Se vi aŭdacus fari al ili malbonon, mi batompus al vi la kruojn!"

Kaj tiel, kompare kun la lernejoj en la urbo, la montvilaĝa elementa lernejo, kie mi instruis, estis vera paradizo.



Kaj ĝuste en tiu ĉi treege malgranda lernejo, mi spertis mian plej brilan kaj neforgeseblan naskotagon dum la tuta vivo.

Tiun tagon, la ĉielo estis tre serena, plenplena de matenruĝo. Ĉe la tagiĝo kvar infanoj kune alvenis al mia domo.

Ili alportis al mi tre apartan naskotagan donacon. Ĝi estis malgranda arbido elfosita desur la monto.

elĉinigi Pipi (Ĉinio)

Ili ĝojekscitite diris al mi, ke, se mi nur plantos ĝin ĉe la pordo, ĝi en malpli ol duonjaro donos grandan ombbron kaj pompajn ruĝajn florojn.

Mi ekridis. Mi certis, ke ĝi povos produkti brilan miraklan fabelon.

Subite, alkuris knabo nomata Huzi. Kun vizaĝo kovrita de brilantaj ŝvitperloj, anhelante, li diris, "Sinjoro instruisto mia, ankaŭ mi havas donacon por vi!"

Ĉe tio, mi estis frapita de konsterno. Ĉar li ĵus perdis la patron, kaj krome lia patrino kuŝis paraliziĝinta en la lito, kaj ĉitempe li devus paŝti bovojn sur la monto. Mi des malpli komprenis, kion signifas la ŝviteroj sur lia vizaĝo.

Sed li, kun stulta rideto, fingromontris la fosaĵon de li jam bone fositan ne fore de la pordo, dirante: "Mia ... mia familio estas malriĉa. Ili donacis al vi unu arbidon, kaj mi ... mi al vi unu fosaĵon!"

Mi ekridis per la tuta koro, ĉar ĝi vere estis la plej bona donaco sur la tero!

Nature la arbido baldaŭ refreŝiĝis kaj alte elkreskis. En la tempo de florado, ĝi estis plene ŝarĝita de infanaj salutoj kaj bondeziroj, fajre ruĝaj.

Ho, kiel bela donaco!

Ĝuste pro ĉi tiu donaco, ĝis nun, mi ankoraŭ restas en tiu eta montvilaĝo, ĉar mia vivo jam alkoĉiĝas al tiu vivplena arbo ... ✕

Iljet Aliĉka (Albanio)



Ŝtonaj sloganoj

Tuj post la studoj Andreo – kiel instruisto – ricevis ordonon labori en forgesita montara vilaĝo en la nordo.

La patro silente akompanis lin ĝis la fervoja stacio. En la momento de adiaŭo, bridante kun peno sian kortuŝon, li admonis la filon: „Laboru bone, zorgu pri vi kaj atentu, ĉar la vivo estas

aŭtoro, Iljet Aliĉka
malfacila”.

Andreo venis al la loko vespere. La lernejo estis malgranda.

Laboris tie dek instruistoj, ses el la najbara urbo, kaj unu instruistino el Tirana.

La sekvan tagon la plej aĝa instruisto, Paŝku, decidis tuj klarigi al Andreo, „kiel labori kaj vivi, por ke vi estu rigardata favore”. Li komencis per la vilaĝa hierarkio: „Plej grava estas la partia sekretario, instruisto Sabafi, post li la estro de la kooperativo.” Kiam li parolis pri la lernejestro, li prezentis tiun jene: „Honestulo. Lernantojn li batas tiel malofte, ke ili ne memoras pri tio. Sed kiam li batas, do ĝis sveno. Pli bone ne kontraŭstaru al li, ĉar de li dependas ĉio: la okulparo, via slogano ...”

– Kiu slogano? – demandis Andreo.

– Nu, ĉu vi ne scias? – ekmiris Paŝku. – Ĉiu instruisto kun sia klaso aranĝas sloganon el ŝtonoj. Li respondecas pri ĝi dum la tuta tempo.

– Aha – murmuris Andreo.

– Ĉu vi pensas, ke estas tiel simple? – koleretis Paŝku.

– Ne, tute ne – mordetis sian langon Andreo. Laŭ liaj mirigitaj okuloj Paŝku vidis, ke li devos rakonti al li pri io, kio estas ja evidenta al ĉiu, kiel li pensis – li ne imagis, ke iu povas ne koni tion.

– Vi estas komencanto, vi staras antaŭ la kariero, do eksci: se vi volas esti bone vidata de la Partio kaj Aŭtoritatoj – levu la manikojn kaj kunmetu bele vian sloganon. Por ke la slogano estu bela – daŭrigis Paŝku – vi devas esti diligenta. La sloganon ne malzorgu, almenaŭ unufoje en semajno vi devas rigardi ĝin, ĉar sufiĉas pluveto,

ke perdiĝu la tuta efiko. Ŝtonoj estas traŝovataj, literojn kovras argilo kaj koto, kalkon forlavas akvo kaj aperas makuloj. Ĉu vi scias, kio okazis lastatempe?

– Ne – respondis Andreo.

– Ĉar de kie vi povus scii – diris Paŝku kaj komencis rakonti pri la detruigo de la slogano de instruisto Bafti. Jen kio okazis, laŭ Paŝku: Bafti ĉiam estis laŭdata pro la belaj sloganoj kaj ĉiam oni sciis, kie li troviĝas: li estas ĉe la slogano kaj ordigas la literojn. Li venadis tien pli kaj pli ofte, eĉ vespere – tamen subite, antaŭ kelkaj monatoj, la slogano komencis deŝoviĝi malsupren, kaj preskaŭ ses monatoj pasis, antaŭ ol ili malkovris la veron.

Kaj okazis tiel: paŝtisto de la kooperativaj ŝafinoj (unu el tiuj, kiujn oni elkulakigis, kondukis post tagiĝo la ŝafinojn sur la herbejon kaj allogis ilin al la slogano de Bafti (tiumomente en la okuloj de Bafti aperis la sekreta brilo de malkovrinto). „Diable, por kio la ŝafinoj bezonu mian sloganon?” – plendis Bafti kontraŭ la malfavora sorto, treege laca pro la ĉiutaga ordigado de la slogano. Ke la ŝafinojn tentis la vortoj: *La plej danĝera malamiko estas tiu malamiko, pri kiu oni forgesas*, ĉi penso eĉ ne venis al lia kapo.

Bafti multfoje petis la lernejestron, ke li ŝanĝu la sloganon, „malsorĉu” ĝin, sed tiu ne intencis montri sian favoron.

Fine Bafti komencis dubi pri la „senkulpeco” de la ŝafinoj. Li atente rigardis la deklivon ĉirkaŭ la slogano kaj ĉiujn suspektojn konigis al la partia sekretario. „Strange – li pruvis – multaj ŝafinaj padoj kuras malproksime de mia slogano kaj estas eĉ pli oportunaj por la bestoj. Do, kial ili elektas tiujn ĉe la slogano? Ili ja ne havas tiom da kuraĝo, kiom la kaprinoj, ili malŝatas riskon”. Por klarigi la aferon, helpis onidiroj, ke la paŝtisto komencis lastatempe aĉetadi en la vendejo pli multe da salo ol kutime. Do, li estis ruza vulpo – plenmane li prenis salon kaj allogis la ŝafinojn al ambaŭ vortoj „malamiko”, ke ili leku.

La suspektoj montriĝis pravaj – oni ja scias: la ŝafinoj ĉiam kuras stulte al salo. Tuj estis informita la regiona funkciulo de polico kaj fulmrapide oni mobilizis grupon de volontuloj, ke tage kaj nokte ili gardu la sloganon de Bafti. Ekpensu: la kampuloj sidis inter la arbustoj kaj dum horoj atendis, ĝis venos la ŝafinoj kun la paŝtisto!

Longe sako alenon ne tenos, ĝi baldaŭ elvenos. Frumatene la kooperativaj ŝafinoj, detruantaj la literojn, kiujn penege kunmetis Bafti kaj liaj lernantoj, estis kaptitaj de la gardistoj ĉe la freŝa faro.

La kampuloj sin ĵetis sur la paŝtiston (laŭ signo de tiu regiona funkciulo de polico) kaj faligis lin.

La paŝtisto neadis ĉion, kriis, ke li ne kulpas, ke nur la spuroj de la ŝafinoj estis kvazaŭ trovitaj ĉe la slogano, ke finfine la bestoj laŭleĝe havas nenian respondecon

kaj similajn stultaĵojn – sed jam du, tri tagojn poste oni senmaskigis lin antaŭ la laboranta popolo kaj arestis pro la malamika agado, kvankam ĝis la lasta momento li provis defendi sin.

Poste la lernejestro ŝanĝis por Bafti la sloganon kaj la monteton. Li donis unu el tiuj, kiuj enhavas la vorton „Gloron” aŭ „Vivu”. Pri tiaj sloganoj, kompreneble, ne estas multe da laboro.

Cetere ili ĉiam aktualas. Krome – Paŝku mallaŭtigis sian voĉon – gravas ne la enhavo de slogano, sed ĝia longeco. En la momento, kiam li ricevas la sloganon, li komencas instinkte kalkuli la literojn.

Per ĉi tiu okazaĵo Paŝku finis sian paroladon pri la estonta kariero de Andreo.

Du tagojn poste la lernejestro vokis Andreon, konigis al li la devojn de edukisto, montris la okuparon kaj donis aliajn taskojn.

Kiam ili venis al la slogano, li diris:

– Vi estas novulo, do vi ricevos lokon proksime al la lernejo. Koncerne la enhavon, hmm ... – li malfermis sian ruĝan notlibron, hezitis dum momento kaj aldonis – vi povas elekti. Restis al mi du sloganoj: *La Partio – estas glavopinto de la laborista klaso* kaj *Kromio-minado fendas la blokadon*.

Andreo, jam konante la aferon, balbutis nekuraĝe:

– Mi preferus la sloganon pri la blokado.

– Tre bone – la direktoro ne obstiniĝis. – Ĝuste tio estos facila. Pri ĉi tiu loko okupiĝis antaŭe Faruk, do ĝi estas eltretita de piedoj, sed Faruk baldaŭ emeritiĝos, havas pli kaj pli malmulte da forto, la aĝo kadukigas lin, vi komprenas. Nu, sukceson – li finis.

Sekvatage, post la lecionoj, Andreo iris kun lernantoj al sia loko. Ili marŝis preskaŭ duonhoron. La tereno estis ebenigita, sed la ĝisnuna slogano aspektis mizere. Sed li ankoraŭ trovis iom da loko por la nova slogano.

Kiam li dividis la literojn, la infanoj kverelis laŭte. Laŭ sia propra kalkulo pri la nombro de ŝtonoj bezonataj por meti ĉiun signon, ili klopodis akiri la literon – kiel eble – malpleje lacigan.

Unue la kaŭzo por la kvereloj estis „i”, poste „l”, „r” kaj tiel plu.

Surprizita de la tumulto, Andreo demandis por esti justa: „Kaj kiel disdonadis la literojn instruisto Faruk?”

– Ah, diversmaniere, unue laŭ la nomlisto, poste la pli facilajn literojn li donis al la knabinoj, kaj punktojn super „i” aŭ komojn al la malsanuloj.

– Sed tio okazadis ankaŭ laŭ ŝato – aŭdiĝis iu voĉo.

– Do, ni jam finu tiel, kiel ni komencis – diris Andreo. – Ankaŭ mi metos unu literon.

– Ne, sinjoro instruisto – oponis la lernantoj – pli bone gardu la ordon.

Poste ĉio okazis glate. Ili finis post tri horoj, trotetante inter la arbustoj kaj ŝtonoj kiel malpigraj abeletoj. Finfine la lernantoj mem rekonis, ke la slogano estas bela.

Lacaj, ili disiris ĉien, kun sakoj kaj iloj sur la ŝultroj, laŭvice kriante al Andreo: „Ĝis la revido, sinjoro instruisto!” Li sentis premon en la gorĝo, kiam li vidis ilin malsatajn, en mizera vesto, sed feliĉajn. Sendube eĉ ne unu lernanto komprenis – aŭ ne provis kompreni – la signifon de la slogano.

Andreo malrapide revenis hejmen, laca, sed kviet, kun la sento de la bone plenumita devo. Li falis sur la liton kaj ekdormis ŝtone.

Matene li renkontis aliajn instruistojn. Neniu aludis la propran sloganon.

Poste li vidis, kiel pigre, kun jakoj ĵetitaj sur la ŝultrojn kaj kun cigaredoj buŝangule, ili kviete pretigis sin al la foriro, dirante: „Mi ankoraŭ rigardos mian sloganon”. Tiel prezentiĝis iliaj distroj.

„Ĉar, efektive, kion alian oni povus fari en tiu ĉi truaĉo?” – pensis ofte Andreo.

Poste ankaŭ li al kutimiĝis al tio, ke almenaŭ unufoje en semajno li vizitadis la sloganon. Li purigis ĝin de folioj, polvo kaj koto, plibonigis iun literon, ripozis momenton apude kaj salutis kampulojn revenantajn post sia laboro.

Malpli ol kvin monatojn poste estis ŝanĝita la slogano de Andreo, kaj ĝuste oni ŝanĝis la sloganon ĉe plej multaj el la instruistoj.

Paŝku klarigis, ke la ŝanĝo de la sloganon ne okazas tiel ofte, la Partia Komitato faras tion laŭ strikte observataj kriterioj. Disponigante la sloganon ĝi konsideris multajn faktorojn, ekzemple la politikan konsiston de la aŭtoritatoj en la distrikto, provinco aŭ regiono, la nombron de kulakoj, internigitoj, de ordinaraj kaj politikaj malliberuloj, la nombron de komunistoj, la gradon de la ekonomia progreso de la regiono, la rikolto-kvanto de greno el aŭtuna semaĵo, la nivelo de la batalo kontraŭ parazitaj en la agrikulturo, la historiaj-kulturajn tradiciojn de la distrikto aŭ la eksterordinaran situacion en la regiono. Ekzemple oni rakontis, ke kiam foje la lernejestro kaj instruistino kun dubinda biografio estis kaptitaj sen aliaj personoj en la ĉambro, la regionaj aŭtoritatoj tuj decidis ŝanĝi la sloganon: *Vivu la proleta internaciismo al Gardemo, gardemo, ĉiam gardemo kaj Plifirmigi la proletan moralon.*

Kutime la divido de la sloganon estis la lasta punkto dum la kunsido de la pedagoga konsilio, sed la instruistoj plej ofte divenis, ĉu okazos nova divido aŭ ne. Ĉar unu tagon pli frue sekretario Sabafi estis vokita al la Partia Komitato, kaj kiam li revenadis, plej bone estis teniĝi malproksime – li sidis rigida kaj morna kun sento de la tuta politika respondeco.

Sabafi bonege sentis la scivolon de la instruistoj, dezirantaj – kiel eble plej rapide – ekkoni la enhavon de la nova slogano.

Fierege li salutis ilin dekstre kaj maldekstre, kaj tiam – pli ofte ol kutime – ili invitis lin al sia domo. Multaj enviadis tion al Sabafi.

Ĉi-foje la direktoro klarigis, ke la ŝanĝo de la sloganoj okazas pro la atendata vizito de membro de la Politburoo en iu urbo norde kaj pro la veturo de lia aŭtomobilo proksime al ilia vilaĝo.

Dum la divido de la sloganoj malkaŝe sentebliis ekscito kaj streĉo inter la instruistoj. Ĉar la longeco kaj enhavo de la nova slogano decidis la sencon de ilia plua vivo: montris simpatian aŭ malsimpatian de la gvidorganoj.

La direktoro mallaŭte legis la nomon de ĉiu instruisto, kaj poste la sloganon. En la klasĉambro fojfoje estis aŭdeblaj la suspiroj de plifaciligilo aŭ sufokataj krioj de teruro.

La streĉo montriĝis post la slogano de Diana, instruistino el Tirana, kiun Andreo preskaŭ ne konis. Ili renkontiĝis du aŭ tri fojojn sur la ŝoseo, atendante, post semajno da laboro en la lernejo, „okazon” por veni al la ĉefurbo. Tial ke la ŝoforoj ĉiam preferis kunpreni junajn knabinojn, Andreo kutime ankoraŭ longe staradis post la forveturo de Diana, ofte ne ĝisatendante alian kamionon. Senfervore li revenadis al la vilaĝo, kaj la sekvan tagon pasigis ĉe la slogano.

Oni ne scias kial, sed la direktoro malamis Dianan. Tio fariĝis evidenta, kiam li donis al ŝi la kilometran sloganon: *Ni turnu nin al la montaro kaj montetoj, ni faru tie fruktodonajn kampojn.* Sed ĉi-foje la slogano havis kvindek naŭ literojn kaj estis jena: *Oni devas pensi, oni devas labori, oni devas vivi same kiel revoluciuloj.*

Pro kolerego tremis la lipoj de Diana. Ŝi volis ekregi sin, sed ne povis. Finfine ŝi eksplodis:

– Mi sciis, dekomence mi sciis!

– Kion vi sciis, kamaradino? – senemocie demandis la direktoro.

– Mi ne deziras tion, kamarado direktoro! Kiom longe vi traktos min tiel?! Estas malhoneste turmenti min per ĉi tiuj sloganoj kaj mi ne scias, ankoraŭ per kio!

Pro furiozo rompiĝis la voĉo de Diana. Ĉiuj instruistoj sidis rigidaj. Neniu kuraĝis aŭdigi eĉ vorteton.

La direktoro – kvazaŭ nenio estus okazinta – daŭrigis sen konfuzo:

– Mi ne komprenas vin. Vere, mi ne komprenas. Kie vi vidas turmentadon? Kaj eble vi havas ion kontraŭ la slogano? – li eklekis subite. – Estas la sama slogano, kiun kamarado Enver diris en la 7-a Kongreso.

La efiko estis paraliza. Sen kaŝi la malaman rigardon, Diana silentiĝis, ne kuraĝante paroli. La instruistoj strabe rigardis ŝin kun kompato.

La silenton interrompis Gjini, tre modesta instruisto. Balbute kaj kun tremantaj manoj li proponis la solvon, kiu povus malfortigi ilian streĉon:

– Kamarado direktoro, ĉu mi povus interŝanĝi mian sloganon *Marŝi kun la tempo-spirito* kun la slogano de Diana?

– Ne, decide ne – malpermesis la direktoro. – Ni ne sidos ĉi tie la tutan tagon kaj interŝanĝos sloganojn laŭplaĉe! La sloganoj estas politika devo, kaj se iu havas ion kontraŭ la metado de la sloganoj, ni parolos alie – li finis.

Elirante post la kunsido, Andreo aŭdis, kiel Gjini flustras al Diana: „Ne ĉagreniĝu, ne koleru. Mi iros kaj faros vian sloganon, ĉu bone? Unu aŭ du fojojn mi revenos hejmen pli malfrue kaj fino! Aŭ iun posttagmezon ni iros kaj metos ĝin kune, ĉu vi volas? ...” Sed dronigante sin en pensojn, Diana ne aŭskultis lin.

„Ho, kiel belega ŝi estas!” – pensis Andreo, vidante la suferplenan vizaĝon.

Li ricevis la sloganon *Ju pli forta estas la Proleta Diktaturo, des pli fortas la Socialisma Demokratio*. Li ne terurigis pro ĝia longeco. Li eĉ sentis alfluon de energio, kiam li aŭdis la opinion de la direktoro:

– Andreo, viaj sloganoj bone impresis min, bravulo!

– Dankon – ekĝojis Andreo.

Du jarojn li zorgadis pri la sama slogano. Li vizitadis ĝin ofte, kaj kiam semajnfine li ne volis resti hejme kaj sentis la solecon, ĝi servis al li kiel la lasta savilo. „Gloron al Dio, ke mi ĝin havas! Se ne tio, kion mi povus fari en ĉi tiu dezerto?” – li pensis dum la purigado kaj polurado de la ŝtonoj.

Iun aŭtunan tagon, kiam sur la malplena ludoplaco ĉe la lernejo li fumis cigaredon, li renkontiĝis kun Diana.

– Kion vi faras? – li demandis.

– Nenion – ŝi respondis.

– Bela vetero – li diris.

– Jes.

– Do, ni iru al la sloganoj.

– Kiucele? – li aŭdis. – Delonge ne pluvis.

– Kaj folioj... Folioj povis fali sur ilin?... Cetere, kiel vi volas.

– Bone – ŝi konsentis sen fervoro.

Malrapide ili iris sur la pado.

Ĉe la torento, kie la vojeto disbranĉiĝis, Diana prenis akvon en la polmojn, malsekigis siajn vizaĝon kaj harojn, denove ŝi ĉerpis akvon kaj priŝprucis la vizaĝon de Andreo. Li estis konfuzita.

Diana ekridis kore, sed li rapide trankviliĝis kaj faris la samon.

Tiam ŝi ankoraŭfoje priŝprucis lin per akvo kaj forkuris.

Ne estis necese ludi malsaĝulon, Andreo kuraĝiĝis, ĉerpis akvon per ambaŭ polmoj, kuris post ŝi, atingis la knabinon ĉe la arbo, spiris profunde kaj priŝprucis ŝin. De la ŝultroj de Diana la akvo fluetis malsupren, la malseka robo kelkloke

algluiĝis al la korpo. Nemulte pensante Andreo ĉirkaŭprenis ŝian kolon kaj alpremis ŝin forte kiel infanon.

Sed la knabino elglitis kaj siblegis:

– Ne!

– Kial ne? – li elbalbutis, kaptante spiron.

– Ĉar mi ne volas – ŝi respondis kaj foriris malrapide al sia slogano sur la monteto. „Kial, diable, ŝi priŝprucis min per akvo, se ŝi ne volas?” – ekĝemetis Andreo kaj ĉagrenite trenis siajn piedojn en la direkto al sia slogano. Efektive la ŝtonoj estis puraj, ili konservis eĉ la freŝan blankon de kalko, ie kaj tie kuŝis nur kelkaj sekaj folioj. Li kolektis ilin kaj ne sciante, kion plu fari, li ekiris sur la monteton de Diana.

Li miris vidante, ke ŝi sidas apud la slogano *Oni devas pensi, estas necese labori, oni devas vivi same kiel revoluciuloj*, super-ŝutita de folioj.

Ŝi estis kvazaŭ spiritforesta. La robo ankoraŭ ne sekiĝis.

Li eksidis apude kaj diris pente:

– Mi petas vian pardonon.

– Pro kio? – ŝi demandis.

– Pro tio, kio okazis.

– Ah, mi preskaŭ forgesis.

– Kial vi ne forprenos la foliojn? – li demandis.

– Tiel ĝi plaĉas al mi pli multe: tute en folioj, kaj ne tiel blanka, kiel en malsanulejo. Kun folioj estas pli romantike, ĉu ne? – Diana impresis, ke ŝi parolas al si. – Kvazaŭ ĝi esprimus ion alian kaj estus revolucia-romantika slogano.

– Revolucia romantiko... – murmuris Andreo kaj ambaŭ ekridis. – Tamen ni devos ordigi ĝin – li konstatis kaj komencis forbalai la foliojn.

Diana observis lin el sub duone mallevitaj palpebroj. Post momento ŝi ekstaris, malrapide alproksimiĝis, forĵetis haste folion kaj delikate tuŝis la manon de Andreo. Li ne reagis. Li estis laboranta kun mallevita kapo.

Tiam ŝi kunpremis lian manon, rigardis en la okulojn, kaptis la kapon per ambaŭ polmoj, turnis kaj subite kisis lin.

Ili falis sur la molan teron, inter la vortoj „kiel” kaj „revoluciuloj”. Ili ne rimarkis, ke en la vorto „revoluciuloj” ili detruis unu literon per siaj impetaj piedmovoj.

Al la vilaĝo ili revenis malfrue vespere.

Sekvatage unu salutis la alian indifere, kvazaŭ nenio estus okazinta. Sed de tiam ili vizitadis pli ofte siajn sloganojn.

La monotonecon de la vilaĝa vivo interrompis la okazaĵo kun Lleshi, plej aĝa instruisto, laboranta en la malgranda, unuklasa filio de la lernejo de Andreo, en vilaĝo atingebla post du horoj de marŝado ĝis la kooperativa centro. Laŭleĝe la

direktoro devis vizitadi ĉi lernejon du fojojn en jaro. Sed ĉar ĝi troviĝis malproksime, li venadis tien pli kaj pli malofte.

La katastrofo okazis dum la lasta kontrolo, kiam en iu forlasita ravino, proksime al la lernejo de Lleshi, la direktoro – kun mirego – trovis la sloganon *Vjetnamio venkos*.

Li staris rigida. Jam preskaŭ dek jarojn Vjetnamio estis libera! Sed – pli malbone – la slogano estis tre bone zorgata, eĉ kun videblaj freŝaj kalkspuroj.

Komence la direktoro ne sciis, kion fari. Li ŝatis Lleshion, des pli ke ili ludadis kune ŝakon. Lleshi mem distingiĝis per granda sindonemo al la devoj kaj ne estis unu el tiuj, kiuj ŝercemas.

Tamen li ne povos elturniĝi senpune. Ĉar la direktoro estus akuzita pro manko de gardemo.

Do, en la plej baldaŭa kunsido la direktoro diris, ke al la tagordo li aldonos la aferon de Lleshi.

En la tago de la kunsido Lleshi venis du horojn pli frue. Estis malagrabla rigardi, kiam – flava kiel vakso – li fumis cigaredon post cigaredo, devigante sin al kvieto kaj kolegeco.

En iu momento li vokis al la instruistoj sur la ludejo:

– Sinjoroj, delonge ni jam ne ludis... eble ni aranĝu ŝakan konkurson?

Paŝku rigardis lin kompate kaj diris:

– Lleshi, kiu nun pensus pri la ŝakludo?

– Vi vidos, Paŝku, se ni ludos, mi venkos plene – Lleshi ridis laŭte.

Sed neniu el la instruistoj ekridis.

Dum la kunsido – ĝis la momento, kiam pritraktiĝos la afero de la slogano pri Vjetnamio – ĉiuj aŭdis, kiel la piedo de Lleshi mallaŭte frapfrapas la benkon. Li havis malfacilajn momentojn. Li jam alkutimiĝis al senĉesa laŭdado, kaj hodiaŭ ne okazos same.

La direktoro prezentis la aferon mallonge. Ŝajnis, ke li volas pritrakti ĝin laŭ formala maniero. Vortavare li rakontis pri la okazaĵo, kaj poste li petis Lleshion:

– Diru, kiel tio okazis?

– Kio okazis? – Lleshi ekmiris.

Silentigis. Lleshi ekstaris kaj mallerte serĉis ion en la poŝoj. La ceteraj atente observis liajn movojn. Finfine Lleshi elprenis ĉifitan paperfolion kaj tiam klariĝis, ke li pretigis sian parolon skribe.

Li kroĉis la okulojn al la paperfolio, sed ne povis elbuŝigi vorton. Pro aflikto li ne komprenis, ke li tenas ĝin returnita. Gjini, kiu sidis apude, flustris:

– Streĉu vian atenton, Lleshi, rigardu, kiel vi tenas la folion!

– Aĥ, dankon, Gjini – suspiris Lleshi kaj ĉirkaŭrigardante li komencis:

– Kamaradoj...

Li eĉ ne diris la sekvan vorton, ĉar la direktoro interrompis lin:

– Ho, neee, Lleshi, ni ja ne bezonas ĉi tie grandajn disputojn! Rakontu, kiel okazis pri tiu slogano kaj ni finos la kunsidon! Oni devus nur kompati Lleshion. Liaj okuloj kun malhelaj ombringo sube montris, kiom longe li penigis sin, por skribi ĉi parolon. Sed ĉiuj volis – kiel eble plej rapide – fini la kunsidon, do Lleshi miksante vortojn klopodis mallonge rakonti ĉion.

Laŭ li – tro fervora partia sekretario kun la nomo Nik obstiniĝis antaŭ multaj jaroj, ke sloganoj estu metataj eĉ en la plej foraj lokoj. „Kie estas nur eble”, li diradis. „Tie, kie oni vidas ilin kaj kie ili ne estas videblaj”.

Lleshi ricevis la sloganon pri Vjetnamio kaj preparis ĝin laŭ ĉiuj reguloj. Baldaŭ ĝi estis forgesita kaj neniu diris al Lleshi, ke li ĉesu okupiĝi pri la slogano, do ĉiusemajne, post la lecionoj, kun lernantoj aŭ sola, li zorgadu tiel, ke ĝi aspektu plej freŝe.

– Nu, bone, sed Vjetnamio delonge estas libera! – kriis Sabafi.

– Ili ja donis al mi tiun sloganon kaj mi ripetis: neniu diris, ke mi ĉesu zorgadi pri ĝi – malcedis Lleshi, konvinkita pri la propra senkulpeco.

Plua diskuto ne havis sencon. Oni povis riproĉi al Lleshi nur la malbonan konon de la internacia situacio.

– Kion oni povus atendi de li? – flustris Paŝku al Andreo.

Sed kiam la direktoro, fermante la kunsidon, diris senintence, ke al Lleshi mankis „la ĝusta engaĝiĝo en la observadon de la aktuala situacio internacia”, li respondis tuj:

– Mi ne akceptas viajn vortojn! Se mi bone scias, al Vjetnamio kroĉis sin kaj plu kroĉas la kapitalismaj landoj.

– Jes, kompreneble – murmuris la direktoro, kolera, ke li tuŝis ĉi temon.

– Rapide forigu la sloganon kaj estos la fino por la tuta afero.

La instruistoj kapjesis al la direktoro, kolektis siajn aĵojn kaj pretigis sin al la foriro, jam sentante, ke li elturniĝis senpune, ne cedis tiel facile.

– Kun via permeso, kamarado direktoro! – li leviĝis kaj daŭrigis kun interna fervoro: – Kamaradoj, mi klopodis labori honeste, gardi la sloganon kiel necese kaj...

– Ho, ne, Lleshi – la direktoro tute perdis sian paciencon – neniu dubas pri via honesteco! Se vi forprenis la sloganon, neniu punos vin, sed komprenu: ĝi ne plu aktualas de jaroj!

– Bone – plivigliĝis Lleshi – donu al mi unu el tiuj, kiujn oni diras aktualaj.

– Kion mi donu al vi?! – la direktoro muĝis de furiozo. – Kiun sloganon mi donu por tiu merda truaĉo?!

Tiam Lleshi – konvinkita, ke la direktoro volas ekscii, kiu slogano estas bezonata – deklamis:

– Nu, kiun? Jankioj, la manojn for de Vjetnamio.

La instruistoj elbuŝigis la kolerplenan „hooo”, kaj la direktoro – sentante, ke li havas nenian ŝancon daŭrigi la seriozan kunsidon – tuj fermis ĝin.

La instruistoj saltleviĝis, rapidante al la pordo. Lleshi eliris kiel la lasta. Silente li elprenis cigaredon, bruligis ĝin malrapide kaj profunde enspirinte la fumon li elflustris: „Mi jam estas perdita”

La novaĵo, ke Lleshi ricevis neniun sloganon, hastis fulmrapide tra lia vilaĝo.

La edzino de Lleshi, Maria, sidis de tiam kun acida mieno kaj teniĝis malproksime de siaj koleginoj el la brigado.

Kelkajn tagojn poste amikino demandis ŝin kompateme:

– Ĉu tio, kion babilas ĉe ni homoj, estas vero?

– Pri kio vi pensas?

– Ni aŭdis, ke de via edzo, Lleshi... (mi pardonpetas, tiel ni aŭdis) – estis forprenita la slogano. Tio signifas, ke li restis sen iu ajn slogano.

Maria hontigite mallevis la kapon.

– Jes – ŝi respondis – tio estas vero, kaj mi diros al vi sincere, ke mi ne ĉagreniĝas tiom pri ia slogano, kiom pri Lleshi. Ni perdis la tutan kvieton. Li nek dormas, nek manĝas – eĉ pri niaj infanoj li ne zorgadis tiel, kiel pri tiu slogano.

La amikino provis konsoli ŝin.

– Ne ĉagreniĝu, okazos nenio granda. Li forigu ĉi sloganon kun tiu ŝtato – (kiel ĝi nomiĝas? Tio elflugis el mia kapo) – li iom sidu hejme sen slogano, kaj kiam ĉio estos forgesita, li povos skribi peti novan sloganon.

– Vi pravas – konsentis Maria – la tuta zorgo estas en tio, ke li perdis ĉian fervoron kaj nenio lin ĝojigas. Li estas rompita per tiu ĉi afero. Li ne alkutimiĝis al kritiko.

Tiam la amikino diris ion, kio mirigis la tutan brigadon:

– Por sankta kvieto li elpensu sloganon kaj metu ĝin kaŝe, sur la propran korton – tiun kun Vjetnamio aŭ iun alian. Infanojn vi havas grandajn, ili helpos vin kaj zorgados pri via slogano.

Maria estis konsternita.

– Ĉu kaŝe? – ŝi demandis.

– Kial ne? – insistis la aliaj koleginoj.

Ĉu Lleshi obeis al iliaj konsiloj – oni ne scias. Estas nur certe, ke neniam plu li petis novan sloganon.

Du semajnojn post tiu okazaĵo la direktoro kun Sabafi vokis Andreon en la kabineton kaj diris metante la manon sur lian ŝultron.

– Nun vi ricevos ion eksterordinaran. Ĉu vi vidas la muron de la tenejo sur la monteto? Malbelan kaj tiel malplenan, ke ĝi frapas ĉies okulojn? Kune kun kamarado Sabafi mi decidis, ke oni devus tie pentri oleofarbe grandan sloganon.

Sabafi kapjesis.

– Vi devus fari tion sola, ĉar al la lernantoj oni malpermesas tian laboron. Vi ricevos eskalojn, penikojn kaj farbojn. La slogano estas jena: *Vivu la diktaturo de la proletaro*.

Andreo akceptis sian taskon kviete. Sed forironte el la kabineto, li turnis sin kaj demandis ĝentile:

– En kiu koloro estu la slogano?

La direktoro ridetis malice kaj strabante Sabafion li respondis:

– Memkompreneble, Andreo. Ruĝa.

La tenejo estis griza, polvoplена domaĉo. El ĝiaj muroj elstaris kelkloke grandaj, dikaj kaj akraj ŝtonoj. Andreo ne veturis por dimanĉo al Tirana kaj laboris du tagojn senĉese: sabate posttagmeze li komencis mezuri la muron, kaj dimanĉe ekpentris literojn per minio (ruĝan oleofarbon li ne trovis en la tenejo). Dum li estis pentranta, la likvaĵon ensorbis fendetoj en la muro, la literoj perdiĝis sur malebenaj ŝtonoj, la malnova stukaĵo defalis post tuŝo de la peniko. Andreo ne antaŭvidis tiajn malfacilaĵojn.

– Sukceson, instruisto Andreo – de tempo al tempo salutis lin knaboj. – Tre bele ĝi aspektas.

– Dankon! – li respondadis sur la eskalo, laboregante obstine, polvokovrita kaj farboŝmirita de la plandoj ĝis la kapo.

Marta, estrino de la brigado por maizo-kulturado, grasdika belulino, konsilis:

– Atentu pri viaj manoj, instruisto Andreo! Se la farbo difektos ilin, vi ne plaĉos al la knabinoj en la ĉefurbo.



Andreo sincere ridis pro la ŝerco.

Vespere li rekonis, ke la slogano ne prezentigaŝ kiel necese. Por la antaŭa slogano, sur la monteto, li povis ebenigi la teron. Ĉi tie, pri la muroj de la tenejo, nenio estis farebla.

Li finis pentri malfrue, nekontenta pri sia laboro. Li havis malbonan antaŭsenton – kaj ne eraris.

Du tagojn poste, la direktoro kaj Sabafi alvokis lin urĝe.

– Pro kio vi fuŝis ĝin tiel, Andreo? Vi alarmis la tutan distrikton – eksplodis la direktoro (oni diradis, ke en furiozo li ne estas bridebla).

– Kial? – Andreo demandis feblavoĉe.

– Nu, „kial?!“ – La direktoro ne sciis, kiel montri sian furiozon antaŭ Sabafi. – Per kio vi skribis la sloganon, ĉu per la manoj aŭ per la piedoj? – li strabis al Sabafi, kvazaŭ demande: „Kion ni faru pri li?”

Sed la vizaĝo de Sabafi estis rigida. La afero prezentiĝis multe pli aĉe ol malbone.

Andreo provis ekscii, kio vere okazis. Oni diris tion al li poste: estis la kontrolo de la sekretario pri propagando en la distrikto, kaj kiam li kontrolis ĉiujn sloganojn el ŝtonoj, lia rigardo sin kroĉis al la slogano sur la muro de la tenejo. Li alproksimiĝis, silentis kvin minutojn kaj poste – kribrante la vortojn – li demandis Sabafion:

„Kiu ĝin skribis?”

– Andreo! – li rapidis kun la respondo. – La instruisto de biologio, el Tirana, kamarado sekretario.

La sekretario revenis al la oficejo de la kooperativo, dirante eĉ ne vorton. Ĉiuj, kiuj sekvis lin, pensis, ke li forgesis pri la tuta afero. Sed tuj poste, kiam li eniris la ĉambron de la partia organizaĵo, li turniĝis kaj, post momento de peza silento, ekleklis: „La slogano estis skribita sen konvena engaĝiĝo!”

La aludo estis klara.

Por Andreo venis nun tagoj de plena soleco. La instruistoj parolis kun li malvarme. Sabafi evitadis lin.

Du tagojn poste Andreo estis vokita al la partia organizaĵo. La ĉefan riproĉon faris Sabafi, kiu serĉante ĝustajn, kaj ankaŭ trafajn esprimojn, komencis la diskuton jene:

– Kamarado Andreo, la partia organizaĵo volus ekscii, kio estis la kaŭzo aŭ prefere realaj faktoroj, kiuj puŝis vin, inklinigis aŭ – ni tion diru klare – instigis skribi aŭ, dirante pli klare, fuŝi, do skribaĉi *Vivu la diktaturo de la proletaro*? Ni diru malkaŝe. Mi volus, ke vi klarigu al la organizaĵo honeste, kiu staras post tio.

Ekreĝis tomba silento. malpuraĵo sur la muro de la tenejo, malnova stuko – Nun – fulmrapide interrompis Sabafi. – Nebona stuko, nebona tio, nebona alio, tiamaniere ni finos neniam!

– Do, kio, laŭ via opinio, kamarado Sabafi? – demandis Andreo mirigite.

– Vi ekscios ĝustatempe – kribris la vortojn Sabafi. – Sed estus pli bone, ke vi mem diru tion. La partia organizaĵo ne havas tro multe da tempo, por okupiĝi pri tiaj aferoj, bona knabo. Mi pensis, ke vi malfermos antaŭ ni la koron, kaj poste vi prezentos principan memkritikon, sed mi vidas, ke tio ne okazos. Do, kamaradoj – li ektusetis kaj per la voĉo unu tonon pli laŭta daŭrigis – estas tro malmulte dirite, ke Andreo pentris la sloganon sen engaĝiĝo kaj ne tro kontenta pri la diktaturo de la

proletaro. Tiun ĉi aferon ni traktu pli atente. – Nun Sabafi mallonge analizis la klasbatalon, kaj poste diris:

– La ĉefa kaŭzo estu serĉata en la vivo de la parencoj de Andreo kaj en la rilatoj inter la familianoj dum la milito: unu onklo mortigis sin, la alian oni internigis, kaj Andreo mem... Ĉu vi ne vidas, kamaradoj-komunistoj, kiel ruze la malamiko – jes, la klas-malamiko! – provas sin kaŝi antaŭ la Partio, kiu bonvoleme donis al li sian helpan manon, por eltiri lin el tiu marĉo? Kaj li ne deziris tion.

Andreo ne komprenis, kio okazas. Li estis konscia nur pri tio, ke ĉi tie decidiĝas liaj vivo kaj sorto.

– Haltu, kamarado – unu el la komunistoj-veteranoj, konata pro sia sento de justeco, interrompis Sabafion. – Ni jam ne troigu.

Sendube la instruisto kulpas, sed ne tiom multe, ke oni nomu lin klas-malamiko. Mi konsilus iom bremsi vian fervoron.

Andreo jam ne sekvis tion, kion ili parolas. Fine ili petis, ke li forlasu la kunsidon, ĉar ili devos fari decidon. Pli-malpli unu horon poste eliris la ĉambron Sabafi kaj komunikis senemocie:

„La partia organizaĵo decidis, ke ĉi-foje vi ankoraŭ ne estos punita. Nur ses monatojn de reedukado en produkta brigado”.

– Mi dankas vin – diris malvarme Andreo.

Li estis sendita por labori en la brigado de Marta. La kampuloj akceptis lin nefideme. Li laboris pene kaj poste, kiam li revenis hejmen, li falegis elĉerpita sur la liton, kiel ŝtupo.

De tempo al tempo li devis legi gazetojn por la brigadanoj.

Marta traktis lin bone. Ŝi ofte ŝercis pri liaj manoj delikataj „kiel ĉe infano”. Iun tagon ŝi eksidis apud li, kiam li tagmanĝis solece, kaj diris:

– Posttagmeze vi laboros ĉe la maizo-rikolto sur la kampo antaŭ la monteto. Se vi bezonos helpon, mi helpos al vi.

– Dankon – koleretis Andreo. – Mi ne bezonas vian helpon.

– Hooo – ekridis Marta – vi ne volas iom labori kun mi? – Ŝiaj dikaj mamoj ŝanceliĝis.

Andreo rigardis volupteme.

Posttagmeze ŝi trovis lin inter la altaj kreskaĵoj, kie li deŝiris foliojn de la maizaj spadikoj. Ankaŭ ŝi komencis fari tion. Poste, sen vortoj, li ĉirkaŭprenis ŝin kaj ili falis en koton. Kaj pli malpurigis sin, ĉar ekpluvis.

Ili revenis kaŝe tra krepusko, sur la maizkampoj, ĉiu en sia direkto. De malproksime bojis hundoj. Andreo havis veston malsekan ĝis la lasta fadeno.

Post ses monatoj Andreo revenis al la lernejo. La direktoro akceptis lin bone, kvazaŭ nenio estus okazinta. Li diris al li la novan sloganon, kaj kiam Andreo turniĝis forironte, li aldonis:

– Mi forgesus, Andreo: lastatempe kelkaj instruistoj, tiuj malpigraj, anstataŭ naturajn ŝtonojn komencis uzadi por la sloganoj blankajn brikojn. Laŭdire tio devus pligrandigi la estetikan valoron, sed praktike nur senmoraligis lernantojn. Ili komencis ŝteli brikojn el la konstruoloco, ĉiutage oni vidis, ke ili ŝtelas kaj venas al la lernejo kun tornistro sur unu ŝultro kaj kun sako da brikoj sur la alia. Kompreneble la Distrikta Partia Komitato tuj kontraŭstarigis, sed – dirante sincere – tio senigis la sloganojn je la naturaj originaleco kaj spontaneco, kun kiuj la nacio esprimas proprajn opiniojn uzante tiucele lokajn rimedojn aŭ – se diri per aliaj vortoj – tion, kio troviĝas ĉemane...

Andreo kaj la direktoro rigardis en la okulojn.

–Ŝtonaj sloganoj

– Vi pravas, kamarado direktoro – afable respondis Andreo. – Mi atentis pri tio. Kaj kiam li eliris malantaŭ la pordon, li komencis kalkuli enpense la literojn de sia nova slogano.



elalbanigis

Bardhyl Selimi (Albanio)

Chiung Yao (1938-)



Chiung Yao estas moderna verkisto de Tajvano, Ĉinio

En profunda korto (7)

7.

Ekde tiu nokto, Fang venis al la kompreno, ke

aŭtorino, Chiung Yao (Ĉinio)

tute ne ekzistas amikeco inter ŝi kaj sinjorino Bai. Pli ol tio, ili, preskaŭ dekomence, fariĝis malamikoj. Fang anticipis, ke estos tagoj malfacile trakteblaj poste. En la komencaj tagoj, ŝi tenis singardemon, atendante la tempeston venontan en iu ajn tempo. Tamen nenio okazis. Ŝi trovis, ke ŝi preskaŭ ne vidas Ailin. Ĉiumatene, kiam ŝi iris al la lernejo kun Tingting, Ailin ankoraŭ estis en la lito. Posttagmeze, kiam Fang revenis hejmen kun Tingting, Ailin probable jam eliris delonge kaj ŝia foresto daŭris ĝis la profunda nokto. Tiaj tagoj pasis trankvile. Kaj malaperis iom post iom ŝiaj maltrankvileco kaj timemo, kiujn Fang ekhavis en komenca tempdaŭro, kiam Fang ekloĝis en la hejmo de Bai.

Nun Fang ekabsorbis sin en zorgado pri la farto de Tingting. Por matenmanĝo, ŝi certigis, ke Tingting prenu glason da lakto, kaj ovon. Por tagmanĝo, Tingting manĝis el la kunportata gamelo, kies enhavon Fang persone kaj Yazhu kune preparis laŭ diskutita menuo por pliiĝi la nutrecon kaj variecon de la manĝaĵo. Dume Fang mem manĝis en la manĝejo de la lernejo, ĉar ŝi neniam al kutimiĝis preni manĝon el gamelo. Nun la vespermanĝo fariĝis plej serioza, ĉar oni ne scias de kiam Bai Peiwen ŝatis malsupreniri por preni manĝon. Dum manĝado, ofte aŭdiĝis ridaj paroloj de Tingting kaj montriĝis milda zorgemo de Fang. Bai Peiwen malofte ekparolis, sed li ofte spertis ĉion ĉirkaŭ li per akra sento. Kelktempe, li haltigis la moviĝon de manĝbastonetoj nur por atenteme aŭskulti babiladon inter Fang kaj Tingting.

Ŝanĝado de Tingting estis rapidema: ŝiaj vangoj sane ekrugiĝis, ŝia staturo mirige plialtiĝis, ŝia manĝado obliĝis... La plej granda ŝanĝo estis ŝia ridado senĉesa dum la tuta tago, arĝentintile fluganta tra la tuta domo. Ŝia ĝojema karaktero jam plene manifestiĝis. Ŝajne ŝi havis neelĉerpeblan ĝojon tra la tuta korpo. Tuttage ŝi birde alkraciĝis sin al Fang. Eĉ bonkora Yazhu, kun larmoj, diris al Fang, “La

knabino kreskas pli kaj pli bone. Jam de longe ŝi bezonis prizorganton kiel instruistino Fang.”

Fang trankvile okupiĝis pri sia nuna laboro, eĉ dronante en la ĝojo el la laboro. Portempe ŝi forgesis Usonon kaj Yali. Jes, Yali, li letere riproĉis ŝin per tiaj severaj vortoj, kiaj malsaĝulino, frenezulino kaj sensenta kaj senrespondeca virino. Li faru kion li volas. Li ĵetu insultajn vortojn laŭplaĉe. Ŝi havas komprenon pri Yali. Post tri monatoj, li amikiĝos kun alia fraŭlino, ĉar li ne volontas dronigi sin en soleco.

Bai Peiwen iris al Taibei dufoje en ĉiu semajno. Fang sciis, ke li iras al sia fabriko por prizorgi negocajn aferojn. La manaĝero de la fabriko estis pli-ol-kvindek-jara maljunulo kun familia nomo He, kiu ofte vizitis Domon Bai por fari raportaĵojn aŭ telefone interkonsiliĝis kun Bai pri la aferoj en fabriko. Fang mirplene trovis, ke, kvankam kripla, Bai povas pritrakti tiujn aferojn senprokraste, ĝisfunde kaj decideme. Ĉiufoje, kiam Fang aŭdis lin telefone ordoni al manaĝero He, kion fari, ŝi ekpensis kun lamenta suspiro, “Se li ne estus blinda!” Se li ne estus blinda, kio okazus do? Ŝi ofte fokusigis sian atenton sur tiun vizaĝon, la viran vizaĝon, firman, decideman kaj aplomban... Se foriĝus melankolio ĉe liaj brovoj, kaj tristo kaj senhelpeco ĉe liaj buŝanguloj, li aspektus bele! Sufiĉe bele! Ŝi ofte kontemplis stupore pri li. Antaŭ dek jaroj, kiam li estis juna sen kripteco, kiel li statis? Liaj tagoj trankvile forglitis. Ĉu trankvile? Ĉu vere trankvile?

Dimanĉe posttagmeze. La unuan fojon Fang Siying forlasis Tingting-on kaj iris sola al Taibei, kie ŝi faris multajn aĉetojn. Revenante kun pakitaj aĉetitaĵoj en siaj brakoj, ŝi surprizite trovis, ke Tingting, sidante sur la ŝtuparo en la ĝardeno, mienis ĉagrene, kun la kapo apogita per brakoj.

“Kial vi sidas ĉi tie, Tingting?” demandis Fang mirigite.

“Mi atendas vin,” diris kompatinde la knabino, kies buŝangulo ekkonvulsiiĝis. “Venontfoje, kiam vi iros al Taibei, kunportu min, ĉu bone? Mi kondutos bone, kaj ne ĝenos vin.”

“Ha!” Fang apenaŭ retenis ridon. “Tingting, vi jam fariĝis alkroĉiĝema. Devu esti sendependa! Nu, ĝojiĝu. Mi jam revenas nun, ĉu? Ni supreniru. Mi volas montri ion al vi.”

La knabino ekhezitis. “Ne eniru tuj,” ŝi diris mallaŭte.

“Kio okazis?” Fang demandis mirigite. Post momenteto, ŝin trafis subita surprizo, ĉar ŝi jam vidis la purpuraĵon sur ŝia vango grandan kiel taso. Vidante la lezon, ŝi klinis sian korpon kaj demandis, “Kie vi ricevis tiel grandan kontuzon? Ĉu vi stumble falis teren?” Skuinte la kapon, la knabino mallevis siajn palpebrojn.

“Panjo kaj paĉjo havis teruran kveleradon,” ŝi diris.

“Ĉu via panjo ne eliris?”

“Ne. Ŝi ankoraŭ troviĝas en kolero en salono nun.”

“Pro kio ili kverelis?”

“Pro mono. Panjo volis sumon da mono, sed paĉjo ne donis.”

“Ho, mi komprenas.” Fang kompreneme ĵetis rigardon al la kontuzo sur ŝia vango. “Do vi ricevis revenĝon de via panjo pro tio denove. Ĉu ŝi pinĉis vin?”

Antaŭ ol la knabino respondis, la vitra pordo subite malfermiĝis. Levinte sian kapon, Fang tuj vidis, ke Ailin staras en la pordo kun kolera mieno. Kun rektigita svelta korpo, tiu staris kaj fiksas siajn belajn, sed glacie malvarmajn okulojn sur Fang. Aŭtomate Fang rektigis sian korpon, renkonte al ŝia rigardo, atendante ŝian parolon. “Vi nenecese demandu al ŝi,” aŭdiĝis malvarma kaj seka voĉo de Ailin. “Mi povas diri al vi, ke mi pinĉis ŝin. Kion do?”

“Vi...vi ne devus pinĉi ŝin!” Fang aŭdis sian voĉon kolera, kuraĝa, tremanta kaj forta. “Ŝi ne ofendis vin, kaj vi ne devus elŝuti vian koleron sur la infanon!”

“Hm!” El la okuloj de Ailin ŝprucis fajro. “Kiu vi estas? Ĉu vi rajtas zorgi pri la aferoj de mia familio? Vi estas guvernistino de mi pagata je du mil dolaroj ĉiumonate. Ĉu vi estas konsiderata kiel defendanto de Tingting? Jes, mi batis ŝin. Ĉu tio koncernas vin? La leĝo ankoraŭ ne difinas, ke patrino ne rajtas puni sian infanon. Mi batis ŝin, pro tio, ke ŝi ne volas kondukti bone, ŝi mensogas, ŝi agas ŝtele kiel la fantomo de sia mortinta patrino! Jes, mi batis ŝin! Kion vi povas fari al mi?” dirante, ŝi rapide levis sian manon kaj donis klakan vangfrapon al Tingting, antaŭ ol Fang komprenis, kion ŝi volas fari. Tingting, kiu staris tremanta ĉe Fang, ne atendis, ke ŝi ricevos baton ĝuste ĉe ĉi tiu momento, tiel ke la klake sonora vangfrapo solide falis sur ŝian vangon kaj pro tio ŝi preskaŭ stumble falis teren sen firma staro. Fang eligis panikan ekkrion, kaj ĉiuj pakajoj en ŝia brakumo disĵetiĝis teren pro etendiĝo de ŝiaj brakoj. Ŝi sin alĵetis kaj sukcesis subteni Tingting-on. Starante antaŭ Tingting, ŝi eksciitiĝis, kaj eĉ frenezigiĝis, kun miksitaj sentoj de surprizo kaj doloro. Anhelante, ŝi gapis al Ailin, kaj tremante tra la tuta korpo pro ekscitiĝo, kriis, “Vi ne rajtas bati ŝin! Vi ne rajtas! Vi...” Ŝi ne plu povis eligi vortojn. Indigno ŝtopis ŝian gorĝon kaj streĉigis ŝian spiradon.

“Ĉu mi ne rajtas fari tion?” La brovoj de Ailin alte leviĝis. Ŝi aspektis minaceme. “Vi foriĝu! Hodiaŭ mi nepre batu ĉi demoneton ĝis la morto! Ni vidu, ĉu ŝi ankoraŭ ludas la rolon de kompatindulineto!” Denove ŝi sin alĵetis. Fang rapide puŝis Tingting-on malantaŭ sian dorson kaj elstarigis sin ĉe la fronto. Dum ĉi tiu momento, ŝi havis nenian alian ideon ol protekti la infanon, eĉ oferi sian vivon. Ailin, kiu jam sin alĵetis, kelkfoje etendis sian manon por kapti la infanon kaj malsukcesis pro tio, ke Fang intervenis per barado. Sekve ŝi kvazaŭfreneze frapadis la korpon de Fang, kiu eltenis kaj obstine protektis la knabinon.

Ailin komencis akute insulti, “Kial vi ŝovas vian nazon en fremdan vazon? Kiu dungis vin kiel korpgardiston? Vi maljuna fraŭlinaĉo! Vi sorĉistino kun anormala

psiko! Tuj foriĝu malproksimen! Tiu ĉi eta bastardino ne estas via propra! Se vi vere volas insiste zorgi pri ŝi, ni atendu kaj vidu. Mi suferigos vin pro tio!”

Subite aŭdiĝis eksploda voĉo de Bai Peiwen, “Ĉu vi freneziga denove, Ailin!” “Bone, venas alia intervenanto!” diris Ailin, anhelante. “Ŝajnas, ke vi havas grandan potencon! Kia alianco! Blindulo, maljuna fraŭlinaĉo kaj eta bastardino! Kia potenco! Mi ne povas riski ofendi vin, sed ni pesu la aferon! Ni atendu kaj vidu!” Post tio, forlasinte ilin, ŝi grandpaŝe rapidis en remizon. Sen la ŝoforo Maljuna You, ŝi mem startigis la aŭton kaj fulme forveturis.

Siaflanke, pro tia ofendiĝo, Fang neniel povis regi siajn sentojn. Eĉ sen ekzameni la vundon de Tingting, ŝi malgraŭe sturmis preter Bai Peiwen, suprenkuris la ŝtuparon kaj sin ĵetis en sian ĉambron. Ferminte la pordon, ŝi faligis sin sur la liton, demetis siajn okulvitrojn kaj komencis ploregi laŭtvoĉe.

Post momenta plorado, ŝi aŭdis malpezan frapadon je la pordo. Kvankam ŝi ignoris tion, la porda anso turniĝis kaj la pordo puŝmalfermiĝis. Iu alkuris al ŝia litrando. Ŝi sentis, ke Tingting, plorsingultante, puŝetis ŝin, mallaŭte kaj milde kriis, “Instruistino, ne ploru! Instruistino!”

Levinte la kapon, Fang vidis tra larmvualo la ruĝan kaj svelintan vangon de la knabino. Permane karesante ŝian vunditan vangon, Fang altiris ŝin en sian sinon, kun neniel retenebla plorado. Plorante, ŝi dolore laŭte eligis, “Tingting! Ho ve, vi etulineto kun amara sorto!”

Inspirate de ŝiaj vortoj, Tingting sentis tristecon el interne. Ĉirkaŭprenante la talion de Fang, ŝi enŝovis sian kapon profunden en ŝian sinon kaj eksplodis per ploro. Ĝuste kiam ili ambaŭ ploradis, Bai Peiwen malpeze eniris. Starante longan momenton, li eligis longan suspiron.

“Mi bedaŭras, fraŭlino Fang,” li diris kun interna doloro.

Forviŝinte siajn larmojn, Fang, post longa momento, sukcesis fini sian ploradon. Ŝi puŝlevis Tingting-on kaj viŝis per mantuko la vangon de la knabino. Jam nun ŝi povis regi sin. Munginte sian nazon kaj profunde spirinte, ŝi altrudis rideton kaj diris al Tingting, “Ne ploru, bona infano. Estas mia kulpo plorigi vin. Nun, lavu vian vizaĝon kaj alportu miajn pakaĵojn el sube, ĉu bone?”

“Bone,” obeeme diris Tingting. Ĉirkaŭprenante la kolon de Fang, ŝi kisis ŝian vangon kaj malsuprenkuris la ŝtuparon.

Ĉi tie Fang silentis longe, dum Bai restis senparola. Fine ŝi la unua rompis la silenton. “Kial ankoraŭ teni tian geedziĝon?” ŝi demandis mallaŭte.

“Ŝi volas eksedziniĝi,” li diris, “sed ŝi postulas kiel la kondiĉon de eksedziĝo, ke mi donu al ŝi la tutan fabrikon. Kiel mi povus promesi?”

“Kial vi edzinigis ŝin?” Li silentis. Ŝi sentis sian pezan spiradon.

“Mi estas blindulo!” li senpripense diris, dusence.

Ŝi sentis tordiĝantan doloron interne. Ŝi stariĝis, volante lavi sian vizaĝon en banĉambro, sed Bai peteme ekkris, “Ne foriru!”. Ŝi haltis, stupore rigardante al Bai.

“Diru al mi,” lia voĉo urĝis kun doloro kaj petemo. “Kiel vi eniris mian familion?”

“Vi dungis min,” Fang diris kun treniĝa kaj malforta voĉo.

“Jes, mi vin dungis,” li murmuris, “sed, de kie vi alvenis? Je tiu posttagmezo de majo, de kie vi alvenis? De alia mondo?”

“Jes, de alia mondo,” ŝi respondis, sentante malvarmon tra la spino. “De la alia bordo de la maro, de la alia flanko de la terglobo.”

Bai volis diri plu, sed anhelante eniris Tingting kun pakajoj en sia brakumo. Alirinte, Fang transprenis tiujn pakajojn kaj metis ilin sur la liton. Bai ne plu parolis, sed li ne foriris. Sidante sur la seĝo ĉe la skribotablo, li, kun enpansema mieno, atenteme kaj akrasente aŭskultis al ĉio ĉirkaŭ si.

“Alvenu, Tingting,” vokis Fang, kiu venigis ŝin al la litrando. Poste, ŝi malfermis la pakajojn unu post la alia. Ĉiufoje, kiam ŝi malfermis unu pakajon, la knabino eligis mirplenan ekkriion kaj pli rondigis siajn okulojn. Ĝis kiam ĉiuj pakajoj ovriĝis, la knabino, jam apenaŭ spirante, kun ruĝiĝinta vizaĝo kaj tremantaj lipoj, balbutis, “Instru...istino, por kio vi...vi...aĉetis tiaĵojn?”

“Ĉio ĉi tio estas por vi, Tingting,” diris Fang, puŝante tiujn aĵojn antaŭ Tingting-on.

“Instru...instino!” tiu ekkriis mallaŭte, nekredeme per mano tuŝante tiujn aĵojn. Tie kuŝis tri delikate faritaj pupoj, kies okuloj povis fermiĝi kaj malfermiĝi. Unu el ili, kun abundo da blondaj haroj, surhavis luksan balet-jupon; la dua estis knabo kun lentug-plena vizaĝo, kiu tenis pilk-batilon; la tria estis eĉ negreto. Krom tiuj pupoj, tie kuŝis ankaŭ tri kompletoj da vestoj: unu estis blua jupo kun orkoloraj butonoj, la alia aŭtun-kostumo el skarлата veluro, kaj la tria pure blanka kostumo. Tingting tuŝetis jen ĉi tiun jen tiun, dum ŝia vizaĝo paliĝis. Levinte la kapon, ŝi, kun pupiloj malsekigitaj de larmeroj, rigardis al Fang kaj mallaŭte demandis, “Kial vi...vi aĉetis ĉion ĉi tion?”

“Kio? Ĉu ili ne plaĉas al vi?” Fang altiris la knabinon al si kaj direktis profundan rigardon al ŝi. “Jen, vidu, tiu estas Orbuklo, tiu Arlekeno kaj tiu Karbeto. Kun ili, via pupo ne plu estas soleca, ĉu ne? Pri tiuj vestoj, Tingting, mi diru al vi, ke knabinoj ŝatas beligi sin. Ĉu vi volontas provi ilin, ĉu ili sidas al vi bone aŭ ne? Mi pensas, ke ne estas problemoj.”

“Oho!” la knabino eligis ekkriion. Fine ŝi eksentis la verecon de la afero. Larmoj ruliĝis sur ŝiajn vagojn. Ŝi profunde enŝovis sian kapon en la sinon de Fang, por ke ŝi povu kaŝi siajn larmojn fluantajn pro granda ĝojo. Poste, ŝi levis sian kapon kaj alrapidis al la litrando. Ŝi ekprenis jen ĉi tiun pupon jen alian, kaj pririgardis jen ĉi tiun veston jen alian, ripetante la jenajn vortojn, “Ho, instruistino! Ho, instruistino!

Ho, instruistino! Ho, instruistino...” Kaj ŝi levis la pupon kun orkoloraj bukloj kaj alrapidis al sia patro, kun ĝojaj krioj, “Paĉjo, palpu ĝin! Paĉjo, instruistino Fang donis al mi multe da bonaĵoj, tiel multe, tiel multe, tiel multe! Ho! Paĉjo! Ĝin palpu!”

Bai malpeze palpis la pupon senparole. Lia vizaĝesprimo estis enpensema kaj nesondebla. “Nu, instruistino, ĉu mi povas porti ĉi tiujn aĵojn en mian ĉambron?” Tingting levis sian vizaĝeton kaj rigardis al Fang.

“Kompreneble jes,” Fang diris. Ŝi sciis, ke la knabino volas ĝui la subitan ĝojon per si mem tuj post fermado de la pordo. “Ankaŭ vi devas prezenti ĉi tiujn novajn pupojn al via malnova pupo, kiu jam solece silentis por longa tempo. Kaj krome, ne forgesu provi tiujn vestojn!”

Kun tiuj aĵoj en sia brakumo, la knabino enkuris sian ĉambron.

Starante ĉe la lito, Fang malrapide kolektis pakpaperojn, skatolojn kaj pakŝnuretojn. Restante kun Bai en la sama ĉambro solaj, ŝi ekhavis senton de streĉiteco kaj premiteco. Precipe la enpensemo kaj nesondebleco sur la vizaĝo de Bai igis, ke ŝi neniel povis legi tion, kion li pripensis en la koro.

“Ĉu vi, per tiu ĉi maniero, riproĉas la patron, kiu neglektas sian filinon?” li diris finfine.

“Mi ne havas intencon riproĉi iun ajn...”

“Do, ĉu vi ‘punas’ min?” li demandis sen malstreĉiteco.

Fang haltis kaj rigardis en la neflekseblan vizaĝon de Bai.

“Male, viaj vortoj plenas je riproĉo kaj malkontento al mi!” ŝi deklaris, iome kolere. “Puni? Ĉu mi rajtas puni? Mi nur estas guvernistino salajrata je du mil dolaroj ĉiumonate.

“Vi estas tiom kruela diri tiujn vortojn!”

“Via edzino ja diris tiujn vortojn!” Ŝi emfazis “vian edzinon”, antaŭ ol ŝi metis paperojn en la rub-korbon.

“Kruela? Tiu ĉi mondo ja estas kruela. La plej kruela estas, ke vi ambaŭ vundas la animon de la knabino. Ŝin vi molestas kaj malbone traktas. Se mi ne restus pro la infano, mi ne tenus min ĉi tie eĉ unu horon pli!”

“Ĉu jes?” La voĉo de Bai sonis tiom base. Ĉe lia frunto aperis tuŝo da doloro. “Ĉu vi pensas, ke mi ne amas tiun knabinon?”

“Ĉu vi ŝin amas?” Fang alkroĉigeme demandis. “Do, ĉu vi ne scias, ke ŝia vestŝranko malplenas, ke ŝia nura ludilo estas la pupo, kiun ŝi trovis ĉe la montdeklivo, ke ŝi vivas en revoj kaj tuttage ŝpinas amzorgojn kaj kompatemon, kaj vi eĉ ne scias, ke ŝi aspektas maldike kaj pale!”

Bai ricevis frosttremojn. “Neniam oni diras al mi tion,” li diris, kun tremanta voĉo. “Ŝi similas al sia propra patrino, kiu eltenis grandan suferon sub peza premo por atingi trankvilon... Ŝi tute similas al sia propra patrino!”

Kunpremiĝo ekis ĉe la korfundo de Fang. Denove mencio pri “propra patrino”! Ŝi timis aŭdi tiujn du vortojn. “Vi havas bonan infanon,” ŝi intence evitis la temon pri “propra patrino”. Ŝi diris sincere, “Amu ŝin bone, sinjoro Bai! Kvankam ŝi ne havas patrino, ŝi tamen havas patron!”

“Ĉu ŝi estas bela?” demandis Bai.

“Jes, ŝi similas al vi.”

“Ŝi similas al mi?” Bai ŝtoniĝis. “Mi esperas, ke ŝi similu al ŝia propra patrino! Ŝia propra patrino estas belulino.” Denove temis pri “propra patrino”! Fang deturnis sian kapon.

Subite, elpreninte ion el la vesta poŝo, Bai donis ĝin al Fang kaj diris, “Ĝin malfermu!”

Fang falis en stuporon. Subkonscie ŝi ĝin prenis. Ĝi estis malgranda korforma skatoleto delikate farita kaj reliefe ornamita per du rozoj. Ŝi malrapide malfermis ĝin kaj trovis en ĝi inkrustitan foton. Gapante tiun senkoloriĝintan foton, ŝi staris senmove ŝtoniĝanta.

La foto montris paron: la viro, kiu sendube estis Bai Peiwen, aspektis june kaj bele, kun paro da brilaj okuloj, plene je energio kaj vicleco, amo kaj feliĉeco. Kaj la virino, havis longajn harojn pendantajn ĝis la ŝultroj kaj blankajn dentojn kaj brilajn okulojn, kun neordinara mildeco sur la vizaĝo kaj sonĝeca raviteco en la okuloj, kaj kun dolĉa rideto ĉe la maldikaj lipoj. Kiam ŝi rigardis, ŝiaj okuloj nereteneble malsekiĝis.

“Ĝi estas la nura foto, kiun mi ankoraŭ konservas ĝis nun. Hanyan ne ŝatis fotiĝi, kaj ĝi estas la ununura.”

“Hanyan?” ŝi murmuris per tiu nomo.

“Ho, ĉu mi iam ne diris al vi, ke Zhang Hanyan estas ŝia nomo. Post kiam ni geedziĝis, mi nomis nian domon Hanyan Bieno. Hanyan (nebulfumo)! Ŝia persono similas al ŝia nomo: leĝera, libera kaj eleganta!”

“Ĉu vi ankoraŭ sopiras al ŝi nun?” demandis Fang kun ioma sufero.

“Jes, mi sopiras al ŝi mian tutan vivon!”

Fang ektemis. Ŝi fermis la korforman skatoleton kaj redonis ĝin al li. Ŝi nereteneble zorgeme esploris lian vizaĝon vivecan kaj sentoplanan, dum li ŝajne dronis en revo.

“Ĉu vi kredas je spiritoj, fraŭlino Fang?” li demandis.

“Ne,” Fang rigidiĝis. “Mi pensas, ke mi ne kredas, almenaŭ mi ne tre kredas, ĉar mi ne vidis ilin.”

“Sed ŝi ekzistas.”

“Kiu ekzistas?” Fang surpriziĝis.

“Hanyan!”

“Kie ŝi estas?”

“Ĉirkaŭ mi. En la ruino de Hanyan Bieno. Mi povas senti, ke ŝi ekzistas.”

“Oho, sinjoro Bai,” Fang plirondigis siajn okulojn. “Vi timigas min!”

“Jes?” Lia tono sonis iom eksterordinare. Lia penso vagis, kien oni ne scias. “Iun nokton antaŭ kelkaj tagoj, mi iris al la ruino de Hanyan Bieno kaj mi aŭdis ŝiajn paŝojn, siajn vesuspirojn kaj eĉ susuradon de ŝiaj vestoj.”

“Ho, sinjoro Bai!”

“Mi asertas al vi, ke ŝi ja ekzistas.” Lia tono estis firma kaj fervoro naĝis sur lia vizaĝo. Fang estis konfuzita, perpleksigita kaj kortuŝita de lia vizaĝesprimio. “Ŝi vere ekzistas!” li daŭrigis, dronante en enpensemo kaj iluzio. “Ĉu vi kredas pri tio, fraŭlino Fang?”

“Eble...” Fang balbutis, “pro via profunda sopiremo, vi... ekhavis halucinon.”

“Halucinon!” ekkriis Bai. “Mi ne havas halucinon! Mi havas akran senton. Blindulo havas pli akran senon ol ordinaraj homoj. Mi scias, ke ŝi estas ĉe mi!”

Fang konsternite rigardis al la entuziasmigita vizaĝo, bruligita per forta doloro kaj sopiremo. Unu viro atendas unu spiriton. Ĉu tio eblas? Ŝi ektremis, multe tremis. Poste, ŝi aliris kaj staris antaŭ Bai-on. Permane premetante sur la ŝultron de Bai, ŝi sincere diris, “Dio benu vin, sinjoro Bai. Bondeziron al vi, sinjoro Bai. Mi deziras, ke vi iam trovos vian feliĉecon, sinjoro Bai.”

Kun larmoj, ŝi hasteme foriris por vidi Tingting-on provi tiujn vestojn en sia ĉambro.

elĉinigis Vejdo



ilustrita pere de AI

Shi Fengqin



Puto

Dum la jaroj, kiam la kranakvo ankoraŭ ne populariĝis, la puta akvo estis ekstreme grava resurso. Ĉie, kie amasiĝis homoj, sin trovis putoj.

Kiam mi estis infano, ekster la nankina portalo Zhonghua mi loĝis en la loĝkvartalo Baotading, kiu estis konstruita sur la ruinoj de la Templo de Granda Danko. La akvo, vekte alportita el akvolivera stacio, estis uzata ekskluzive por trinkado kaj kuirado de manĝaĵo, dum la

aŭtorino, Shi Fengqin

puta akvo uziĝis en aliaj flankoj, ekzemple, en lavado de rizo, legomoj kaj vestoj, kaj purigado.

La kristala akvo de puto estis varmeta en vintro, kaj friska en somero. La puto estis plene ĉirkaŭita de pelvoj, kuvoj kaj siteloj en diversaj grandoj, kaj tie sin montris vivaj prizorgoj. La najbaroj kondukis inter si intime kaj konkorde, kaj ĉe ili ofte sonis ridoj kaj paroloj. El tia urb-puta vivo ĉiam odoris urbana gusto. Tio ja estis la tiutempa rulo de pentraĵo.

Kutime ĉe la rando de puto estis vazego por rizlave uzita akvo, kiu estis plej bona porkonutraĵo. Rericevanto de tia akvo rekompencis rizlavantojn per siteloj kaj pelvoj, kiujn ili uzis por ĉerpi akvon el puto aŭ lavi legomojn kaj aliajn objektojn.

La sezonoj alternis. En ĉiu tago, en ĉiu jaro el tricent sesdek kvin tagoj, la puto akompanis nin en ĉiu paŝo kaj kulturis al ni la karakteron de diligentero, laboremo kaj persisteco.

Kiam frostis, la ŝnuro de sitelo estis kovrita per glacio kaj do rigida. Ĉiu altiro de sitelo da akvo el puto dolorigis la manojn, sed finfine ĝi estis levita. Kiam la levita akvo verŝiĝis en pelvon kaj poste brasikoj metiĝis en ĝin, la manoj tuj varmetiĝis en la puta akvo vaporanta.

En plena somero, knaboj kovritaj per varma ŝvito ĉerpis sitelon da akvo el puto, kaj impete lavis la piedojn. Nun refreŝiĝis kaj plezuriĝis ne nur la korpoj, sed ankaŭ la koroj. Tiam plenkreskulo trempis akvomelonon en puta akvo, kaj la frukto kvazaŭ estis fridigita.

Dum laborado ĉe puto, plej ĝena afero estis tio, ke ŝnuro rompiĝis, aŭ ke sitelo falis en puton. Sen akvo legomoj ne laveblis. La homoj paŝis tien kaj reen, havanta

neniun eliron. Pruntinte hokon, foje kaj foje oni provis, ĝis la sitelo estis hokita kaj do levita.

Ĉirkaŭe de la Templo de Granda Danko loĝis mil kaj mil familioj. De la strato Zhengxue ĝis tiu Yuhua, de la lago Huangni ĝis la antikva strateto Dasi, de la Okcidenta Strato ĝis la Malsupra Kajo, de la Norda Temploportego ĝis la monto Baota, ĉie troviĝis putoj, kiuj povis esti etaj, grandaj, publikaj, hejmaj aŭ komunaj. Kaj estis multaj metiejoj de sojfabaj ĝermoj, tie kaj ĉi tie, kie sin kaŝis profunda puto, ĝenerale konata al neniuj. Siteloj da ĝermoj flavaj aŭ verdaj, kelkfoje priverŝitaj per puta akvo, estis transportitaj al kazinoj, fabrikoj, lernejoj...



La puto en mia memoro ne povas esti forgesita, kaj ofte venas al mi en la menso la bela fantazio: mi havas parcelon, kie mi masonas kuirfornon kaj fosas puton; inter la vivoj idilia kaj urba restas miaj piedsignoj; kaj mi promenas sur ponto super nuboj...

Kie nun estas tiuj iamaj putoj, mi min demandas, kiam mi iras proksime al la parko transformita sur la ruinoj de la Templo de Granda Danko? Eĉ se la puto senakviĝus, la balustradeto de puto devus resti!

elĉinigis Minosun (Ĉinio)



esperantigita de Paula Adúriz (Hispanio)

Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)



Poeto, Mikaelo Bronŝtejn

Kelkaj poemoj el la poemaro “Kajto”

Mi estas kiel vi

Mi estas kiel vi,
mi estas via ero,
la karn' de via karn',
la sang' de via sang'.
Bongustas ĉiu vort'
el via vort-utero,
frandindas ĉiu son'
por mia viva lang'.

Mi estas kiel vi,
ni sonĝe vidas samon,
ni samas en impet'
kaj en anima flam'.
Akceptas mi de vi
kaj amon kaj malamon,
sed revas certe, ke
ĉeestu pli da am'.

Mi estas kiel vi,
min lezas viaj mankoj,
ne bonas via mis'

por mia sangoprem',
sed mi defendas vin
per la fidinda man', kaj
samkiel en real'
defendus mi min mem.

Mi foje dum diskut'
ne tuj kapablas nei
akuzojn de l' rival'
en duba malkomfort',
sed post momenta dub'
jam pretas malkabei,
per trafa argument',
per via prava vort'.

Se en molesta hor'
ripetos historio
la nigrajn paĝojn de l'
kruela persekut', -
mi estas kiel vi,
do certe, malgraŭ ĉio,
nur senatenda paf'
kondamnus min al mut'.

Mi estas kiel vi,
mi mem elektis tion.
Ho vi, Esperantuj' –
feliĉa vivdestin'.
Pro trafa koincid'
mi devas danki Dion:
vi estas kiel mi,
kaj mi adoras vin.

Kajto

Alvenas mia tria jun'.
Adoleskanto,
renkontas mi Novjaron kun
konvena vanto.

Dorlotas dolĉa melodi'
la lipojn fajfe.
Ĉielen ekimpetas mi
trankvile, kajte.

Ekŝvebu kanto en aer'
ĉe l' vent-murmuro,
kaj firme ligu al la Ter'
min fajna ŝnuro,

kaj miaj bondeziroj en
cent mil neĝeroj,
al vi libere flugu sen
bariloj teraj,

sed min en vanta tempokur'
dum flug' magia
plu ligu l' fajna kajta ŝnur'
al vivo mia.

Pluva bluso

Mi estas for
de prudentaj decidoj pri ia ekag',
vanuas el kor'
la deziro kompreni, ke daŭras la tag',
kaj vea venen'
plenigas bobele pokalon de l' sort',
kaj sonas en splen'
senpasia despero de blusa akord'.

Revenu vi home, vizie, fantome,
revenu en tuto eĉ nur por minuto
kaj restu kun mi!
Amata senfine, plej ĉarma virine -
en festoj, en plagoj, dum noktoj, dum tagoj
delekto por trista anim'...

Fluas la pluv',
gutoj lense grandigas ombregojn de l' nokt' –
jen estas la pruv',
ke ne lasos min jam la kutima sufok'
de larma real' –
same lense en larmoj grandiĝas vizi' –
ebriiga fatal'
tute dronas en bluso kun penso pri vi.

Aperu senbrue, mirakle kaj flue
sur nuba podio por la melodio,
por blusa paŝad'.
Al rev' efemera, glimante malvera,
loganta nin fore, tentanta amore,
nin blusas la pad'...

Cedas mallum' -
nuban tukon je flikoj disŝiris la vent',
telere la lun'
ŝvebas inter la flikoj de mia prudent',
kaj kreas gitar'
purajn sonojn post sombre sopira obtuz'.
Trankviliĝas mi, ĉar
eĉ se vi ne revenos, plu daŭros la blus'.

Papilia aŭtun'

Papilia aŭtun'.
La aero plenplenas je revoj.
Adiaŭas anseroj -
kojno flugas al sud' super mi.
Kaj hezitas mi nun
inter miaj preferoj kaj devoj,
inter vero kaj vero, -
la realo kaj la iluzi'.

Ion kaŝas maten'.
Savas min konifera arbar' de
turmentig' triviala
per amika humida brakum'.

Mi liberas, kaj sen
konsekvenca pensad', malmingarde,
sen serĉado kiala
simple paŝas al fora eklum'.

Ĉu naskiĝas la ver' -
absoluta, senduba, difina -
en senzorga paŝado,
en la pina kaj muska ekspir'?'
Min alvokas sincer'
de l' malkaŝa rigardo virina,
kaj forestas la pado,
kiu gvidas al saĝa elir'.

La landlimo

Kiel vica stultaj' sed ne timo,
venas nokte la latva landlimo
per vekado far uniformitoj -
ven' subita de l' homoj subitaj.

Tiuj uniformitoj senŝerce
sian taskon plenumas ekserĉe,
kaj valizojn prezentas sen volo
vekiĝinta vagona popolo.

Miaŭas kato, benante la sorton –
l'kato havas litovan pasporton,
do vojaĝas sen peti pri vizo
en plektita korbet', ĉe valizo.

Grumblas avo, montrante naivon:
–Damne, mi liberigis Latvion,

eĉ vundita mi estis ĉe Ventspils...
ĉu vi novan militon komencis?

Katmastrino replikas al tio:
–Vi alvenis por okupacio!

Rita Mkrtĉjan (Armenio)



poetino, Rita Mkrtĉjan

Poezio

Se iu min demandus, kio estas poezio
Respondus mi, la penso, kiu nutras vivon mian!
Donac' de Dio estas poezio!
Mistero, vero, akvo, pano, spiro!

La poezio - kiel ombro mia
Apude iras, same ĉion vidas

Kiel amik' konsolas, trankviligas
Se mi suferas, "ŝi" sopiras.

Se ploras mi, "ŝi" atenteme vortojn trovas,
Por ke la vorto ne vundigu min.
Se mi triumfas, "ŝi" solenas, ĝojas,
Silentas, se mi ne parolas.

Ornamas sentojn ni, kiel skulptistoj,
Skulptaĵon kreas el la griza ŝton'
Malbela seka branĉo, kiun ni forĵetas,
Ekfloros, bonodoros pere poezia vort'.

Ni kantas poezion kune kaj aparte,
Ni enamiĝas kaj ŝanĝiĝas dank' al "ŝi."
Memor' senmorta estas poezio
Kaj sola amo, kiun ne forgesos ni.

Ni povas skribi pri la ver' kaj revo,
Instrui tion, kion ne studadis ni.
Ni iĝas pli feliĉa en poemoj, verkoj,
Eĉ se en vivo ne feliĉas ni.

Amik' fidela, ne demandas pri alveno,

“Ŝi” pretas helpi, revivigi nin.
Matena sunleviĝo kaj belec’ de vivo
Jen amikec’ eterna - ni kaj poezi’!

Erevan

Vi, mia urbo, juna kaj antikva,
Rakontas ĉiu ŝton’ pri via histori’.
La stratoj karaj de junec’ kaj infaneco
La koron tuŝas, restas en anim’.

Plenaĝas mi, kaj Erevan ŝanĝiĝas,
Pri io ĝojas, kaj sopiras pri ali’
Mi ŝatas forveturojn pro ĉiamaj renkontiĝoj
Poemoj, kantoj sonas, mia urb’, por vi!

Aperas versoj...

Aperas versoj, ne por la honoro
Ne por aplaŭdoj, senbrue en silent’,
Nur eble pli batadas koro,
Ekfloras en animo ama sent’.

Naskiĝas strofoj dum sendorma nokto,
Aŭ en gaja kaj sunbrila tag’,
Pro longe atendata varma vorto,
De iu nekonata amrigard’.

Aperas versoj de belega revo,
Sed povas esti pro animdolor’
De ĝojaj aŭ tristaj pensoj,
En iu nekonvena hor’.

Poemoj povas dormi en kajero,
Kaj povas suprenflugi kiel bird’,
Disdoni la “pecetojn” de espero
Atingi homojn kun feliĉa kri’!

Letero

Saluton, kiel fartas, mia kara?
Ĉu ĉio estas bone en la viv'?'
Vi estas juna, esperplena, meditema,
Mi bone konas, sed forgesis vin.

Vi scias nek pri tagoj gajaj, ĝojaj,
Ne scias pri la okazaĵoj sur la ter',
Futur' ne estos sennebula, kaj domaĝe
Survoje ne akiros venkon ver'.

Ne scias vi pri la forpaso de amikoj,
De kara familio, pri doloro de anim',
Dum jaroj junaj tempo ne promesas,
Ke io estos male en la viv'.

Ĉe ĉiu homo sama sent' aperas,
Malnova kiel mondo histori',
Vizaĝo ŝajnas fremda kaj konata,
Kaj flugas la leter' de mi...al mi.

Mi kaj vi

Ŝatas mi matenon fruan
Kaj atendas estontecon,
Ravas vin vespero blua
Kaj alvokas pasinteco.

Vidas vi frenezan vivon
Mi rimarkas la belecon,
Kiam volas vi paroli,
Mi preferas silentecon.

Ŝatas mi la poezion,
Vi nuntempan prozon legas,
Vivas vi en mond' reala,
Mi pri land' fabela revas.

Diferencas ni en vivo,
Sed la vojo estas sama,
En okuloj viaj karaj,
Respegulas mia amo!

La demando

Demand' eterna, kaj kortuŝas, kaj turmentas,
Kompreni penas, sed neniam povas ni,
Feliĉo, kial ofte ĝi malfruas?
Pro kio iĝas malamikon la amik'?

Pro kio bela ŝton' survoje restas?
Forpasas plej bonegaj, plej amataj,
La ombro de demandoj senrespondaj,
Kiel nebulo griza super nia kapo.

Sed povas esti nokte lum' ekbrilos,
La seka branĉ' verdiĝos, kreskos,
Subite arb' ekfloros kaj... probable,
Pri la demand' eterna, tempe ni forgesos.



esperantigita de **Paula Adúriz** (Hispanio)

Lily (Ĉinio)

Spektado al ruĝaj folioj

Aŭtuna vent', kiel peniko,
ŝmiradas per kolora farbo
la foliojn de aceroj
jen de unu arbo post alia arbo.

Sur la monto ŝajne elmontriĝas
hela flavo, ruĝo kaj skarlato.
En zefiro tremas la folioj
de aceroj je onia ŝato.

La pejzaĝo bela logas
vizitantojn ar' post aro
por spektad' kaj aprecado
al kolorvaria foli-mar.

Kiam falas la folioj,
kvazaŭ papilioj kun leĝero
dance flirtas tien kaj alien
kaj finfine ili haltas sur la tero.

Ni rigardas de fora loko
al la foli-mar' kun miro.
Je alblovo ili eĉ similas
al veletoj en malrapida iro.

La tutaĵo de kompakta ruĝo
nin impresas kvazaŭ la ĉielo
ĉe vespero kiam la sun' subiras
kun radioj de rubeniĝanta belo.

La fajr-ruĝ' nin vere ravas
kaj, kvankam pluvus fride,
varmon al ni l' ĉarmo alportas,

nin animskuante ĝis-zenite.



ilustrita pere de AI

Penseroj en aŭtuno

I.

Mi ŝatas sidi en aŭtuna vento,
aŭskulti mute al folia falo
kaj al susur' de pluva la lamento,
kaj senti fridon de pluvgota klaro.

La vent' min kisas milde per kareso,
min refreŝigas pura la aero.
Sunlum' radias varmon sen eksceso,
mi ĝuas ĝin laŭplaĉe kun prefero.

Animo mia kvazaŭ flirtus sore,
leĝere flugus al la ĉielbluo,
verŝajne por veturi jen laŭvole
turismi en ĉiela regn' kun ĝuo.

En tranco mi revenas filmsimile
al la pasinto mia tre facile.

II.

Ve, en pasinto en aŭtuno same
mi ja ne havis tempon por satĝui
sunlumon, venton kaj pluvgutojn jame,
sed nur laboris ja por kontribui

al mia familio en vivteno,
penegi tage preskaŭ sen ripozo.
Mi frue ellitiĝis en mateno
kaj penis ĝis vesper' kun seriozo.

Mi ne malŝparis monon en elspezo
kaj akumulis ĝin jen groŝ' post groŝo.
Suferis vere mi sub viva pezo,
mi ĉiam tenis monon en la poŝo.

Pasintaj tagoj jam foriris frue,
mi tamen ĝin memoras jen senskue.

III.

Nun kvankam mi laboras ne plu pene,
mi havas blankajn harojn je tempioj.
Ni vivas jam senĝene, senĉagrene,
mi tamen perdis volon jen kun ambicioj.

Nereteneble la pasint' forpasis,
sed ĝi jam firme gravuriĝas vere
en mia kapo. Mi neniam ĉasis
promocion kaj famon kariere.

Mi ja postulas la kvietan vivon
sen ĝenoj, sed kun famili-akordo.
Mi kovas tian belan perspektivon,
kaj mi soifas je plibona sorto.

Penseroj miaj vagas de l' pasinto
al nuno en mistera labirinto.

Tiu nokto

Amo nin kunligis tiun nokton.
Ekde tiam des pli kredas mi je l' amo.
Kvankam ni du jam disiĝis jen kvar jarojn,
la sapor' de l' am' ankoraŭ restas
en profund' de mia koro.

Mi meritas punon de l' Ĉielo,
ĉar mi malantaŭ ŝi
tenis amaferon kun alia la virino
ĝis ŝi trovis la skandalon.


Kvankam nia am' rompiĝis,
mi ankoraŭ alkroĉiĝas al la amo
kun ŝi ja neforgesebla, neforgesesbla!
ĉu en la koro, ĉu spirite.

Mi memoras, ke en tiu nokto
ni kveradis arde kaj tenere,
amindumis fojrefoje,
kisis kaj brakumis kun fervoro.

Tiun nokton ni elverŝis propran koron
unu la alian kun sincero,
diri bondezirojn el la koro,
preĝi por ni ambaŭ je bonfarto.

Mi neniel tiun senton jen forgesas,
la intiman senton de la amo
de la amindum' en tiu nokto.
Ja neforgeseble, ja neforgesebla!

Ángel Arquillos (Hispanio)



poeto, Ángel Arquillos

Plendo al la juneco

Ĝistere kliniĝanta mi pardonpetas al vi,
sed vi akre ridetas kaj krude mokas al mi.

Miaj fortoj malfortiĝas kaj mia korp' maljuniĝas,
sed mia menso plu
sopiras al la viv'.

Mi tre amas vin, juneco,
sed kun granda rapideco
vi ekfuĝas for de mi.

Timigas min la soleco
kaj krome la mallerteco,
minacante mian menson
misformante la reflektion
de mia ĉambra spegulo.

Mia di'
kio okazas al mi?
Senforta
pro la mallum'
mi ne regas la tempon,
kaj tre lacas...
kaj eĉ varmetaĵ larmoj
ruladas
sur mia vizaĝo pala...

Almenaŭ helpu min
trairi la kotecan vojon
por atingi la necertan...
celon

de la dua nova viv'.

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



poetino, Maria Nazaré Laroca

Bondeziroj

Jarfino someras...
ĉevalrajd' el ŝaŭmoj
gracie ondumas:
di'amanto mara
sub la gaja suno.

Eble nun vi dormas
sub mantelo frosta
de la nokto neĝa...

La jarfin' someras...
La mondo rondiras
laŭ voj' de l'esper':
paco kaj milito
reve kunfratiĝas.

Kalendaro

Tempo teksas l' estonton
per fadenoj el revo
kaj homo kalendaron
avidan inaŭguras.

Tagoj trilas, kiel kanarioj
en la kaĝoj de l' horoj;
decembroj ebriiĝas
per freŝaj januaroj:
ek al la maro!

Sed kiel scii

ĉu oni vidas
krepuskon
aŭ tagiĝon?

Tiam mi lernis
eltranĉi la mallumon
por l'aŭronon ekvidi
en ĉiu sunsubiro.

Al L.L. Zamenhof

Je l' vojmezo de l' urbaj ĝangaloj
l'anim de l' mond' vagadas
baraktante tra bruega lum'.

Kvankam l'arbareg' ne obskuras,
ĝi vojiradas blinde
laŭ riveroj el fantomoj hidaj:

Perfort' regas, ĉifonas moral';
Senkapigojn barbarajn
oni spektas per televidilo.

Ho Di'! Kien la homaro iras?
Ĉu l' mondanim' fiaskis?
- Ne! - krias idealo:
L' espero pacience obstinas...

Per la sorĉo de plenluno

Per la sorĉo de plenluno
teksadas mi tiun kadron
el densaj ŝnuroj el pluv'
sur la tegment' rajdanta.

Kaj mia lito el nuboj

ŝvebas en ĉambro malluma...
Mi ŝirmas min en la libro
ĝis paciĝi la furio,
kiu rongas la lunvizaĝon,
kiel hostio splitita.

Per la sorĉo de plenluno,
tunelon infanaĝo fosas,
kie la bovejoj flosas
kaj odor', kiu trairas
kaj vekas sekretan pordon
inter estant' kaj estint'.

Senlime

Senfina estas libero
de mia penso: mi estas
kreita pensad' de Dio.

Mi loĝas en mensa domo
el mil fenestroj revantaj...
kaj maro ĉeestas korte
desegnante horizontojn.

Porcelano

Mi moviĝas en la kuirejo,
mia nedaŭra spaco:
provizora ĝarden'.

Terece, vidi mi ŝatas
l'akvon, kiu eskapas
el la krano de l'lavujo:
en dolĉa geometrio.

Miaj manoj el ŝaŭm'
revas porcelanajn
karesojn sur taso:

Unuflugila Ikar',
en ĉi posttagmezo,
kiu amore insistas ĝui
la kanton de l' turdoj.

Lotusfloro

Serĉante lumon,
floras lotusfloro
sur akvo ŝlimeja.

Kvazaŭ perloj,
brilaj akvaj gutoj
forglitas de l' folioj,
kiuj ĉiam puras.

Mia anim' sopiras
al la nobleco humila
de l' lotusaj floroj,
kiuj marĉon lumigas
per servad' al Dio.



ilustrita pere de AI

Luiza Carol (Israelo)

Aŭtuna sunsubiro

(laŭ la vjetnama poemformo “ses ok”)

Fajra ov’ ruliĝas
en ĉielo, iĝas
ora
kaj oranĝkolora
en alteco fora.
Maro
ŝajnas flua fajro
en spegulondaro.
Iĝas
vente, malvarmiĝas.
Kvazaŭ frakasiĝas
l’ovo
fajra, en la blovo
venta kaj la movo
nuba.
Ruĝas maro suba,
ruĝas ĉiel’ supra.
Fora
nub’ violkolora
rampas alg-odora.
Ombraj
formoj multenombraj
amasigās sombraj.
Venas
blovo kiu sternas
nokton. Lumo tremas,
svenas.

Ardo (Ĉinio)



poeto, Ardo

Respekton kaj admiron

al la Granda Kanalo

--Omaĝe al la seminario pri Esperanto
kaj la Granda Kanalo

Dum pli ol mil jaroj
de sudo ĝis nordo
la Granda Kanalo
senĉese kaj amplene
fluas kaj fluas
Laŭborde de la kanalo
jen la diligentaj popoloj
kiuj vivas en feliĉo kaj ĝojo
kaj rikoltas riĉon en bona medio
abundas la kulturo kaj la tradicio
Ĝi nutras nin sindoneme
per abundo kaj prospero
Malgraŭ militoj kaj disputoj
kaj teruraj naturaj katastrofoj
kiuj ne haltigis la konstantan fluon

La akvo de la Granda Kanalo
senĉese kaj amplene
fluas kaj fluas
tra miloj da mejloj
dum miloj da jaroj
ĝi brilas bele kaj hele
kiel bela ora rubando
kiel perlo de la oriento
La rara monda heredaĵo
al ĝi ni ŝuldas
respekton kaj admiron

Bedo de Ĉinesko



poeto, Vejdo

Lunbrilo kaj akvobrilo

*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina
fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5
silaboj laŭ rimarango xa,xa,a (x=senrima).*

rakonto pri Afanti
—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo
Anoncist’
sur la reĝa tur’
en vintra tago kriis:
“Aŭskultu vi ĉiuj! Nur
tiu, kiu sur

urbomur’
tranokti nude
povos, ricevos de reĝ’
la filinon inklude
landparton tute.”

Afanti
pensis ĉe tio:
indas blagi al la reĝ’,
kiu al la nacio
ruzas sen pio.

Li iris
do al la palac’
kaj diris al la reĝo:
“Via moŝto, kun aŭdac’,
falu via grac’

jen sur min.
Mi volas vere
tranokti sur l' urbmuro
por promeson espere
gajni fiere.”

La reĝo
jen ordonis tuj
depreni lian veston
loki lin sur urbomur’
por nokti en nud’.

Li certis,
ke tiu kreten’
mortos pro nokta frosto,
ĉar mordos ĉe nokta ven’
lin venta siren’.

Afanti
petis ekkrie:
“Ordonu meti ŝtonon
egan en preto tie
por uzo plie.

La reĝo
miris pri l’ peto:
“Kial tiel, kreteno?
Simpla estas ŝtonmeto
kaj tuj en preto.”

Respondis
Afanti ruze:
“Estas mia sekreto.
Mi agos tute furze,
se vi rifuze.”

La reĝo
vole nevole

preparis ĉion por li
kaj traktis lin malmole,
eĉ ĝis strangole.

En nokto
regis malvarmo,
tamen Afanti staris
aplombe jen en kalmo
kontraŭ frost-svarmo.

Ekrulis
la ŝtonegon li
tien kaj reen ade
penante kun energi'
kaj kun laŭta kri'

“Varmege!
Varmege! Ho fu!”
Afanti laŭte kriis.
Aŭdis ĝin la reĝ' kun ĝu'
tra la mura tru'.

Je aŭror'
Afanti fine
surmetis sian veston,
iris al reĝ' proksime,
petis obstine:

“Via moŝt',
mi tranoktis jam
senveste sur la muro
kaj vi devas laŭ l' proklam'
doni ĉiel ajn

filinon
vian kaj parton
de land' al mi laŭ promes'.
Nu, ne uzu ruzarton

nek eskap-salton.”

La reĝo
sin tenis muta
por ruze elturniĝi
per rimedo altruda
kaj vere kruda.

Li fakte
ne ’stis sincera.
Nur distriĝi li volis,
ne prenis tion vera,
promes-ofera.

Post tempet’
li ĉuis false
“Ĉu vi vidis la lunon?”
“Kial ne? Kiel farse
kaj embarase!”

La reĝo
ŝajne en koler’
kriis, “Vi varmigis vin
per lunbril’ por vivesper’
kontraŭ frostsufer’.

Vi trompul’
kun malbona kor’
staras kontraŭ l’ kondiĉoj,
nigrigas vin per malglor’!
Afanti, vi for!”

Afanti,
tre, tre kolere
forlasis la palacon.
Li ekloĝis prefere
foren libere.

Post tempdaŭr'
la reĝo ĉasis
tutan tagon en kampar',
kabanon preterpasis
sed ne forlasis,

ĉar kohort'
lia en sufer'
soifa serĉis akvon
sub sunbakanta ĉiel'
de varma somer'.

Troviĝis
puto ĉe kaban',
kie Afanti loĝis.
Jen la reĝo kaj kompan'
rajdis kun elan'

al kaban'
kaj kriis sone,
"Kie estas la mastro?
Gastoj venas impone!
Kondutu bone!"

Afanti
eliris ride,
"Kiel mi povas helpi?"
"Donu akvon rapide
kaj senhezite!"

"Momenton!"
Afanti diris,
"Akvon mi alportos tuj!"
Al la puto li iris
kaj jen deŝiris

la ŝnuron
de la sitelo

kaj kaŝis ĝin sub sablon,
sidiĝis en kvieto
kvazaŭ asketo.

La reĝo
post longa atend'
ordonis subulon lin
serĉi pro senĉesa plend'
pri lia ofend'.

La subul'
baldaŭ revenis
kaj raportis, "Afanti
humiligi vin penis
kaj eĉ malbenis.

Li diris,
'Li, stulta azen',
mem venu al la puto!'
Kia absurda kreten',
tiu arleken'!"

Al la put'
li devigite
iris kun la subuloj
paŝante malrapide
kaj korp-rigide.

Ĉe l' puto
li kriis boje,
"Kreteno, kie akvo?"
Afanti diris ĝoje,
"Jen vidu foje

en puton!"
La reĝ' rigardis
en la puton kaj muĝis
al li kolero-ardis

kaj ade saltis.

“Kreteno,
kiel mi povas
trinki sen sitelŝnuro?
Kion mavan vi kovas?
Kion vi provas?”

Afanti
diris en trankvil’
“Jen vin sensoifigu
ne per akvo, sed akv-bril’
laŭ via dezir’!”

La reĝo
kriaĉis gale,
“Ĉu sensoifigi min
povas akv-bril’ reale
aŭ trompi male?”

Afanti
diris sincere,
“Kiel akv-brilo ne vin
sensoifigas vere,
ankaŭ modere

la lunbril’
ne povas iom
varmigi ja en nokto
frosta la korpon de hom’,
ho, ho, neniom!”



Rovere Emanŭele (Italio)



Kvin kanttekstoj

poeto, Rovere Emanŭele

Aŭchwitz

Muziko / vortoj: Francesco Guccini

Mi mortis, estis nur infano,
kun multaj idoj, multegaj pli ol cento,
perfortigita tra tubo de kameno
kaj nun mi estas tie ĉi en vento.

En Auschwitz, dum faladis neĝo,
leviĝis ĉielen fumego akra, densa,
en kor' frostiĝis la vana preĝo
de mizeruloj per sufer' intensa.

En Auschwitz, mil kaj mil da homoj,
super ili regis terure la silento:
jam nur numeroj, jam ne plu personoj
dispeliĝis ĉiuj tie ĉi en vento.

Demandas mi kiel povis homoj
mortigi tiom da siaj similuloj,
sed oni igis nin – pli ol kvin milionoj –
nur la nigra cindro de tiu ĉi nebulo.

Refoje nun tondras la kanonoj,
ne estas ĝis nun plensataj kaj kontentaj

je ruĝa sango la bestiaj homoj
kaj forte blovas de malamo ventoj.

Esperas mi, ke tra l'homaro
vastiĝos baldaŭ la frateca sento
kaj en ĉielo, super ter' kaj maro
kvietiĝos fine la fiega vento.

Jes, kredas mi, ke la homaro
kapablos vivi en paco kaj konsento
kaj en ĉielo, super ter' kaj maro
nur Amo flugos en la milda vento,
nur Amo flugos en la milda vento!

Amovortoj sursable

Muziko / vortoj: J. Fred Coots / N. & C. Kenny

Sur la sablon de l' mar' kutimis skribi ni
dolĉajn vortojn pri nia Amo.
Vi desegnis por mi dometon, du korojn
kaj mi skribadis: mi amas vin.

Sed, en sensuna tag', ekblovis venteg'
kaj dispelis por ĉiam
la amorevon nian.

Sur la sablo de l' mar, sub varma kaj brila sun',
pensoj vagas sen plu amorevoj nun.
Sur la sablo de l' mar', sub varma kaj brila sun',
plu ne estas temp' por amorevoj nun.

Animo kaj koro

Muziko / vortoj: S. D'Esposito – T. Manlio

Mi riskas perdi pacon, dormon ĉar vi koleras sen kialo.
Ĉu veras, ke nun viaj lipoj ne volas kisojn plu?
Vi ne respondas miajn vokojn nur por iriti min.

Kunestu tiel ni “anim’ kaj koro” kaj ne disiĝu eĉ dum unu horo.
Deziro mia al vi min turmentegas: resti kun vi por vivi en fabela rev’.
Amarajn vortojn ni neniam diru. Feliĉo povas flori per unu spiro.
Se ankaŭ vi avidas al nia amo, ni ĉiam restu tiel “anim’ kaj koro”.

Mirinde estas senti, ke vi min amas kaj vidi, ke vi tiom sopiras al mi.
Dolĉege estas havi vin ĉi apude, kun via spiro kvazaŭ kareso sur mia haŭt’.
Belege estas aŭdi vin, kiam vi ridas: l’animon mian tio plenigas per ĝoj’.
Por kunparigi l’vivon kun vi por ĉiam, mirinde estas senti, ke vi estas mia.
Vi estas mia!

Akvarelo

Muziko / vortoj: Toquinho

En papera folio vi vidas la flavan sunon
sed, se pluvas, per du krajonsignoj ĝi iĝas ombrelo.
Kaj la arboj ja estas nur flaskoj da vin’ renversitaj:
tiuj uloj sidantaj apude fariĝos ebriaj.
Ĉiam verdas herbejoj kaj tiu punkto en la ĉielo
estas nepre aŭ la bona Dio, aŭ iu fluganta mev’

al la maro, por vagadi super la senlima blu’.
Tiu ŝipo navigadas nur per velo antaŭen plu.
Sed, subakve, fiŝoj scias kien iri, laŭ sia plaĉo ne laŭ via vol’.
La ĉielo rigardadas, ĉiam bluas la kolor’.
Aviadilo flugas alte, nun revenas al la ter’,
dume kelkaj ĝin salutas, svingas manojn amike
el la vilaĝa drinkej’: kien iras ĝi?

En papera folio vi vidas trajnovojaĝantojn:
jen tri bonaj amikoj babilas kaj nun ludas kartojn.
Eblas ĉie alveni, sufiĉas nur unu sekundo:
per desegna cirkleto atingas vi la tutan mondon.
Tiu knabo paŝadas ĝis kiam atingas muron,
fermas li la okulojn kaj vidas momente l’estonton jam.

La estonto: kosmoŝipo de planedoj al konker’.

Ĉu ĝi solvos la problemon de malsato sur la ter’?
Aŭ ĝi portos militojn por la posedo
de la riĉaĵoj de nia mond’?
Ni pluludu la muzikon kaj laboru kun fervor’.
La muziko, la laboro, l’amikeco: jen trezor’!
Estas ĉiuj ni partoj de bela ludo dum l’akvarel’
senkoloriĝos jam, senkoloriĝos jam.

Ĉampano

Muziko / vortoj: De Pasquale-Jodice-Di Francia


Ĉampano, por tostad’ al renkonto kun vi, jam propriat’ de alia.
Okazis post ies invito “ni iru ĉiuj festi en hejmon mian”.
Apenaŭ la festen’ komenciĝis, sendrinke mia kapo turniĝis.
Ĉirkaŭe jam nenio plu gravis, rigardoj miaj nur celis sekvi vin.

Ĉu povas mi akompani vin hejmen?
“Preteksto tre banala por resti iom sola mi kun vi”.
Kaj poste forĵeti ĉiujn timojn, vin ami simple tiel...
l’ unuan fojon, la lastan.

Ĉampano, por ni dolĉa sekreto pri amo kulpa, malpermesata.
Nun restas nur ĉi glaso malplena, dolora forĵetinda rememor’.

Mi scias, ke vi min rigardadas, ĉar al vi ŝajnas strange
tostadi sen virina kunestad’. Sed mi, mi devas celebradi
la finon de la Amo. Do: kelnero, ĉampanon!

Yu Guangzhong (1928-2017)



*Yu Guangzhong, moderna poeto de
Tajvano, Ĉinio*

Araneaĵo

krespusk' similas araneon insideman
kiu vadante akvon nin atakas
kaŝeme movetante siajn kruojn
sur la kvieta maro ne troviĝas spuro ĝia
neniu scias kien surbordiĝos ĝi
jen kiam turnas nian kapon ni returnen
tuj ni konscias nin kaptataj
falantan en senliman grizan reton ĝian

Kiam Batos Hor' de Mia Morto

Kiam batos hor' de mia morto
min enterigu inter la Rivero Flava kaj Janzi-rivero
kaj surkusenigu mian kapon
kun grizblankaj haroj sur nigra grundo.
En Ĉinio, la plej bela, patrineca lando

mi endormiĝu trankvile, sur la tuta vasto
ambaŭflanke sonas rekviemo el al du riveroj
kiel du eterne-vivaj muzikiloj, torentantaj orienten

La plej larĝa , la plej indulgema lit' ĝi estas
kie unu kor' kontente dormas kun profundaj pensoj
iam juna ĉino
en la fridigita Miĉigan' rigardis okcidenten
tra mallumo por aŭronon serĉi en Ĉinio

per okuloj siaj kiuj vid-fiksiĝis sur ŝin sep dek jarojn
avideme kovris li la mapon, de la Okcidenta Lag' al Taihu Lago
plue al turt-multa Chongqing, kvazaŭ li rehejmenirus.

Hejmsopiro

Kiam estis mi infano,
mia hejmsopiro ŝajnis poŝtomark' malgranda.
Mi ĉe ĝia unu flanko ĝemis,
kaj la panjo ĉe l' alia.

Kiam mi plenkreskis,
mia hejmsopiro kaŝis sin sur ŝipbilet' mallarĝa.
Mi— ĉiama veturanto,
novedzino mia— atendant' malĝoja.

Poste ho ve,
ĉiŝ mia hejmsopir' en tomb' malalta.
Mi ekstere staris,
mia panj' interne kuŝis.

Sed nun
mia hejmsopiro fluas kiel la Markolo malprofunda.
Veas mi ĉi-borde,
trans l' Ĉeftero.

Kvar Strofoj Pri Hejmveo

donu, donu al mi jen da Jangzi-akv' ĉerpilon
vinsimila akvo
ebriiĝo de vino samas
kiel droniĝo en hejmveo

donu, donu al mi jen da Jangzi-akv' ĉerpilon

donu, donu al mi ruĝan malusfloron
sangeruĝan floron
brulo de bolanta sang' similas
al brulvundo de hejmeo
donu, donu al mi ruĝan malusfloron

donu, donu al mi blankan neĝfloreton
blankan kiel letero-papero
atendado de elhejma leteraro
jen egalas atendadon de hejmeo
donu, donu al mi blankan neĝfloreton

donu, donu al mi bonodoran umefloron
patrinŝajnan bonodoran umefloron
la aromo de patrino
la aromo de hejmlando
donu, donu al mi bonodoran umefloron

Vin atendas mi en pluvo

Vin atendas mi en pluvo, en la pluv' graveda jen je ĉielarko
cikad-ĉirpoj kvietiĝis, kaj ran-kvako ekeksplodas
ruĝ-lotusoj plenas en laĝeto, kiel ruĝaj flamoj en la pluvo

tutegalas ĉu vi venas aŭ ne, mi eĉ sentas
ĉiu lotusflor' similas al vi
precipe en krepuska kovro, en vualo pluva delikata

eterne aŭ tempete, tempete aŭ eterne
vin atendas mi en tempo iksa aŭ fiksita, vin atendas mi, ĉu tempepte aŭ eterne

nun se via mano en la mia en tiu ĉi momento
kaj se via freŝa elspireto
en naztruoj miaj, al vi mi dirus, karulino mia

nu, ĉi mano devus pluki lotussemojn, en ĝarden' la imperia
tiu man' skueta la remilon

en boat' el magonia ligno

stelo alte pendas super la kupolo de l' scienca halo

kiel pendolanta orelingo

la horloĝo l' sepan batas, subite vi alpaŝas

vi alpaŝas tra postpluvaj lotusfloroj, leĝere kaj gracie

kiel poemet' skandita

pri anekdoto ama

vi alpaŝas ritme

el poemoj antikvtempaj

Mia Solidigo

ĉi tie, en koktelo la internacia
mi restas glacipec' degeli rifuzanta —
malvarma kun temperatur' nul-grado
rigida kiel solidaj' senŝanĝa

Mi origine estas tre tre likva
fluema kaj bolema
ludema gliti sur la ĉielarko


sed fore distas sun' la ĉina
mi kristaliĝo, diafana kaj solida,
neebla ree veni al mi mem.

elĉinigis Eto (Ĉinio)



ilustrita pere de AI

Yu Jian (1954-)



Luo Jiasheng

ĉiutage li rajdas sur olda mopedo “Lanling”
kiam la fumtubo sputas fumon
li venas labori

preter la oficejo
preter la forĝejo
preter la muro de la tenejo
li eniras en la budon el tabuloj

poeto, Yu Jian

laboristoj staras ĉe la pordo de la laborejo
vidante lin ili diras
ke Luo Jiasheng venas

neniu scias kia estas lia deveno
neniu demandas pri tio
ĉiuj el la fabriko nomas lin Luo Jiasheng

laboristoj ofte frapas je lia budo
ke li riparu ampermetron
aŭ brakhorloĝon
aŭ radioricevilon

kultura granda revolucio
li estas elpelita el la fabriko
en lia kesto
oni trovas kravatton

kiam li ree venas labori
li rajdas ankoraŭ sur “Lanling”
Luo Jiasheng
nerimarkite edziĝas
kvardekdu-jara
li patriĝas

ĝuste en tiu jaro
li mortas
lian kapon breĉas
elektra forno eksplodanta
estas terure

tiutage kiam li estas enterigita
lia edzino ne venas
kelkaj laboristoj levis lin sur monton
ili diras ke lia korpo estas eta
ne peza por lin levi
brakhorloĝoj riparitaj de li
funkcias pli bone ol novaj

la fumtubo sputas fumon
laboristoj staras ĉe la laboreja pordo
Luo jiasheng
ne venas labori



ilustrita pere de AI

*elĉinigis **Minosun***

Ding Li



Poetino, Ding Li

Granatujoj floris

mi deziras vin tualetornami
volvi viajn harojn en altan tuberon
ke vi tenu en la memoro ĉiun ĉarmulinon
klasikismo ja estas ŝia transcendeco

kiel en festo mi ĉirkaŭas vian manon
la movoj de plukado
ĝuste kiel agas duonsurda amanto
pli bonus resti apenaŭ konscia pri la mondo

granatujoj floris
bona tago
mi volas esti simpla en modesta tualetto
senspure foriri kun io
mi deziras
ke mia aŭtuno estu nur acida granato
kiu sin sufokas simple pro eta feliĉo

mi estas virino en la floranta Tang-dinastio
kun alta hartubero
la sunmalleviĝo de Chang'an
estas malalte altirita
ĝuste kiel historiaj libroj kuntempe nebuligitaj
graseta ĉarmo ja estas mia unika belo
kiu sin kojnas en la realon

Elĉinigis Minosun

Bai Juyi (772-846)



Poeto, Bai Juyi

Bai Juyi (772-846) estas la plej fekunda poeto en Tang-dinastio. Liaj poemoj troviĝas en vasta gamo de temoj, verkitaj en populara kaj simpla lingvo.

Longa Bedaŭro estas unu el liaj reprezentantaj poemoj. Ĝi priskribas la aman tragedion de la imperiestro Xuanzong kaj Yang Yuhuan, li honordamo.

Longa bedaŭro

L' imperiestr' avidis je belinoj tra la lando,
sed ne sukcesis li akiri dum multjara ĉaso.
En Familio Yang knabino ĵus plenkreskis ĉarma,
ne konis oni ŝin en buduaro kun tempaso.

Naturdotita belo ŝia diskoniĝis fine,
ŝi elektitis ĉe l' imperiestron servoprete.
Kapturino kaj rideto ŝiaj montras ja cent ĉarmojn,
ŝi superbela ĉiujn inojn en palac' sencede.

En frost' printempa ŝi sin banis en Huaqing-baseno,
fontakvo lavis haŭton silkan de kremo-koloro.
Servoknabinoj helpis ŝin en supla koketeco,
ŝi plaĉis al li ĉe unua lia korfavoro.

Kun haroj nubaj, or-harpinglo kaj ŝminkitaj vangoj,
ŝi kun li ĝuis nupto-nokton en la litvualo.
La nokto kurtis, ili ellitiĝis tre malfrue,
li ne plu tronis en mateno por ofico-faro.

Lin ŝi priservis tutatage sen libera tempo,

vigilis ŝi ĉe li dum ekskursad' en primavero.
En posta la palac' troviĝis tri mil belulinoj,
li tamen solan ŝin dorlotas vere kun tenero.

Ŝminkite ŝi lin servis ĉiunokte en haremo,
ebrie ili ludis kun amĝu' en Jada Turo.
Gefratoj ŝiaj ĉiuj havis la honoran rangon,
alportis ŝi al familio gloron sen mezuro.

Pro tio la gepatroj sub ĉiel' preferis naski
filinon ol generi filon kun profita celo.
Palac' Li staras alte nub-skrapante en aero,
el ĝi muziko fea ŝvebis ĉien en ventpelo.

Leĝeris danco kaj kantado en muziko korda,
satĝuis la imperiestro, tamen sen kontento.
Subite tondre sonis la milit-tamburoj tra,
panike stopis dancistinojn jen en artprezento.

Fajrfum' minace pendis peze super la palaco,
mil kaj mil homoj, ĉaroj fuĝis al sudokcident'.
La procesio kun regnflagoj jen iris jen haltis,
jam sude de l' ĉefurbo de la regno liojn cent.

Rifuzis ses armeoj marŝi sen dekreton sekvi,
eĉ Honordam' Yang mortis triste antaŭ la ĉevaloj.
Kapornamaĵoj oraj ŝiaj disŝutiĝis teren,
neniu levkolektis ilin pro disĵetaj faloj.

Kovrante la vizaĝon la regnestro ne ŝin povis
elsavi kaj li triste larmis, sangis en la koro.
Loesa polv' foliojn pelis en susura vento,
la homvicaro jam zigzagis al Jiange-montkolo.

Sub Emei-mont' danĝera preskaŭ mankis la pasantoj,
jam flagoj perdis helon ĉe vespera suna palo.
Vidante verdajn montojn kaj riverojn jen de Sichuan,
sopiris li matene, nokte al ŝi en fatalo.

Kiam li vidis lunon, li tuj naskis afliktiĝon.
Noktpluva batoj pelis lin al la korŝira horo.
Post militĉes' returnis li al regna la ĉefurbo,
ĉe ŝia tombo li hezitis kun rompita koro.

Sub grundo de Deklivo Mawei ŝi eterne kuŝis,
vizaĝon ŝian oni povis vidi jam ne plu.
Li mute vid-al-vidis korteganojn kun larmflu',
en la direkto al ĉefurb' li rajdis sen voĉbru'.

Restis samaj lago kaj ĝardenoj en palaco:
lotusoj en lageto kaj salikoj en ĝardeno.
En ili ŝajne riveligis ŝiaj vangoj, brovoj,
kiel li povus ja reteni larmojn kun ĉagreno?

Printempe prunoj kaj persikoj pompas en disfloro,
aŭtune pluvo batis la foliojn de l' platano.
En suda kaj uesta kortoj herboj kreskis riĉe,
neniu forbalais falajn florojn sur l' altano.

Operludistoj en la Pira Kort' jam hargriziĝis,
la servistinoj de harem' oldiĝis en senilo.
Lampiroj flugis en palacon, ĝenis lin en penso,
tra l' tuta nokto li maldormis jen en maltrankvilo.

Kalkulis li l' sonorilbatojn en longlonga nokto,
rigardis li la stelojn surĉielajn ĝis l' aŭroro.
Malvarmis prujntavolo sur tegoloj de l' tegmento,
kun kiu kuŝus li sub litkovril' de verd-koloro?

Jam jaro pasis lante ŝia mort' el lia vivo,
en lian sonĝon ŝi neniam venis per animo.
Alvokis li taŭiston kiel gaston jen el Linqiong
por ŝin animi vive per sorĉarto kun estimo.

Por kvietigi la imperiestran sopiremon
petatis la taŭist' ŝin serĉi kun giganta peno.

Rajdante per la nubo li galopis kiel fulmo,
de paradizo ĝis infer' li serĉis kun fortpleno,

sed ŝin nenie trovis sur ĉiel' kaj sub la tero,
en lokoj du nur regis svaga, vasta la nebulo.
Subite aŭdis li pri l' fea monto Penglai, kiun
en nubomaro oni vidis nure en konturo.

Jen staris fajna pavilon' en kolorriĉaj nuboj,
troviĝis multe da feinoj belaj en la loko.
El ili unu kun la nomo Taizhen, belaspektas,
kun blanka haŭto, tre simila al ŝi kun allogo.

La pastro frapis je la jada pordo okcidenta,
kaj petis servistinon prianonci lian venon.
Aŭdinte pri la mesaĝist' el la imperiestro,
Feino Taizhen tuj elsonĝis, portis dub-mienon.

Levinte litkovrilon, ŝi tuj surŝultrigis veston,
disŝovis ŝi l' ekranon kaj kurtenon jen leĝere.
Kun hartuber' klinita jen pro ellitiĝo ĵusa,
elhastis ŝi kun la kapkrono en malord' iele.

Zefir' flirtigis ŝiajn larĝmanikojn buntkolorajn,
kvazaŭ ŝi dancus belan dancon Ĉielarka Vesto.
Solecon montris ŝiaj vangoj jen kun larmmakuloj,
simile ĝuste al pirfloroj kun pluvguta resto.

Ŝi kore dankis l' Ekscelencon pro favoro lia,
dum longa tempo ili ne intervidiĝis kare.
Ne daŭris plu en la palac' ilia arda amo,
ŝi loĝis en ĉiela fea mondo jam multjare.


Ŝi ĵetis malsuprenrigardon al la homa mondo,
ŝi vidis ne palacon, sed vastmaron de nebulo.
“Mi sendas al li paron da harpingloj en orkesto
por la profundan senton ja esprimi kun ambrulo.

Konservas mi l' alian paron da harpingloj oraj
kaj l' saman keston por atesti amon de sincero.
Se nia kor' fidelas kiel firmas orharpingloj,
ni renkontiĝos, ĉu sur la ĉielo ĉu sur tero.”

Ĉe adiaŭo al la pastro ŝi konfidis al li
la ĵuron kaŝan kiun nur ŝi kaj li konas bone:
“La sepan de l' monato sepa en Palac' Longvivo
ni tiujare ĵuris al ĉiel' serioz-tone:

Sur la ĉielo ni fariĝu paro da ambirdoj,
ni iĝu interplektiĝintaj branĉoj sur la tero.
Ĉiel' kaj tero iam venos al la fina horo,
sed la bedaŭro de viv-morto daŭros sen ŝancelo.”

elĉinigis Wei Lai



Anonimulo

Honesteco estas oro

(reverkita de **Mei Jie** laŭ interreta dramo)

unuakta dramo

Personoj:

A Kin (viro), kvardek-jara, honesta civitano

Chen Chuantong (viro), kvardek-jara, amiko de A Kin, kun bonhumora karaktero kaj helpemo

Reĝo (viro), kvindek-jara, iom menskonfuzita kaj ŝtipcerba

Juĝisto (viro), kvardekkvin-jara, ruzema

Ĵuriano kaj ekzekutistoj k.a.

(Kiam la kurteno leviĝas, envenas reĝo, juĝisto kaj ĵuriano, eskortante A Kin.)

Reĝo: Mi estas la reĝo de la Regno de Malvirtoj. Mi havas absolutan potencon. Sed A Kin, tiu ribelanto, akuzas min, ke sub mia regado mi nur zorgas pri malvirtoj kaj ignoras justecon. Li petas, ke mi ŝanĝu la nomon de nia regno al “Regno de Justeco” kaj mi fariĝu saĝa kaj kapabla suvereno. Kaj li insistas, ke se mi ne sekvas, kion li diras, li alvokos la popolon renversi mian regadon. Kia absurdaĵo! Tio vere estas ribelo! Mia moto estas “tiuj, kiuj obeas al mi, vivas plu, kaj tiuj, kiuj staras kontraŭ mi, tute pereos”. Nun mi anoncas, ke juĝisto komencu juĝi la ribelanton A Kin.

Juĝisto (*elprenas verdiktan dokumenton*): La tribunala enketo diras, ke La krimo de A Kin malglori la reĝo estas konfirmita. Laŭ difino de la unua klaŭzo de la unua artikolo de la leĝo de Regno de Malvirtoj, tiuj, kiuj malgloras la brilan figuron de la reĝo, povas esti kondamnita al morto. Mi nun solene anoncas, ke A Kin estas kondamnita al senkapigo. Post tri monatoj li estos eskortita al ekzekutejo. Nun mi finlegis la verdikton. Ĉiuj retiriĝu el la tribunalo.

(La aliaj eliras.)

A Kin (tre indigne): Mi volas apelacii. Estas maljuste kondamni min al morto laŭ la leĝo de la Regno de Malvirtoj. Tiu leĝo, pli haladza ol hunda fekaĵo, devus esti nuligita jam frue. Mi ne obeas, mi volas apelacii. Mi volas renversi la regadon de la Regno de Malvirtoj kaj starigi justan landon amatan de la popolo...

Reĝo (*interrompas A Kin*): Tuj sigelu lian buŝon. Ne permesu al li diri absurdaĵojn. Ne permesu al li nigriĝi min, la grandan reĝon! En la regno mi ja estas la suno, la luno, la aero, la greno, la pano. Mi estas... estas ĉio de ĉio.

Juĝisto: Jes, prave! Nia amata reĝo estas ĉio de ni, la vestoj ŝatataj de ni, la rizo ŝatata de ni kaj la mono ŝatata de ni! Tiu, kiu kontraŭstaras la reĝon, ja similas muson, kiu kontraŭstaras katon. Ni absolute ne permesas al muso kontraŭstari katon.

Reĝo: A Kin, se nur vi konfesas vian krimon, ne plu nigrigas min kaj diras komplimentojn al mi, mi ne mortigos vin kaj donos al vi rangon.

A Kin: Mi estas civitano kun sento de justeco, sed ne ribelanto. Mi neniam submetiĝas al malvirtoj. (*Ploras*) Mi sentas doloron en la koro. Eĉ se mi mortus, mi ne povus fermi miajn okulojn en paco! Mi vere ne volas morti. Vivi estas miloble bona pli ol morti!

Juĝisto: Vi pentas! Do konfesu vian krimon al la reĝo. Nia granda reĝo havas pli grandan bruston ol la maro, pli grandan ol la granda akvomelono. Homoj devas klini la kapon sub la malalta tegmentorando!

A Kin: Fermu vian buŝon! Ĉu vi pensas, ke mia ploro signifas mian timon al morto. Vi ege malpravas! Mi ne volas morti, ĉar mi maltrankviliĝas pri mia okdek-jara patrino. Mi estas sindonema filo. Ĉe mia morto mi volus revidiĝi kun mia maljuna patrino malproksima je mil lioj kaj mi volus montri mian sincerecon al ŝi, ĉar mi ne povus servi ŝin ĝis ŝia morto. (*Ploras*) Mi petas, ke vi permesas al mi reiri al la maljuna patrino kaj servi ŝin ĝis la tago de mia morto ĉe ekzekutejo, mi petas!

Reĝo: Ne ploru. Mi tuj moliĝas, vidante larmojn. Mi konsentas, ke vi revidiĝos kun via maljuna patrino, sed mi havas kondiĉon, ke vi trovas iun malliberiĝi en karcerio anstataŭ vi.

A Kin: Mi havas tre bonan amikon kun nomo Chen Chuantong. Trovu lin. Mi volas, ke li enkarceriĝos anstataŭ mi.

Reĝo: Alvoku Chen Chuantong. (*Envenas Chen Chuantong.*)

Chen Chuantong: Mi tre ĝojas reagi al la alvoko de mia amiko kaj mi hasteme alvenas. Mi konsideras, ke li invitas min al drinkado, sed mi ne atendas, ke mi venas vidi lian morton. Por mia amiko mi venas, riskante danĝeron.

Reĝo: Ĉu vi estas Chen Chuantong?

Chen Chuantong: Jes, mi estas.

Juĝisto: Ĉu A Kin estas via amiko?

Chen Chuantong: Jes ja, li estas mia plej bona amiko. Ni intimas kiel akvo kaj fiŝo, kiel maldeksta kaj dekstra kruroj, kiel...

Reĝo: Ne babilaĉu. Mi tre malŝatas tiujn blablaemulojn. A Kin volas reiri prizorgi sian okdek-jaran patrinon, ĉu vi volontus resti en malliberejo kelkan tempon anstataŭ li?

Chen Chuantong: Nur malsaĝuloj volontas resti en malliberejo.

Reĝo: Ĉu tio signifas, ke vi ne volontas resti en malliberejo anstataŭ li?

Chen Chuantong: Kompreneble ne.

A Kin: Bona frato, mia patrino estas jam en la aĝo de pli ol okdek jaroj kaj pro malsanemo alnajiĝas al la lito la tutan jaron. Do restu en malliberejo anstataŭ mi kelkajn tagojn, tiel ke mi povos reiri prizorgi mian patrinon. Mi estas honesta devoplenumanto. Mi certe revenos ĉe la tago de mia senkapigo.

Chen Chuantong: Ne ploru. Mia koro moliĝas pro via ploro. Mi volontas resti en karcero anstataŭ vi. Reiru senzorge.

Juĝisto: Ne promesu tion malprudente, ĉar eble okazos via senkapigo. Se A Kin ne revenos ĉe la tago de ekzekutado, ni senkapigos vin anstataŭe. Ĉu vi volontas?

Chen Chuantong (*pripensas momenton*): Mi volas dividi malĝojon kun mia amiko. Li fidis min kaj ankaŭ mi lin. Fidemo estas oro brilanta, kiu por ĉiam prilumas la mondon. Amiko, mia kara amiko, (*kaptas la manon de A Kin*) trankvile foriru prizorgi vian maljunan patrinon kelkajn tagojn. Tamen vi nepre revenu ĉe la tago de via senkapigo. Ankaŭ mi havas edzinon kaj gefilojn, kiuj atendas min.

A Kin: Estu libera de zorgoj. Ĉe la tago de ekzekutado mi nepre revenos. Mi certe ne rompos mian promeson.

Juĝisto: Ne babilaĉu. Rapide foriru. (*puŝas A Kin kaj tiu eliras.*) Hahaha... (*montras la nazon de Chen Chuantong.*) Vi estas la plej granda malsaĝulo. A Kin ne revenos. Atendu morton.

Chen Chuantong: Kiam li estis knabo, A Kin esti bona infano fidela al sia promeso. Li denaske malamas mensogon, kiel muso malamas katon. Mi kredas lin kiel min mem.

Reĝo: Vi kredas lin, dum li kredas vin. Kiel enkarcerito povus havi sincerecon? Vi plibone atendas morton obeeme ĉi tie. Mi vidis sennombrajn malsaĝulojn, sed ne tiajn malsaĝulojn de ĉiuj flankoj, kia vi. Ni iru! Lasu lin penti kaj plori. (*Reĝo kaj juĝisto eliras.*)

Chen Chuantong (*kalkulas la tagojn per fingroj*): Tago post tago forpasis. Vintro foriris kaj printempo venas. Nun la tero plenas je vikleco, herbo verdas, sovaĝaj floroj ovriĝas, abeloj zumadas kaj papilioj leĝere flugas. Kiel bela afero, se mi elirus el la malliberejo kaj prenus freŝan aeron ekstere!

(*Reĝo kaj juĝisto envenas.*)

Reĝo: Kiel malfeliĉe! kiel malfeliĉe! Vi estas homo, kiu ne havas morgaŭon. Vi ne povas vidi la belan naturon nek enspiri la freŝan aeron, ĉar hodiaŭ vi estas senkapigota.

Chen Chuantong: Kio? Ĉu hodiaŭ mi estas senkapigota? Vi ne pravas! Mi jam kalkulis la tagojn. Ankoraŭ restas sep tagoj.

Juĝisto: Hahaha...vi vere estas malsaĝa, tre malsaĝa...hahaha...

Chen Chuantong: Ne ridu plu! Via rido konfuzas mian menson.

Juĝisto: Vi estas malsaĝa la tutan tempon.

Chen Chuantong: Kial vi diras, ke hodiaŭ estas la tago de mia senkapigo?

Reĝo: Ĉu vi scias, ke vi grave malsaniĝis antaŭ kelkaj tagoj?

Chen Chuantong (*balancas la kapon*): Jes.

Reĝo: Pro forta febro vi kuŝis sen vekiĝi kaj deliris sep tagojn kaj sep noktojn.

Hodiaŭ estas la oka tago, kaj tial hodiaŭ estas la tago de via senkapigo. Ĉu vi havas lastajn vortojn ĉe morto? Rapide eldiru, alie vi ne havos sufiĉan tempon por diri.

Chen Chuantong (*kolapsas sur la teron*): Aĥ, mia Ĉielo! Hodiaŭ mia kapo falos sur la teron. Kiel mizera mi estas! Kiel trista mi estas! Mi staras tuj ĉe la sojlo de frenezeco! A Kin! A Kin! Kie estas A Kin? Tuj diru al mi, kie A Kin estas.

Juĝisto: Nun A Kin, kiel senĝena birdo, libere flugas en la ĉielo. Laŭ nia antaŭa interkonsento, se A Kin ne revenos, vi mortos anstataŭ li. Do iru morti! Vi granda malsaĝulo!

Chen Chuantong: Ne, ne! Vi ne povas mortigi min! Mi nur malliberiĝas anstataŭ li. Li ne devas ne plenumi sian promeson. Li ne devas lasi min morti senkaŭze. Ne estas juste. Rapidu! Rapide revenigu lin, mi petas.

Juĝisto: A Kin restas malproksime. La fora akvo ne povas savi la proksiman fajron. Eĉ se li de nun rapidus ĉi tien, li ne povus atingi ĝustatempe. A Kin estas mensogisto, kiu ne plenumas promeson. Jen vi meritas morton.

Reĝo: Jes, vi meritas morton.

Chen Chuantong: Mi, mi...ankoraŭ havas edzinon kaj gefilojn por prizorgi, kiuj atendas min por vivteno. Kie vi troviĝas, A Kin? Hodiaŭ mi mortos por vi, dum vi vin kaŝas malproksime. Ĉu via konscienco estas formordita de hundo? Eĉ mi fariĝus fantomo, mi reguligus konton kun vi. (*Ploras*) mm... mia koro tute disŝiriĝas. Ĉu ne ekzistas honesteco en ĉi mondo? Ne, mi kredas ke ja ekzistas honesteco en ĉi mondo. Honesteco kaj sincereco neniel malaperas el la mondo, ĉar homoj estas nek bestoj nek demonoj. Honesteco kaj sincereco neniel mortos. Mi kredas, ke A Kin revenos, certe revenos!

Reĝo: En ĉi momento vi eĉ sonĝas kaj kredas tiun trompiston. Se A Kin vere revenus, tio certe tre kortuŝus min. Kaj mi ne nur indulgus al vi la vivon, sed ankaŭ agu laŭ la vortoj de A Kin: ŝanĝi la nomon de nia regno al Regno de Justeco kaj venki miajn mankojn por fariĝi la reĝo respektata kaj amata de ĉiuj popolanoj. Sed mi ne kredas, ke A Kin revenos.

Juĝisto: Jam estas la tempo de ekzekutado. Envenu ekzekutistoj.

(Envenas du ekzekutistoj.)

Chen Chuantong: Ne, ne! Mi ne volas morti. Mi petas, ke vi indulgi al mi la vivon! Atendu A Kin pli da tempo. Li estas honesta kaj devofidela. Li diris, ke li nepre revenos, kaj li certe revenos.

Juĝisto (*rikanas*): Malsaĝulo! Vere malsaĝulo, vi eĉ ne faligas larmojn je ekvido de la ĉerko. Fidu je honesteco kaj sincereco jen en la infero! Jen estas la tempo de ekzekutado. Mi anoncas “ek al ekzekutado”! Tuj forhaku la kapon de Chen Chuantong! (*Chen Chuantong kolapsas sur la teron. La du ekzekutistoj subtenas lin por stariĝi kaj surgenuigas lin. Ili levas la buĉglavon.*)

(A Kin hasteme envenas.)

A Kin: Haltigu la ekzekutadon! Mi revenas!

Chen Chuantong (*firme kaptas la manon de A Kin*): Vi estas la plej honesta kaj sincera homo en la mondo. Dankon al vi! Dankon al vi!

A Kin: Mi devas vin danki. Vi terurigiis pro mi!

Reĝo: Tre kortuŝa sceno! Ĝi multe kortuŝas min. A Kin estas fidela al sia promeso. Mi admiras lin. Vi ambaŭ estas regnantoj tenantaj honestecon kaj sincerecon. Nun mi anoncas, ke foriĝu la mortpuno al A Kin. Mi volas ŝanĝi la regnan nomon al Regno de Justeco, kaj de nun mi penas esti suvereno reprezentante justecon. Lasu la honestecon kaj devoplenumadon prilumi la mondon kiel la suno!



(La kurteno falas.)

Guozhu (1938-2020)



aŭtoro, Guozhu

Senfina honoro, senfina adoro

— Dante sub rigardo de ĉina esperantisto

Okaze de la 91-a UK en la fama urbo Florenco, mi, Guozhu, kiel ĉina esperantisto el la Oriento, volas retrorigardi kaj konigi al vi iom da anekdotoj rilate al la verkoj de Dante en Ĉinio.



1. *La Dia Komedio* ek al Ĉinio

La kono de ĉinoj pri Dante kaj lia poemo *la Dia Komedio* okazis po iome, trapasinte etapojn sinsekte de neniom, iomete, iom, nemulte, plimulte, pli profunde, de enkonduko, traduko, studado, adorado, akiro de utiloj, premioj ĝis pilgrimado al la hejmloko de Dante..., tio daŭris ĉ. cent jarojn.

Ĉinio kaj Italio ambaŭ estis landoj kun brila antikva civilizacio, kredeble skribformaj interfluoj inter ili okazis jam delonge. Tamen, ampleksa diskonigo de italaj literaturaj verkoj en Ĉinio komenciĝis kaj disvastiĝis nur je la 20-aj jaroj de la 20-a jc, kiel unu el la fruktoj de la novkultura movado de La Kvara de Majo (1919). Aro da famaj literaturisoj, erudiciaj kleruloj kaj filozofoj de Ĉinio kontribuis kiel pioniroj en konigado de la itala literaturo.

Kiam la mondfama *Dia Komedio* de Dante ekiris en Ĉinion?

*** 1904**

La plej frua registro okazis antaŭ jarcento, en 1904, kiam ĉina erudito Wang Guowei (1877-1927) en sia verko "Komentarioj pri la Ruĝdoma Sonĝo de Cao Xueqin" jam menciis pri la *Dia Komedio* de Dante. ^[noto 1]

Estis tre nature ke s-ro Wang Guowei egalige menciis la du verkojn *La Ruĝdoma Sonĝo* kaj *La Dia Komedio*. Ĉar antaŭ jarcentoj en Ĉinio jam furoris jenaj versoj ke
Sen babilo pri Ruĝdoma Sonĝo la romano,
ĉiom da via dokta legado restas vano. ^[noto 2]

Ni do facile akiris la italan pasticon de la supraj versoj ke
Sen babilo pri la Dia Komedio
ĉiom da via scio restas nenio.

Supozeble ke niaj italaj amikoj konsente kapjesis je tiu aserto.

* 1907

Krom Wang Guowei, tiam la politikisto s-ro Ma Junwu (1882-1939) ankaŭ rimarkis Dante-n. S-ro Ma Junwu verkis poemon "Gratule al la Nupto de Gao Jiangong", kiu legiĝas jene:

Dante en Romo prestiĝas en kulmino.
Adoras lin eĉ infanoj kun sinklino.
Li konfesis ke la Dia Komedio
kreiĝis dank' al inspir' de belulino.

Tio rekordas per la ĉinigo de la nomo Dante, en du ideogramoj malsamaj ol tiuj uzitaj de Wang Guowei, sed publike agnoskitaj kaj populare uzataj ĝis hodiaŭ. ^[noto 3]

* 1909

En 1919, Su Manshu (1884-1918) kaj Chen Duxiu (1879-1942) ^[noto 4] intervertis reciproke per Poemdeko, kaj troviĝis komuna poemo ke

Dante kaj Byron— miaj instruistoj,
kun maroj da talentoj, sort-rezistoj.
Ne ĉesu sonori viaj ruĝ-kordoj.
Al kiu mi plendus kun amar-tristoj?

La ideogramoj, kiujn ili uzis por ĉinigi la nomojn Dante kaj Byron, estas malsamaj ol tiuj skribitaj hodiaŭ.

* 1910

En sia libro *Gui Qian Ji* (Ermita Reveno), eldonita 1910, s-ino Qian Shan Shili (1858-1945) menciis pri Dante kaj la *Dia Komedio*. ^[noto 5]

S-ro Qian Xun (1853-1927), edzo de la aŭtorino s-ino Qian Shan Shili, funkciis en 1908-1909 kiel ĉina vicambasadoro sendita de Kortego de Qing-dinastio al Italio. Kune kun sia edzo kaj filo, s-ino Qian Shan Shili vivis en Romo du jarojn kaj havis la ŝancon kontakti italajn literaturon kaj arton.

Ilia filo, junaĝa Qian Daosun, siatempe en Romo legis la originalon de *la Dia Komedio*, kaj poste fariĝis la plej frua tradukinto de *la Dia Komedio* en Ĉinio.

2. Rara specimeno far Qian Daosun

S-ro Qian Daosun (1887-1966) estis erudicia polihistoro pri muziko, dramo, belarto, medicino, samtempe ankaŭ poligloto scipovanta japanan, italan, germanan kaj francan lingvojn.

* 1921

Juna Qian Daosun iam vivis kun siaj gepatroj en Romo, kie li legis la originalon de *la Dia Komedio*. Post reveno al Ĉinio, li ĉinigis la unuajn tri kantojn de la unua kantiko *Infero* laŭ versa stilo de la ĉina antikva poemo *Lisao* de la fama poeto Qu Yuan (ĉ. 340-278 a.K.). [noto 6] Qian Daosun titolis sian ĉinigon La Unua Specimeno de la Dia Komedio kaj publikigis ĝin en 1921, okaze de la 600-jariĝo de forpaso de Dante, en la revuo *Monata Novelo*. Lia traduko legiĝis atikisme kaj elegante, kun detalaj piednotoj.

* 1924

Fakte, post *La Unua Specimeno de la Dia Komedio*, Qian Daosun ĉinigis ankaŭ la sekvantajn du kantojn, kaj li kolektis sian ĉinigon de la kvin kantoj 3 de *Infero* en broŝuron, kiun li publikigis 1924 kiel unu el la biblioteko de la *Monata Novelo*.

* 1927

La saman ĉinigon Qian Daosun refoje publikigis 1927 en la revuo *Xue Heng* (n-ro 72). Li konservis la *lisao*-stilajn versojn sed forigis tro detalajn piednotojn, anstataŭe li aldonis nur kelkloke koncizan klarigon. *La Dia Komedio* estas vere mirinda verko. Havante 14233 versojn en 100 kantoj, tre eble ĝi rekordas kiel la plej longa poemo en la monda literaturo, kun rigora ritmo kaj rimaranĝo laŭ tercino, pro la granda diferenco inter la okcidenta kaj ĉina poezio, ĝia traduko per la ĉinaj ideogramoj ja estas apenaŭ plenumebla tasko.

Tial, dum longa tempo, ĉiuj ĉinigoj de *la Dia Komedio* estas nur en prozo sed ne en versoj.

La Unua Specimeno de la Dia Komedio fare de s-ro Qian Daosun, kvankam ankoraŭ ne estis en kompleta tasko, tamen ĝi ja estis la plej frua traduko en versoj en Ĉinio. Aparte rimarkinda estis ĝia rimaranĝo tute laŭ tercina maniero. Tio estas vere rara kaj kara specimeno.

3. Versaĵoj de Dante kiel donaco de nupto

Aparte rimarkinda estas la provo far Qian Daosun ke li eĉ verkis dramon *Sonĝo de Dante* utiligante la rakonton de *la Dia Komedio*. Bedaŭrinde nun ni povas legi nur la unuan akton *Ek al la Spirita Vojaĝo* de la nomita dramo en la n-ro 39 de la

revuo *Xue Heng* (marto 1925). Ni ne povas certigi ĉu Qian Daosun jam ellaboris la tutan dramon. Por respondi al tiu demando oni ankoraŭ devas fari plian esploron.

Laŭ *Vortoj de la Redaktoro* en n-ro 72 de la revuo *Xue Heng* ni informiĝis pri tio, ke Qian Daosun ĉinigis ankaŭ la libron *Nova Vivo* (Vita Nova) de Dante kaj li donacis tion en 1926 al Xu Zhimo kaj Lu Xiaoman kun varma gratulo al ties geedziĝo en Pekino.

Temis pri nupto de famaj getalentuloj.

La novedzo Xu Zhimo (1897-1931) estis poeto, famkonata Princo de Ampeoj. Li sprite ĉinigis la nomon de Florenco laŭ itala prononco Ference, kiu facile vekis pens-asocion en la ĉina kiel "Frida Smeraldo" kaj li verkis faman eseon *Unu Nokto en Ference*.

La novedzino Lu Xiaoman (1903-1965) estis admirinda enkorpiĝo de belulino plus talentulino. Kiam ŝi enamiĝis al Xu Zhimo, ŝi ankoraŭ estis laŭleĝa edzino de alia sinjoro. Tia amo ekster geedzeco do koloris iom peka kontraŭ tiama moro kaj moralo kaj fariĝis unu el la plej sensaciaj novaĵoj en la socia vivo.

Tia peka koloro ankaŭ faris ilian amon malfacila tra zigzaga vojo, nupton en aparta atmosfero kaj kun neordinara nuptdonaco.

Laŭ noto en la *Taglibro de Wu Mi*, tiu nupto okazis en 1926-10-03 kaj en la nupto majstro Liang Qichao (1873-1929), la honorinda nupt-atestanto, severtone donis moral-admonon al la nova paro ke "Neniam ankoraŭfoje la samon!".

La Nova Vivo estis verko de Dante pli frua ol *la Dia Komedio*. Ĝi rolis kvazaŭ preludo kaj antaŭpreparo por kreo de la estonta *Dia Komedio*.

Amo naskis la verkon *Nova Vivo*, en kiu Dante verŝis sian puran amon al sia amata Beatrice.

Qian Daosun donacis sian ĉinigon de la *Nova Vivo* al Xu Zhimo, la Princo de Ampeoj, kiel nupta gratulo. Ho, kiom bela kombiniĝo de la donaco, donacinto kaj donacito!

Prof. Wu Mi (1894-1981) estis ĉefredaktoro de la revuo *Xue Heng*, kaj li mem ankaŭ havis grandan respekton al Dante. En n-ro 41 de la revuo *Xue Heng* publikiĝis lia traduko de *la Enkonduko al la Angligo de la Dia Komedio*, verkita de usona dantelogo Grandgent.

4. Centjara stafeto por ĉinigo de la *Dia Komedio*

Ankaŭ la ĉinigo de la *Dia Komedio* progresive daŭris en Ĉinio dum la pasinta jarcento, trapasinte etapojn de tradukoj ekstrakta, nekompleta, kompleta, nerekte el-italiga, rekte el-italiga, proza, versa, senrima, kunrima, tercina..... pli kaj pli perfektigintaj dank' al klopodado far unuj post aliaj ĉinaj tradukistoj.

Krom la supremenciitaj *La Unua Specimeno de la Dia Komedio* tradukita de Qian Daosun, kiu publikiĝis en 1921, okaze de la 600-jariĝo de la forpaso de Dante, dum la pasintaj cent jaroj aperis almenaŭ subaj 6 aŭ 7 influohavaj ĉinigoj de *la Dia Komedio* en Ĉinio.

Traduko de Wang Weike, la plej frua kompleta ĉinigo.

S-ro Wang Weike(1900-1952) estis instruisto de Hua Luogeng(1910-1985, fama ĉina matematikisto) en mezlernejo. Laŭ rememoro de Hua Luogeng, s-ro Wang Weike estis erudito kiu bone konis ĉinan kaj okcidentan kulturojn. S-ro Wang Weike ĉinigis *la Dian Komedion* kompare laŭ franca kaj angla tradukoj.

Lia proza ĉinigo legiĝis suka en rigoro, flua ne sen brido. Lia ĉinigo eldoniĝis 1939 kaj 1948, kun multaj reeldonoj en postaj jaroj.

Traduko de Tian Dewang, kompleta, rekte el la itala originalo, plej populara, kun plej detalaj notoj.

S-ro Tian Dewang (1909-2000), profesoro de Pekina Universitato, iam studis en Italio, sub gvido de majstra prof. Mominiano, dum la 30-aj jaroj de la pasinta jarcento. En 1983, 74-jara prof. Tian Dewang komencis ĉinigi *la Dian Komedion* rekte el la itala originalo. Lia laboro daŭris 18 jarojn ĝis la aŭgusto de 2000, kiam li finis la ĉinigon de la lasta kanto de la Dia Komedio. Du monatojn post kiam li plenumis la historian mision, prof. Tian Dewang forpasis en 2000-10-06.

Prof. Tian Dewang modeste rigardis sin mem ne-poeto, sekve li forlasis 5 versan formon por sia traduko. Li pli atentis pri la profunda konigo de la enhavo, kaj li faris tre detalajn studnotojn. Ekz-e, nur por la dua kantiko *Pugatorio* li jam aldonis 1311 notojn. Ĉiom da notoj kiujn li faris por la tuta *Dia Komedio* resume atingis ĉ. milionon da ĉinaj vortoj, kiuj meritas esti rigardataj kiel brila studo pri la ideologio kaj kulturo de la mezepoka Italio!

La brila traduko far prof. Tian Dewang estis honorigita en 2005 per la 3-a tutlanda Lusin-premio al la elstara literatura traduko, kaj estis plej populara inter diversaj tradukoj de *la Dia Komedio* en Ĉinio.

Traduko de Zhu Weiĵi, la unua versa ĉinigo

S-ro Zhu Weiĵi(1904-1971) tradukis laŭ angla versio de D-ro Carlyle kun ilustraĵoj de franca Gustave Dore. Lia traduko rekordas kiel la unua ĉinigo en versoj, ebligante al la ĉinaj legantoj ĝui elstaran poezion de Dante, sekve estis plurfoje reeldonita en Ĉinio.

S-ro Wu Xinghua ankaŭ faris bonegan ĉinigon en versoj, eĉ laŭ rimaranĝo de tercino. Bedaŭrinde lia traduko estis ruinigita en la katastrofaj jaroj de la Granda Kultura Revolucio (1966-1976), kaj nun postrestis nur mizere malmultaj pecoj.

Lastatempe aperis ankaŭ aliaj tri novaj tradukoj de *la Dia Komedio* en versoj. Traduko de Zhang Shuguang, eldonita en Guangxi. La tradukinto estis poeto, li tradukis el la angla dum pli ol tri jaroj, inklinas al uzo de freŝaj paroloj sen arkaismo. Traduko de Huang Wenjie, eldonita en Guangdong. Li uzis strofojn el tri versoj, laŭ kontinua rimo.

Traduko de Huang Guobin (1946-), eldonita en Hongkongo 2004. Ĉar la tradukinto klopodas redoni la tercinan rimadon de originalo, lia ĉinigo el itala lingvo daŭris 20 jarojn, kaj, por redakto de piednotoj li pagis ankoraŭ pli du jarojn.

De tio ni povas scii, ke, kelkajn jarcentojn post sia forpaso, Dante venas al la orienta lando Ĉinio. Tio ankaŭ estas granda vojaĝo, kvankam li mem scias verŝajne neniom pri tio.

5. Ĉinaj pentraĵoj pri *La Dia Komedio*

La Dia Komedio aperis jam pli ol 700 jarojn, kaj, dank' al sia enciklopedia dokteco ĝi jam fariĝis speciala faka scio (simile al la ruĝlogio en Ĉinio, studo pri la Ruĝdoma Songŝo) kun sennombraj legantoj, sennombraj tradukintoj, 6 sennombraj Dantelogoj, sennombraj komentariistoj, kaj same ankaŭ sennombraj pentrintoj.

La majstra poemo mem, la ampleksa kaj profunda studado far Dantelogoj, kaj la belegaj artaĵoj kun temo pri *la Dia Komedio* dum jarcentoj, kune formiĝis nedisigebla triopo en monda art-trezorejo, kies enhavo kreskas kun ĉiu tago kaj neniam ĉesis pro la jam ekzistantaj malnovaj trezoroj.

Ekzemple, ni rigardu nur al la 5-a kanto en la unua kantiko *Infero*. Al kiom da artistoj inspiris la tragedia amrakonto de Paolo kaj Francesca! Se ni traserĉus en Interreto pri tio, ni tre facile trovis abunde da mirindaj artaĵoj kreitaj de majstroj Amos Cassioli (1838-1891), Auguste Rodin (1840-1917), Ary Scheffer (1795-1858), Anselm Feuerbach (1829-1880), Marie-Philippe Coupin de la Couperie (1773-1851), Dante Gabriel Rossetti (1828-1882), Gustave Doré (1833-1883), Jean A. D. Ingres (1780-1867).....^[noto 7]

Ĉ. cent jarojn post kiam *la Dia Komedio* venis al Ĉinio, ĉinaj artistoj unufoje rompis la silentadon de 6 jarcentoj en la tereno de *la Dia Komedio*, kaj ankaŭ eldonis sian omaĝon.

En 1985, Zhang Dedi (1932-2005), prof. de la Ĉina Centra Belarta Instituto, kreis barelifan portreton de Dante kaj gajnis premion honorigitan en la Itala Prezidento en la 7-a Skulptura Konkurso kadre en la 7-a Dante-Festivalo en Italio.

En 2000, eldoniĝis en Ĉinio granda albumo *Ilustraĵoj al la Dia Komedio* el 565 paĝoj, kun 41 koloraj kaj 422 nigra-blankaj bildoj, aperintaj dum la pasintaj jarcentoj tra la mondo. I.a. unufoje aperis pentraĵoj far ĉina fama pentristo **Li Shaowen** (1942-), kiu kreis dum 1982-1987 jaroj. Liaj verkoj karakteriĝis per moderna etoso,

nuntempa aprezgusto kaj ĉinaj trajtoj, kaj gajnis en 1987 la Premion al Brilaj Kulturaj Atingoj de la Internacia Dantelogia Asocio.

Ni prezentas al vi 7 specimenojn de liaj pentraĵoj pri *Infero*:^{[[noto 8](#)]}

1. Limbo, la unua rondo de l' Infero. En la limbo estas la ŝvebantoj, nebaptitaj senpekuloj. (kanto IV)
2. Paolo kaj Francesca (da Rimini) (kanto V)
3. Tri Furioj, tri Erinoj (Meģera, Alekto, Tizifone). (kanto IX)
4. Tri ombroj tra flampluvo (kanto XVI)
5. Ombroj de florencaj uzuristoj kun siaj blazonoj (kanto XVII)
6. ĉefpastro Kaifas, kiu motivis la krucumon de Kristo jene: "prefere mortu unu homo, ol pereu la popolo." (kanto XXIII)
7. Cocytus, Lago de gelo, la fundo de l' Infero. (kanto XXXII)



6. Eka renkontiĝo eterne daŭra

Estas neeble paroli pri Dante sen Beatrice. Ĝuste dank' al la inspiro de Beatrice, Dante kreis la mondfaman poemon *La Dia Komedio*.

En la tria kantiko de *la Dia Komedio*, kiel anĝelo Beatrice gvidis Dante-n vojaĝis tra la Paradizo al Empireo.

Tamen, en la reala vivo, renkontiĝo de Dante kun Beatrice okazis nur dufoje dum la tuta vivo, tute hazarde, eĉ sen vorto da intersaluto.

Dante mem tiel skribis pri la du renkontiĝoj.

Pri la unuafoja renkontiĝo.

En sia libro *Vivo Nova* Dante skribis pri sia sento kiam li, 9-jara, unuafoje vidis Beatrice:

“sekretega kamero de la koro, ekstremis tiel forte, ke ĝi iĝis terure videbla ankaŭ en la plej malgrandaj pulsoj.” (Vivo Nova p13)

Dante ankaŭ versis en la Paradizo, ke

De l' tag' unua, kiam ŝian frunton

mi monde vidis, ĝis tiu ĉi vido,

ŝin sekvis mia kanto sen barilo; (Paradizo 30:28-30)

(Traduko de Giovanni Peterlongo)

Pri la duafoja renkontiĝo:

"Kiam pasis tiom da tagoj, kiom plenumas naŭ jarojn post la apero de la ĝentilega damo, en la lasta tago ĉi tiu mirinda damo aperis al mi kun vestaĵo blankega inter du ĝentilaj damoj pli aĝaj; paŝante sur strato, ŝi turnis la okulojn tien, kie mi estis tre timema;..... La horo, kiam min atingis ŝia dolĉega saluto, estis ja la naŭa de tiu tago" (Vivo Nova p.15)

Tiu ĉi alineo poste fariĝis fonto de multaj pentraĵoj, el kiuj la plej fama estis "La Renkontiĝo de Dante kun Beatrice" far Henry Holiday (1839-1927) , kies reproduktaĵo kiel poŝkarto nun estas tre populara en Florenco.^{[[noto 9](#)]}

Tiu anekdoto frape allogas nin per jenaj trajtoj:

Hazarda renkontiĝo, senfrukta por geedziĝo, dumviva amo, ĝisosta sopiro.

Ĉinoj facile elmemoras pri la similaj verkoj en Ĉinio, ekz-e *Kanto pri la Feino de Luo-rivero* far Cao Zhi(192-232), *Feniksa Harpinglo* de Lu You(1125-1210), *Ekvido de Belulino* en la fama dramo *La Okcidenta Ĉambro* de Wang Shifu (ĉ.1260-1336?).

Liu Yuxi (772-842), poeto de Tang-dinastio, iam versis jenan poemon:

Meandro rivera. Mil salikaj haroj.

Malnova ponteto antaŭ dudek jaroj.

Ĉitie disiĝis mi kaj kara mia,

Ve! de ŝi plu venis informo nenia.

Ankaŭ pri ponteto, pri karulino, pri la malnova pejzaĝo, tamem forpasis jam senrevene la jaroj, pasco, kaj floraĝa belulino. Kie estas retroveblaj la malnova bela sonĝo?

7. Ĉina esp-isto pri Dante en *La Gazeto*

Kiel konate, en Esperantujo ĉiam estis tradicio esperantigi ĉefverkojn de la mondfama klasika literaturo.

En 1918 jam aperis la esp-igo de la unua kanto de *Infero*, tradukita de Eugen Wuster.

Kaj poste sekvis en 1933 la kompleta *Infero* tradukita de Kalocsay, en 1963 la kompleta *Dia Komedio* tradukita de Giovanni Peterlongo, kaj en 2000 la nova esp-igo de *Purgatorio* tradukita de Enrico Dondi, eldonita de FONTO.

Tio montras la fruan komencon kaj longan daŭron de esp-igo de *la Dia Komedio*. Tamen, antaŭ du jaroj mi, Guozhu, pri tio restas ankoraŭ en preskaŭ plena scio, kaŭzita eble de la ĉiama nepagipoveco de ĉinaj esp-istoj.

Kun profunda dankemo mi kore dankas al s-ino Madeleine de Zilah, redaktoro de *La Gazeto* (LG), kiu favore havigis al mi la ŝancon legi *Purgatorion* esp-igitan de Enrico Dondi. Ŝi ankaŭ donacis al mi la libron *Infero*, faman tradukon far Kalocsay. Eĉ en sia unua retpoŝtaĵo ŝi aŭdace proponis al mi ke Guozhu faru recenzon pri la esp-a eldono de *Purgatorio*.

Reage mi rifuzis je la unua minuto, preskaŭ instinkte, per la motivo ke mi estas kaj fremda kaj analfabeta pri Dante. Sed ŝi pacience persvadis kaj instigis min akcepti la taskon.

Tiel en n-ro 120 de *La Gazeto* (oktobro 2005) aperis artikolo de Guozhu pri *Purgatorio*.

Tio estas la unua recenzo de ĉina esp-isto laŭ orientula vidpunkto, kaj grandparte pri konkero de malfaciloj dum legado kaŭzitaj de la malsamaj kulturaj fonoj. Kaj vekis interesiĝon de legantoj.

Krom pozitivaj reĉoj de legantoj de LG, D-ro Wim Jansen eĉ faris nederlandan tradukon kaj publikigis ĝin resume en revuo *Il Bollettino* (n-ro 104, januaro 2006), organo de la nederlanda sekcio de Internacia Societo Dante Alighieri. ^[noto 10]

Por prepari mian manuskripton, mi legis preskaŭ ĉiom da Esp-aj materialoj troveblaj per mia komputilo, inkluzive de neniam publikigita traduko de la 5-a kanto far Raffaele Bagnulo (1880-1975) en 1947. ^[noto 11]

Nature mi legis ankaŭ nemalmulte en la ĉina lingvo.

La plej profunda kortuŝo kaj granda rikolto de mia legado estas tio ke mi malkovris la elkoran adoron, admiron kaj amon de ĉinoj al Dante, la laboron de ĉinoj, el kiuj pli ol unu estis honoritaj per italaj premioj. Mi supozas, ke tiuj ĉinaj informoj estas ankoraŭ ne sufiĉe konataj en nia Esp-ujo.

8. En ĉinaj kulturaj rondoj

Tuj post kiam eniris Ĉinion en la komencaj jaroj en la 20-a jc, *la Dia Komedio* de Dante estis bonvenaj ĉe ĉinaj kulturaj rondoj.

Liang Qichao (1873-1929), fama reformisto kaj erudito, verkis historian dramon *Nova Romo*, kun Dante kiel protagonisto pioniro de reformado.

Lusin (1881-1936) mem konfesis ke junaĝe li tre ŝatas la Dian Komedion, precipe la *Purgatorio*. Li vidis en Dante la ĝeneralan valoron trans tempo kaj spaco, kaj diris ke "formortis kaj armiloj kaj kanonado, sed la voĉo de Dante daŭros eterna."

Lao She (1898-1966) vivis en Britio dum 1924-1929, li mem konfesis ke tiam "dum ne mallonga tempo mi dronis maniule en legado de Dante. Post lego de *la Dia Komedio* mi komprenis kia estas granda literaturo kaj arto."

Bakin (1904-2005), dum punlaborado ĉiutage parkeris versojn de *la Dia Komedio*, kiu subtenis lin trapasi la mallumaj jarojn de la Granda Kultura Revolucio (1966-1976). Poste, en 1982, itala registaro honoris Bakin per medalo de la Internacia Dante-premio.

Mao Dun (1896-1981), dum la Ĉina Rezistmilito Kontraŭ Japanio (1931-1945), komparis Dante al Qu Yuan (ĉ.340-278 a.K), kaj li trovis "multajn interesajn similojn" inter la du grandaj poetoj, ambaŭ kiel reprezentanto de obstina nacia spirito kaj modelo de patriotoj.

Guo Moruo (1892-1978) reagis romantike. En sia *Trilogio Drivado* li ĵuris ke, se Dante versis *la Dian Komedion* por Beatrice, do li ankaŭ verku romanon omaĝe al sia karulino.

Zhao Dan (1915-1980) titolis sian libron *Ĉe la Pordo de Infero*. Kaj Hu Shi (1891-1962) , Su Manshu (1884-1918), Wang Duqing (898-1940), He Qifang (1912—1977), Ruan Zhangjing (1914-2001)... k.a. kun tute malsamaj propraj kariero, humoro kaj strebado, ankaŭ esprimis diversmaniere sian admiron kaj eĥon al Dante.

9. Tajdas flugpensoj ĉinstilaj

Verkoj de Dante kreiĝis kvankam en tempo malnova, loko transmara kaj kun enhavo fremdlanda pri eventoj malproksimaj. Tamen, post profunda legado, kun miro ni trovis tute malajn impresojn: ke ĝi trajtas kvazaŭ en tempo nuna, loko antaŭ niaj okuloj, kun enhavo pri kurantaj eventoj en ĉina socio.

Kvankam en *la Dia Komedio* legiĝas neniom da skribo pri Ĉinio, tamen dum nia legado facile aperadis spontaneaj liberaj flugpensoj rilate al ĉinaj aferoj.

9.1.

Legante pri la naskiĝo de Dante, mi ekpensas pri Li Bai (701-762).

Antaŭ sia akuŝo foje la patrino de Dante havis sonĝon, ke ŝi venis sub alta laŭro sur verda herbo-tapiŝo. Ŝi ekvidis ke infano grimpis sur la laŭron, manĝis la frukton kaj deprenis laŭrajn foliojn kaj trinkis klaran fonton. Tamen la infano ekfalas desur laŭro, transformiĝis en paŝtiston. Dum palpebrumo la paŝtisto transformiĝis en belan pavon. La patrino de Dante vekigis surprizite kaj ŝi naskis Dante.

En Ĉinio ankaŭ cirkulis la legendo ke la patrino de Li Bai havis mirsonĝon ke Venuso falis en ŝian sinon kaj poste ŝi naskis Li Bai.

9.2.

Legante pri la ellaboriĝo de *la Dia Komedio*, mi ekpensas pri la fama diro ke "en ekzilo Qu Yuan versis sian *Lisaon*".

Pro politikaj konfliktoj Dante estis ekzilita ekde 1302 kaj poste li neniam povis reveni sian hejmurbon Florenco. En ekzilo de pli ol 20 jaroj Dante kreis la senmortan poemon *La Dia Komedio*.

Qu Yuan (ĉ. 340-278 a.K.) estis la unua poeto en historio de ĉina literaturo. Ankaŭ en sia ekzilo li kreis majstran poemon *Lisao*.

9.3.

Legante la versojn de Dante, mi ekmemoris pri la similaj versoj de Du Fu (712-770).

En jaroj de sia ekzilo Dante suferis de humiligaj travivaĵoj kaj poste li versis tion en *La Dia Komedio*:

*Vi spertos, kiom havas da amaro
la fremda pan', kaj kiel dura vojo
estas paŝadi per fremdul-ŝtuparo!*

(Paradizo 17:55-60)

Similajn versojn ankaŭ Du Fu skribis pri sia ŝimado en la ĉefurbo Chang'an:

*Matene lordajn pordojn frapas
Mi, nokte post ĉeval' en polvo
Vagas, al frid' regala gapas,
Kaj sinkas en amara volvo.*

(el *Al Ministro Wei*. Trad. Shi Chengtai. en la unua kolekto de *eLibro Poemoj de Du Fu*)

9.4.

Legante la suban strofon de Dante:

Kaj plu:

*"Fabrico, en bezonkondiĉo,
plu multe havi virton vi deziris,
ol malvirtecon kun granda riĉo".*

(Purg.20:25-27)

mi ekpensis pri la konduto de ĉina konfuceanismo, ke *riĉaĵoj kaj honoro maljuste akiritaj estus por mi kiel flosantaj nuboj.*

(*Analektoj de Konfuceo*. VII.16)

9.5.

Legante la versojn de Dante pri la nostalgia sonorado en vespero, ke

*Estis la hor', ke hejmsopirajn pikojn
maristoj sentas, kun kortuŝ' memoras*

*la tagon de l' forlaso la amikojn;
kaj l' freŝan elmigrinton ekdoloras
la son' de malproksima sonorilo,
kiu pro l' tag' mortanta ŝajne ploras;...*

(Purg.8:1-6)

mi facile pensis pri la famaj versoj de poetoj en Tang-dinastio, ekz-e:

*Vespere, mi ne povas vidi la hejmlokon.
Ho, kiel min ĉagrenas en nebul' rivero!*
(el Cui Hao, 704?-754?)

*Venas sonorad' noktmeza al boato.
(el Zhang Ji, ĉ.753)*

9.6.

La bildo sur la kovrilo de la Esperanta eldono de *la Purgatorio* estas pri Pia en la kvina kanto.

*Pri mi memoru, kiu estas _Pia_.
Min naskis Siena kaj Marem' estingis*
(Purg.5:130-136)

Nur du versoj kaj du lokaj nomoj jam rakontis kortuŝan tragedion de Pia. Tia lakonismo vekis mian penson pri la sama stilo en la *Strangaĵoj de Liaozhai* far Pu Songling (1644-1715).

9.7.

Anstataŭ en latina lingvo Dante verkis sian *Dian Komedion* per la vulgara lingvo por ke ĝi estu komprenata ankaŭ de virineto. Tio vekis mian memoron pri la legendo de Bai Juyi (772-846) ke li pruvis la facilan alireblecon de siaj poemoj per tio ĉu maljunulino povas kompreni.

9.8.

Multlokaj kaj longaj komentarioj en la versoj de Dante memorigas min pri la ĉinaj poemoj de Song-dinastio(960-1279) kun enhavo de argumentoj.

Nature, la plej ofta pens(ig)o estas pri la nuntempa reala socio. Ĉie inundas korupto, malversacio, perversaj dekadencoj kaj gangreniĝoj, pli draste ol en la epoko de Dante antaŭ sep jarcentoj.

Sentencoj el verkoj de Dante estas furore famkonataj en Ĉinio, ekz-e

*Postvenu min! La gento diri povas.
Vi firmu, kiel turo ne sinskua
per sia pinto, kvankam vento blovas;*
(Purgatorio 5:13-15)

En iu korto de oficejo sen rilata al literaturo mi eĉ trovis monumenton kun versoj de Dante: ^[noto 12]



*Danke mi ŝuldas forton kaj favoron,
Vi el servuton min al libereco
tiris per ĉiuj vojoj kaj rimedoj.*

(Traduko de Giovanni Peterlongo)

Tio montris kiom grandan amon Dante ĝuas de ĉinaj popoloj.

Tial, unu post aliaj generacioj da ĉinaj kleruloj havis senkomparan admiron al verkoj de Dante, kiun ili esprimis ne nur en Ĉinio skribe, sed ankaŭ en Italio vid-alvide.

Kiel ni scias ke en la urbo Ravenna, kie forpasis Dante, okazas ĉiujare kunsido por deklami poemojn de Dante.

Kaj en septembro 1998, en iu preĝejo de Ravenna, ĉinaj eruditoj kaj poetoj, kiuj pilgrime venis al Italio, deklamis en ĉina kaj itala lingvoj la 26-an kanton de *Infero*: *Vojaĝo de Ulysses* (Odysseus).

Kiam okazas en la 91-a UK en la fama urbo Florenco, hejmloko de Dante, ĉina esp-isto povas doni prelegon pri Dante, tio estas nova rekordo.

Tiu rekordo, estas nek unika, nek sen-precedenca inter ĉinoj, kaj mi kredas, ke ĝi estu daŭrigota estonte.

10. Rememore pri Dante en Lia Hejmloko

Kun la amo en ĉina koro, mi versis la suban tercinton kaj humile dediĉas al la 91-a UK. 14

Epilogo:

Ĉijare l' Universala Kongreso

okazas en Florenco, Italio—

Hejmloko de Dante. Sorĉa impresio!

Taŭga ŝanco por paroli pri tio:

Kiam la majstra trovis sian vojon

la Dia Komedio al Ĉinio?
Kiel Qian Daosun la unuan fojon
ekprovis ĉinigi— eĉ laŭ tercino,
kiu donis al ni surprizan ĝojon!
Rara nupta donac' al belulino
kaj talenta Princo de Ampoemoj.
Sensacia novaĵo en Pekino.
Ekspono de premiitaj artgemoj.
Ĉinoj pentras pri Dante-a Infero,
Limbo, furioj, ombroj, jen la temoj,
Paolo kaj Francesca en sufero,
kaj falis kortuŝite la poeto.
Retrorigarde pri la kariero
de tradukad' en centjara stafeto,
por konigi Dante-n al la publiko.
HU Guozhu recenzas en La Gazeto.
Studa legad' kun mirinda efiko,
ke aperadas flugpensoj ĉinstilaj,
eble interesaj por vi, amiko!
Abundas tajdaj pensoj tre similaj.
Dia Komedio kaj Songĝo Ruĝdoma—
ambaŭ same senvelkaj, same brilaj,
same eleganta, ĉarme aroma,
same superbaj kaj same furoraj
aŭtoro ĉina kaj poeto Roma.
Kun admiro kaj respekto adoraj
ĉinaj eruditaj deklamis haĝe
kantojn en Ravenna, per voĉoj koraj
pri Ulysses, senrevena vojaĝe.
Nun sekvas mi, sekvos ankaŭ aliaj.
Humilajn versojn al Dante omaĝe.

HU Guozhu. 2006-05-22

Prononco de ĉinaj propraj nomoj

Bakin (1904-2005)

Bai Juyi (baj ĝju ĵi, 772-846)

Cao Xueqin (caŭ ŝjue ĉin, 1724-1764)

Cao Zhi (caŭ ĝi, 192-232),

Chen Duxiu (ĉen du ŝiŭ, 1879-1942)
Cui Hao (cui haŭ, 704?-754?)
Du Fu (du fu, 712-770)
Gui Qian Ji (gui ĉjan ĝji)
Guo Moruo (gŭo mo ĵŭo, 1892-1978)
Guozhu (gŭo ĝu, 1938-)
He Qifang (he ĉji fang, 1912-1977)
Hu Guozhu (hu gŭo ĝu, 1938-)
Hu Shi (hu ŝi, 1891-1962)
Hua Luogeng (hŭa lŭo geng, 1910-1985)
Huang Guobin (hŭang gŭo bin, 1946-)
Huang Wenjie (hŭang ŭen ĝje)
Lao She (laŭ ŝe, 1898-1966)
Li Bai (li baj, 701-762)
Li Shaowen (li ŝaŭ ŭen, 1942-)
Liang Qichao (ljang ĉji ĉaŭ, 1873-1929)
Liu Yu'xi (liŭ ju ŝji, 772-842)
Lusin (1881-1936)
Lu Xiaoman (lu ŝjaŭ man, 1903-1965)
Lu You (lu joŭ, 1125-1210),
Ma Junwu (ma ĝjun u, 1882-1939)
Mao Dun (maŭ dun, 1896-1981)
Pu Songling (pu song ling, 1644-1715).
Qian Daosun (ĉjan daŭ sun, 1887-1966)
Qian Shan Shili (ĉjan ŝan ŝi li, 1858-1945)
Qian Xun (ĉjan ŝjun, 1853-1927)
Qu Yuan (ĉju ĵŭan, ĉ. 340-278 a.K.)
Ruan Zhangjing (ĵŭan ĝang ĝing, 1914-2001)
Shi Chengtai (ŝi ĉeng taj, 1939-)
Su Manshu (su man ŝu, 1884-1918) 16
Tian Dewang (tjan de ŭang, 1909-2000)
Wang Duqing (ŭang du ĉing, 1898-1940)
Wang Guowei (ŭang gŭo ŭej, 1877-1927)
Wang Shifu (ŭang ŝi fu, ĉ. 1260-1336?)
Wang Weike (ŭang ŭej ke, 1900-1952)
Wu Mi (u mi, 1894-1981)
Wu Xinghua (u ŝing hŭa, 1921-1966)
Xu Zhimo (ŝju ĝi mo, 1897-1931)

Xue Heng (ĝjue heng, La Akademia Revuo)

Zhang Dedi (ĝang de di, 1932-2005)

Zhang Ji (ĝang ĝji, ĉ. 753)

Zhang Shuguang (ĝang ŝu ĝuang)

Zhao Dan (ĝau dan, 1915-1980)

Zhu Weiĵi (ĝu ŝej ĝji, 1904-1971)

Notoj

1. Vd la revuo *Eduka Mondo*, 1904. Wang Guowei egalige menciis la du verkojn *La Ruĝdoma Songō kaj La Dia Komedio*, emfaze pri la inspiro de amata virino al la aŭtoro.

2. *La Ruĝdoma Songō* cirkulis unue en formo de mankopiaĵoj en la *Qianlong*-erao (1736-1795), post ĉ. 30 jaroj jam aperis tiaj versoj pri ĝia furoro en ĉina socio.

3. Vd la ĵurnalo *Fu Bao*, januaro 1907.

4. Su Manshu (1884-1918), ĉina verkisto, poeto, tradukisto kun multflankaj talentoj. Chen Duxiu (1879-1942), unu el la ĉefaj gvidantoj en la komancaj jaroj de Ĉina Kompartio.

5. En sia libro *Gui Qian Ji*, s-ino Qian Shan Shili nomis la *Dian* Komedion kiel *Dramon de Dio*, ankaŭ la ĉinaj ideogramoj, kiujn ŝi uzis por la nomoj de Dante kaj lia poemo, estas nesamaj ol tiuj uzataj hodiaŭ.

6. *Qu Yuan* (ĉ. 340-278 a.K.), granda ĉina poeto. En sia ekzilo li verkis faman poemon *Lisao* kun speciala stilo. *Qian Daosun* ĉinigis uzante versojn en tia *lisao*-stilo kaj rimaranĝon de tercino.

7. ĉitie estas 8 bildoj tiuteme:

<http://www.wisdomportal.com/Romance/Paolo&Francesca-Art.html>

8. ret-adresoj de la 7 bildoj .

<http://www.artron.net/artronlist/zhanlan/ch1/mulu/lsw/>

9. 'Dante kaj Beatrice', 1883, far Henry Holiday (1839 - 1927)

<http://www.liverpoolmuseums.org.uk/walker/collections/19c/holiday.asp>

10. <http://www.dante-alighieri.nl/bollettino/nummers/bollettino0601.htm>

11. http://www.ikue.org/tit34_03.html

12. <http://www.cib.ac.cn/Cib-Web/ChuangXin/YQ-DanD-JJ.htm>

Rafael Henrique Zerbetto (Brazilo)



Ĉinaj hoteloj ne plu povos rifuzi eksterlandajn gastojn

Dum vojaĝo en Ĉinio, multaj eksterlandanoj spertis embarasan situacion: hoteloj kiuj gastigas nur ĉinojn. Dum jardekoj, tio estis kutimo de plejparto de ĉinaj hoteloj, aparte de tiuj pli simplaj kaj bonprezaj, kaj ĝeno kaŭzita de tio estis unu el la ĉefaj plendoj kaj de eksterlandanoj vivantaj en Ĉinio, kaj de alilandaj turistoj.



Ĉinio lastatempe alprenis plurajn rimedojn por faciligi vojaĝojn de turistoj el eksterlando.

Mi mem, post mia alveno en Ĉinio, havis kapdoloron por mia unua memaranĝita vojaĝo en la lando, ĉar mi bezonis mendi gastejon kaj tiam oni admonis min, ke multaj gastejoj "ne povas" gastigi eksterlandanojn. Por sukcese mendi gastejon, mi bezonis ne nur kontroli aferojn kiel prezo, loko kaj taŭgeco de la ĉambro disponebla, sed ankaŭ ĉu la gastejo akceptas eksterlandanojn aŭ ne.

Mi rapide komprenis, ke altnivelaj hoteloj, aparte tiuj 4- aŭ 5-stelaj, ne nur gastigas eksterlandanojn, sed ankaŭ provizas bonegajn servojn anglalingve. En hoteloj pli modestaj, kvankam ili kutime ne provizas anglalingvan servon, tamen miaj spertoj estis agrablaj kaj laboristoj estis helpemaj, sed antaŭ ol vojaĝi mi havis la temporaban taskon kontroli, ĉu ĝi akceptas eksterlandanon aŭ ne, kaj mi neniam havis malagrablan surprizon.

En retejoj pri mendado de gastejo, mi foje trovis hotelojn, kies paĝo klare mencias, ke ĝi akceptas eksterlandanojn, sed kelkaj homoj komentis, ke alvenintaj tie, funkciulo nuligis la rezervon surbaze de la preteksto, ke tiu hotelo ne rajtas gastigi eksterlandanojn! Kelkaj kazoj estis aparte bizaraj, ĉar la sama hotelo foje akceptis eksterlandanojn, foje ne! Sed kial?

Dum multaj jaroj mi kredis la du kutimajn klarigojn por tio. La plej ofta estas, ke por gastigi eksterlandanojn, hotelo bezonas akiri specialan permeson de la registaro, kio kostus multe por malgrandaj kaj simplaj hoteloj, do nur luksaj hoteloj povus havi ĝin. Mi ekpridubis tiun klarigon, kiam du amikoj el eksterlando gastigis en bonpreza junul-gastejo en pekina hutongo.

La alia klarigo estis teknika limigo por registri eksterlandajn gastojn. En Ĉinio, hoteloj devas registri ĉiujn gastojn per komputila programo, sed ne ĉiu hotelo havis teknikajn kondiĉojn por registri gastojn el eksterlando. Tiu klarigo ankaŭ ŝajnis al mi stranga, ĉar estus sensece krei du apartajn programojn por registri gastojn, kaj programo por registri alilandanojn certe ne postulus malsaman komputilon ol tiu uzata por registri ĉinojn, do kial estis teknika limigo tiurilate?

Nur en 2022 mi komprenis la veron pri tiu ĉi temo: antaŭ longa tempo en Ĉinio, hoteloj ja bezonis apartan permesilon por akcepti eksterlandajn gastojn, sed ekde 2003, rilataj permesilo por hotelo ne distingas inter ĉinaj kaj eksterlandaj gastoj, ajna homo kun valida dokumento povas tie gastigi. Multaj hoteloj, tamen, daŭre insistas pri la "manko de kvalifiko", foje pro nescio pri pli aktualaj leĝoj kaj regularoj, foje pro tio, ke funkciulo ne konis la proceduron por registri alilandan gaston.

La usona tradukisto Marian Rosenberg estas unu el la malmultaj eksterlandanoj, kiuj dum pli ol jardeko batalas por ŝanĝi tiun kutimon: fluparolanto de la ĉina, ŝi ĉiujare ekskursas per biciklo en Ĉinio kaj ofte tranoktas en vilaĝoj kaj aliaj pitoreskaj lokoj kie la nura gastejo "ne akceptas eksterlandanojn". Ŝi studis la koncernajn leĝojn kaj eĉ lernis kiel mem registri sin por havi sian rajton respektatan. En multaj kazoj, la deĵoranto agnoskis ŝian rajton tranokti tie kaj lernis de ŝi kiel fari la registron de alilandano. Foje oni eĉ permesis al ŝi mem registri sin en la sistemo. En aliaj kazoj, ŝi bezonis voki ka policon por solvi la aferon.

Okazas, ke registri ĉinan gaston estas tre simpla proceduro: sufiĉas alproksimigi nacian identeckarton sur aparato kaj la registro estas plenumita, ĉar nacia identigilo

de ĉinoj havas icon legeblan de tiuj aparatoj, kiuj tamen ne povas kolekti informojn el dokumentoj emisiitaj de alilandaj registaroj. Do, oni bezonas permane registri gaston, kiu prezentas pasporton kiel dokumento, kaj tio ne nur estas laboriga, sed ankaŭ iom kaŝita en la komputila programo. En lando kun pli ol unu miliardo da homoj, eksterlandaj gastoj estas tiom maloftaj en plejparto de la hoteloj, ke oni kutime ne trejnas siajn funkciulojn kiel registri ilin.



Policistoj helpas Marian Rosemberg registriĝi ĉe hotelo dum unu el ŝiaj biciklaj vojaĝoj en Ĉinio.

Pasintjare, ekzemple, mi dufoje gastigis en hoteloj, kiuj oficiale havas anglalingvan parolanton ĉe la akceptejo kaj akceptas alilandajn gastojn. Fakte tie estis nur unu laboristo, kiu scipovis la anglan, kaj plejparte de la tempo tiu laboristo ne estis en la hotelo. Por registri eksterlandajn gastojn, estis simila problemo: la parolanto de la angla estis la ĉefrespondeculo pri tio, kelkaj aliaj laboristoj ankaŭ lernis kiel tion fari, sed ne havis sperton pri tio. Iel ajn, en ambaŭ hoteloj ili sukcesis registri min sen la ĉeesto de la anglalingva parolanto.

Post tiuj du spertoj, mi komprenis, kial kelkaj eksterlandanoj raportas, ke ili gastigis en hotelo kaj havis bonan sperton tie, dum aliaj estis rifuzitaj: kelkaj hoteloj, kiuj anoncas pretecon gastigi eksterlandanojn fakte havas nur unu funkciulon, kiu scipovas registri tiujn gastojn, kaj kiam tiu laboristo ne ĉeestas, la deĵoranto ne scias kion fari. Parte ankaŭ kulpas la proceduro por registri alilandajn gastojn, onidire neintuicia por deĵoranto kaj ankaŭ temporaba.

Malgraŭ tiu ĝeno pri hotelmendado kaj kelkaj aliaj similaj situacioj, kiujn eksterlandanoj foje spertas en Ĉinio, mi disvolvis profundan amon por tiu ĉi lando. Pro tio, kvankam mi malĝojas, kiam homoj rakontas malbonan sperton dum vojaĝo en Ĉinio, tamen mi komprenas iliajn kialojn. Ĉina kulturo havas plurajn trajtojn

malfacile kompreneblajn de alilandaj turistoj, inter ili la kutimo de ĉinoj inventi pretekstojn -- kiel leĝa aŭ teknika kialo -- por eviti embarason.

Lastatempe, reage al pluraj raportoj pri kazoj de eksterlandanoj neakceptitaj en gastejo, la 24-an de majo, ĉinaj aŭtoritatoj ordonis al ĉiuj hoteloj en la lando ne plu rifuzi eksterlandajn gastojn. Estis lanĉita tutlanda iniciato por kapabligi laboristojn de hoteloj, kun la celoj plifortigi lernadon pri koncernaj leĝoj, plialtigi la nivelon de ilia trejnado kaj plibonigi la kvaliton de la servoj.



Policisto helpas eksterlandanon registriĝi ĉe hotelo, kies deĵoranto ne scipovis la proceduron por tion fari.

La iniciato kuraĝigas hotelojn provizi pli konvenajn servojn por eksterlandaj gastoj, kaj estigas partnerecojn kun retaj platformoj por provizi trejnadon pri angla lingvo por laboristoj deĵorantaj ĉe akceptejoj, kaj senpagan trejnadon pri registriĝo de gastoj.


En la pasintaj monatoj, Ĉinio ankaŭ plibonigis sian politikon pri vizoj kaj estigis novajn politikojn por faciligi vizpetan proceduron de alilandanoj, faciligi pagojn de eksterlandanoj per poŝtelefono en Ĉinio, estigi senvizan enirpermeson por eksterlandaj pasaĝeroj de krosŝipoj, kaj estigo de fundamentaj reguloj por faciligi dokadon kaj replenigo de provizoj al internaciaj krosŝipoj alvenintaj en ĉinan havenon.

el El Popola Ĉinio

Rafael Henrique Zerbetto (Brazilo)

Dezerto: nova bitalbumeto de Armel Amiot

Oni ĉefe difinas dezerton kiel lokon tre sekan, kun malfavora klimato. La vorto ankaŭ estas uzata por loko (preskaŭ) senhoma, sekve ĝi estas metaforo por soleco kaj forlaso. Dezerto estas loko kie oni apartiĝas de la mondo kaj renkontas sin mem.



Kvankam la nomo de la nova albumeto de Armel Amiot, *Dezerto*, eldonita de Vinilkosmo, prezentas al la aŭskultanto tiun ideon de soleco, tamen la ses kanzonoj venas duope, kiel jino kaj jango. Kiu estas tiu duopo? Ĉu ena kaj ekstera mondoj? Ĉu homo kaj medio? Ĉu realo kaj revo? Ŝajne ĉiu homo havos apartan opinion pri tiu temo, ĉar tiu ĉi ses-traka albumeto estas tre poezieca, parolas rekte al animo, do ĉiu malsame interpretos ĝin.

Nek Viro Nek Virino havas agrablan melodion kaj tekston pri tiu momento, kiam ni pensas ke ĉio iras glate en la vivo, sed subite ĉio ŝanĝiĝas. Kiu neniam travivis tian sperton? En tiuj okazoj ni rimarkas kiom malgranda estas nia povo sur nia destino. Jen sento de forlaso. Jen la dezerto.

Sed amikoj ekzistas por savi nin de la dezerto. *Amikeco* havas gajan melodion kiu plenigas niajn korojn je espero. Ĝi estas la malo de la pasinta kanto kaj temas pri amiko, kiu venas por helpi kiam ni estas en malesperiga situacio.

Sekva kantoparo temas pri soleco. *Soleca Birdo*, kun esperiga melodio, rakontas pri birdo fluganta sola sur ĉielo, ofta metaforo por libero, sed en tiu ĉi kanto ĝi simbolas solecon. Kiel diras fama brazila kanto de Tom Jobim, "Tute ne eblas

feliĉiĝi sole". Sed soleca birdo ne povas perdi la esperon, ke ĝi iutageflugos pare kun alia.

Se Vi Apudas rakontas pri la ĝojo kiun oni sentas pro ĉeesto de sia amato. Tiu ĝojo estas esprimata de la gaja kaj danciga melodio, kaj ankaŭ la teksto pri paro ĝuanta la vivon en harmonia kunvivado.

La bluso *Kosma Spaco* alportas nin al la vasta kosmo, la plej granda dezerto ekzistanta. Nur tie homoj ekkonscias pri la granda valoro de Tero, nia nura ŝirmejo en la universo, kaj alportas al ni la deziron savi nian planedon de la nuna detruado kiun homoj mem faras.

La utopia kanto *Nova Tero*, pri la edena mondo pri kiu ni revas, invitas homojn agadi por konstrui tiun edenan mondon: homaro bezonas novan vojon, novan celon, novan lingvon, novan ŝancon. Popoloj devas unuiĝi por kunkonstrui verdan mondon. Ni kreu homaran komunumon de komuna estonteco!

En la retejo de Vinilkosmo vi povas senpage aŭskulti peceton de la kantoj kaj aĉeti la bitalbumeton: <https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/kanzono-tradicia-progresiva/armel-amiot/2-dezertoj.html>

Abonantoj de Vinilkosmo-ABONKLUBO povas senpage aŭskulti la tutan katalogon de Vinilkosmo per elsendfluo. Vi povas aboni ĝin ĉe <https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/vinilkosmo-abonklubo.html>

el *El Popola Ĉinio*



ilustrita pere de AI